

PLATONO

KRATILO

Traduko el la greka lingvo de Armando Zecchin
Revizio grekisto Giuseppe Quaranta

ENKONDUKAJ PREFACOJ

Pri Platono.

a) Pri la vivo de Platono.

Platono naskiĝis en Ateno jaron 428 kaj mortis en 347 a.K. Kiam kuniĝis kun Sokrato, li detruis siajn antaŭajn poemojn kaj komencis intenan filozofian esploron kun nova viv-kaj mond-konceptado kiun li dissemis en famajn dialogojn eĉ dum aŭ marĝene de vojaĝoj. Li fakte vizitis tri fojojn Sicilion kie, en Sirakuzo, li esperis krei sian elpensitan ŝtaton. Revenante Atenon, li fondis tie-najbare la faman Akademion al kiu alvenis instruiĝi junuloj inter kiuj ankaŭ Aristotelo. Li verŝis sian pensadon en pli ol 30 dialogojn krom iujn leterojn.

a) Pri la filozofio de Platono.

Platono startas el la jena pensado: per la sensa perceptado, kiu konstituas unuavide la komenca kontakto de la homo kun la realo, ĉio sin prezentas kiel daŭre fluanta kaj kiel senĉesa ŝanĝado farita je estiĝo kaj malkonsistiĝo. Se tio estus ĉio kion oni povas diri pri la realo, ne eblus fari, pro tia daŭra ŝanĝiĝo, asertojn tutmonde validajn. Sed tio kontraŭdirus memsperton de la homa penso: en la pensago, fakte tiel sonas la origina intuicio de Platono, la animo intuicie tuŝas iun dimension de la realo kiu superas kaj transsaltas la ŝanĝiĝemon kaj forpasiĝemon. Ĝin oni spertas ankaŭ "senkatenita el la ŝanĝantaj impresoj de la sperto", tiel ke ĝi ekkonceptas la formojn sensajn, kaj do momentajn, kiel realiĝojn de formoj idealaj kaj nepereantaj kiuj staras je ilia bazo, formoj kiujn Platono nomis ideojn kaj kiujn li siavice ŝuldis al iu lasta fundamento unueca, en kiu la bono, la vero kaj la belo koincidas. Ili loĝas en ideala Hiperurano.

Laŭ Platono ne povas ne elstari la koncepto "[kalokagathia](#)" (el "kalos", "kai", "agathos"), tio estas belo kaj bono: ĉio kio belas estas ankaŭ

vera kaj bona, kaj male. Tial, la belo de la ideoj, kiu fascinas la intelektan amemon de la filozofoj, koincidas ankaŭ kun la bono por la homo. La celo de la homa vizio fariĝas, do, la vizio de la ideoj kaj la kontemplo pri ideala Plejalta Diaĵo.

Cele de elmontri de siaj elpensadoj, Platono uzas ankaŭ la mitojn. La mito por li agadas kiel didaktika instrumento kaj esprimo de scio intuiciita kiujn poste la menso ĝustigas kaj plibonigas. La mitoj utiligitaj de li estas entute 16.

La homo havas animon kiu ĝuas je la sama konsisto de la ideoj, do ĝi estas senmortema kaj emas reveni, tra diversaj reinkarniĝoj, al la loko de la ideoj. Ĉar la distanco, nespaca sed valora, inter la ideoj kaj la materia realo, oni facile komprenas ke la fakta intertempa vivo havas malmultan valoron kaj ĉio korpa meritas malpli estimon. Sed ĉar la ideoj partoprenigas la aĵojn je sia digneco kaj ilin similigas al si, ankaŭ tiuj fine akiras kelke da digneco.

Tiaj filozofiaj ideoj multe plaĉis al kristanaj intelektuloj, kiuj faris el Platono preskaŭ, laŭ iuj aspektoj, praintuiciinto de kristanismo. Korektitaj kaj purigitaj, tiuj ideoj fariĝos, malgraŭ iliaj ne kristana fundo (vidu sklavecon kaj multdiecon ktp), kristana platonismo.

Pri la verko “Kratilo” (greke, Κρατύλος; latine Cratylus).

Verko de la matura aĝo, laŭ kritikistoj. Por respondi la demandon: kiom da vero estas entenata en la lingvaĵo?

La verkaj dialogantoj:

Kratilo: Eraklita filozofoj (duan duonon de la Va jarcento aK), kaj atenano. Laŭ Aristotelo, li estis majstro de Platono kaj tiun ĉi enkondukis en la doktrinon de Eraklito, kies resumpensa estis *πάντα ρεῖ* (ĉio moviĝas: *πάντα ρεῖ*

ὡς ποταμός), kies li estis sekvanto. Kaj tiun filozofian sistemon li altiris al ĝiaj ekstremaj konsekvencoj kaj al ĝia fina kaj definitiva krizo. Por li ne nur “ne estis eble mergiĝi du fojojn en la saman riveron”, sed eĉ ne unu fojojn ĉar, ĉiufoje kaj ĉiumomente, ĝi “ne estas la sama rivero”.

Li negis pro tio la eblon de ĉiu aserto vera pri la realo, kaj eĉ la eblon eldiri iun ajn vorton laŭvere, sin limigante, tial, kiel informis Aristotelo, “indiki per fingro” la aĵon indikeblan per vorto”. De li elprenas la nomon la dialogo de Platono kiu pritraktas la problemon de la lingvaĵo.

Kratilo subtenas, ke la nomoj estas dotitaj je *natura adekvateco*, tio estas, ili difine esprimas la aĵojn kiujn ni nomas, pro kaj per intrinseka kaj originala kunligiteco kun la aĵoj mem kiu antaŭas la socian uzon de la nomoj mem.

Hermogeno (fidela sekvanto de Sokrato ĉe kiu li ĉeestis ankaŭ en la mortohoro): male, subtenas ke fakto per kiu iu nomo elvokas iun aĵon anstataŭ alian, dependas nur de konvencio (Συνθήκη *synthêke*), tio estas de akordo interkonsentita de la uzantoj de la nomo: do, de io provizora kaj ekstera al la nomo, kiu fakte ne aludas al la naturo de aĵo alvokata per la nomo.

Sokrato: kiu siavice subtenas, ke la nomo korespondas al la imago-ideo kiun la homo al si kreis pri la aĵoj mem; tial, por koni la esencon de la aĵoj necesas sin turni ne al la nomoj sed al la ideoj. Platono, cele harmoniigi la teorion “mimeza” de Kratilo (nome, rekta imitado de la aĵo nomata) kun tiu “konvencia” de Hermogeno (nomo instrumento konvencia referencanta al la aĵo nomata) invitas siajn kundiskutantojn ekameni, sub sia gvido, la “etimologian” strukturo de ampleksa signifa serio de nomoj. cele malkovri la polimorfajn semantikajn aspektojn kaj la malsamajn interpretojn al kiuj ili povas enkonduki, rilate al la arko spaca-tempa konsiderata.

Per tiu “artifika ludo” de la etimologioj de la nomoj disfalas la tezo de tiu kiu, kiel Kratilo, blinde sin forlasas al mimeza povo de la nomo kaj do al ties supozita natura rilato (ankaŭ se nur imita) kun la aĵo nomata, al ĝi donante esprimivan plenplenecon kaj stabilecon kiun la nomo, ĝuste per la etimologia analizo, ne montras.

Ĉiel ajn, la etimologia trakuro lasas travidi la personajn vidpunktojn de Platono, kaj rilate la homon kaj la kosmon, kiuj riveligiĝas sintoniaj kun tiuj anti-kvgreka.

La abunda prietimologia sekcio havas, tial, duoblan valoron:

- a) historia atesto pri la penso-sistemoj antaŭantaj la filozofion de Platono;
- b) kritiko pri la teorio de la natura adekvateco de la nomoj, ονόματα.

(La fina invito de Sokrato sin turni rekte al la aĵoj, igas nin travidi albor-diĝon “pragmatan” rilate la problemon; kaj la debato restas malfermita.

De la etimologioj (pli ol 140) proponitaj far Sokrato per la svarmo de nomoj ekzamenitaj, nur unu dudeko estis konfirmitaj de la nuna lingvistika scienco. Iuj solvoj, eble, aperis bizaraj kaj strangaj eĉ al la samtempuloj de Platono. Tial, ĉu ni rajtas pensi, ke Platono, per la majstreco de Sokrato, celintus ne liveri etimologiajn rekonstruaĵojn korektaj sed prefere sondi por la mimeza taŭgeco de la nomoj?

Por atingi tion li ofte sin servas je pura “fona impresismo”, provante doni valoron al apartaj literoj (konsonantoj kaj vokaloj) komponantaj la nomon nur por atingi sian celon).

Konceptaro de Platono en la verko KRATILO

Dialogo Kratilo (de la jaroj 386-384) ne ŝajnas sin prezenti kiel proponon klarigan kaj edukon sed kiel studon kaj provon de solvo de problemo kiu tia estas eĉ por la aŭtoro mem.

a) Hermogeno, unu el la tri dialogantoj, konvinkas ke la nomoj per kiuj estas indikataj la aĵoj estas tute konvenciaj aŭ laŭakordaj aŭ laŭkutimaj aŭ laŭleĝaj, do eksteraj rilate la objektojn. Tia penspozicio suspektigas Hermogemon, eble nekonscie, absorbiĝinta ion da subjektivismo sofisteca. Kratilo, la dua, male, obstine opinias ke la nomoj, origine, estas donitaj laŭ la vera naturo de la aĵoj kvazaŭ vera difino de ilia estaĵa konsisto. Do la enketa demando: kia la adekvateco de la nomoj? (Pri la elekto de la vorto *adekvateco*, vidu pli poste). Aŭ: kia la kona valoro de la lingvaĵo? Aŭ: kia la rilato inter la nomo kaj la aĵo nomata? Laŭ Platono (Sokrato lin peresonigas) ambaŭ eraras. Eraras, do, kiu taksas la nomon “flatus vocis” (flatus voĉis = aerspiro) kaj kiu opinias ke “nomina sunt consequentia rerum (la nomoj sekvas la naturon de la aĵoj)”¹.

Devas ekzisti la eblo erari, laŭ Sokrato-Platono. Se ne spertebblas eblo erari, ĉiuj paroladoj estas veraj; kaj se ĉio veras aŭ malveras, kaj ne estas konverĝo en la mezo de la ekstremoj, ĉio perdas signifon ĉar afero estas senca kiam entenas almenaŭ ion da vero, kaj samtempe ankaŭ ion da malvero (Platono lokigas ĉiam en la mezo). Se oni ne akceptas erarieblon ne eblas koni la veron.

La dialogo “Kratilo” prenas nomon de unu el la du dialogantoj kun Sokrato kaj prezentas ampleksan diskutadon pri la problemaro de la lingvo. Tiutempe inter la Sofistoj viglis interesaj diskutadoj tiuteme, ligitaj al binaro “nomo”-“fysis” (“νόμος”-“φύσις” = konvencio-naturo): en tiu diskuto kiu, krom

¹ Esprimoj de mezepoka filozofio nedirekte enketanta pri la rilato de la vortoj.nomoj kun la realaĵoj naturaj kaj precipe superaj.

sofista, estas antropologia, Platono prezentas sian solvon: oni atribuas la nomojn iom "κατά φύσιν" kaj iom "κατά νόμον"- (naturo, konvencio)". Do la aĵoj tendencas sugesti la nomon per kiu la homoj ilin vokas sed post tio la homoj modifas korektante ĉion per la racio; temas kiel oni vidas pri teorio ekvilibrigita.

Sed ĉiom tio kongruas kun la diskutado pri vero kaj malvero? Se oni bone eniras la penson de Platono, ambaŭ manieroj doni la nomon negas la eblon erari: la vortoj, fakte, estas aŭ komplete artefaritaj aŭ komplete naturaj kaj senerare indikas la aĵon sendepende de ĝiaj kompletaj difinoj.

Platono tamen sentas bezonon, eĉ por fuĝigi la minacon de nestabil-econ de la aĵoj, elpensi kaj enirigi sian ĉevaletan: aĵoj havas ion da stabil-econ, kontraŭ la ekstrema ŝanĝemo (*panta rei*) de Eraklito, ĉar ili estas imitado aŭ partopreno de la ideoj, eterne similaj al si mem. Oni notu ke konceptado pri la nomado de diskutanto Kratilo similas, multaspekte, al tiu de la Biblia Adamo, ŝarĝita de Dio nomi la aĵojn: la vorto de li asignita estos la vera laŭ naturo de la aĵo. Sed kiel en la Biblio influas mitologio kiu atribuis nenaturan efikon al la vorto, tiel sinteno iom simila ludas en la menso de Kratilo inklinena al antikva sekura saĝeco jam ne akceptita de Platono.

Por limigi la efikon de tia ideologi-punkton kaj la dialektikan relativismon² de Sofistaro, en Kratilo estas sugestata la kriterio de la komparo kun la realaj aĵoj, per kiu oni povas konstati aŭ ne la veron de la nomo. Adekvateco (ὀρθότης) referencas al la rilato inter la nomo kaj la aĵo, vero (ἀλήθεια) referencas al la rilato inter komunikado kaj la nomo.

b) En Kratilo oni krizigas la fidon en la serĉado, por atingi la adekvatecon de la nomoj, pri la etimologio de la nomoj: etimologio malofte redonas la sig-

² "Relativismo" havas plurajn signifojn. Ĉi tie ĝi signifas per la sofista dialektiko eblas atingi malsamajn verojn, ĉiuj egalrajte "veraj": do, ne eblas atingi la veron!

nifon de la nomo ĉar la lingvo daŭras ŝanĝiĝi kaj la homoj ĝin modifas nezorgdone kaj laŭkaprice. Ĉu, por ni, implicita kritiko al ero de la moderna kritika-historia metodo pri kiu oni hodiaŭ ĝuste fieras, sed ne evitas la ekscesojn?

c) Ĉu eblas diri ke lingvismo de Platono serĉanta la veron en la rilato de la vorto kun la aĵo, funde parolas pri la kulturo kunportata kaj transdonita de la lingvo? Supozante posedi unusencan signifon por la vorto *kulturo*, en kiuj lingveroj ni legas tiun kulturon? ĉu en la radikoj, ĉu en la frazaro (nomoj kun verboj), ĉu diversaj niveloj de lingvaĵaj unuoj, ĉu en la gramatiko, ĉu en la temoj de la literaturo aŭ alie?

Esperanto, krom aserti ke mem enhavas kulturon, kredas ke ĉiu lingvo posedas la sian? Se tiu kuŝas en la radikoj kaj vortoj, kiel forfuĝi el la kritiko de Platono pri etimologio?

El la hebrea-kristana tradicio de la kreiĝo de la homo kaj el la mita Babela Turo iuj deduktis komenton tian: Adamo parolus lingvon (la hebrean) naturan kies nomoj trakopiis ekzakte la esencon de la nomitaĵoj kaj ĝuste el la nomoj eblis kompreni eĉ la nevideblajn aspektojn de ĉio. Sed post la mita Babelturo, laŭ la legenda pludiro, la lingvaĵoj ekglitintus al konveencia nomado kaj ĉesintus adekvateco inter nomo kaj nomito. Tial, modifo kompleta!

Laŭ Platono, male, la du manieroj, naturisma kaj konveencia, nature kunekzistas. Ni modernuloj konsentas kun li: ekzistas derivado natura de la nomoj: la aĵoj mem sugestas la nomojn uzindajn, sed la lingvoj parolataj estas pluraj: do, elementoj konveenciaj ne povas ne agadi en la kombinado de la nomoj. Eĉ la potenco de la LOGOS (Vorto, Nomo, Aĵo, Ago ktp), kiu en la antaŭa greka filozofio (kiel en la biblia konceptado) preskaŭ identas, kaj jam ekkriziĝis en la dialektikaj distingo de Sofistoj, en la Platona Kratilo pli subesube vigliĝas.

d) Ĉu la Platona maniero fari etimologion (ekz. per asonanco, per aldono kaj per malaldono ktp) anticipas aŭ similas al tiu moderna? Kaj, krome, ĉu

vere la parolanto aŭ verkanto, instinkte eĉ nekonscie, referencas al la fora etimologia signifo?

Ĉu la Platona disdivido de la rilato de la signifanto kun objekto kaj signifanto kun signifato identas al tiuj samcele hodiaŭaj? Ĉu la Platona distingo de signifanto el referanto similas tiun hodiaŭan?

Ĉu la konsidero pri la nomo kiel aparatoj, kaj kiel manifestiĝo de la realaĵoj, kaj kiel iloj semantikaj valoras ankaŭ por lingvistoj modernaj?

e) Pro kio ekesperantiĝanto povas pliigi sian memformadon per KRATILLO?

f) Oni rimarkigos ke la esploro pri la origino de la nomoj fine en Kratilo koncentriĝas sur la origino de la nomoj de la dioj.

Dekomence, en la greka filozofia tradicio, la rilato inter la nomo kaj la aĵo estas esplorata de Platono en Kratilo. Sekve, ekde Plotino, oni alvenas aserti ke, eĉ eldirante ties nomon, Dio retas nekonebla, estante Unu kaj Supre de ĉio. Tiuj ideoj estos filtritaj de la Peŭdo-Dionizo en verko “pri la diaj nomoj”. Ties metodo malfermas gravegajn perspektivojn rilate la problemon de la nomoj kiujn la homo povas atribui al Dio: se veras ke la homo nomas la aĵojn nur post pri ili koniga penetrado, kaj ke Dion neniu vidis, kiamaniere li povus Lin nomi? Danke al lerta spekulativado, la teologio de Pseŭdo-Dionizo tendencas ricevi la saman vidpunkton de Dio mem kaj do povas difiniĝi, plenrajte, anagogika aŭ ekstempa (*sub species aeternitatis*).

Ĝenerale, priscii nomon de io aŭ de persono kreis, laŭ la antikvuloj, rilaton de proksimeco, aŭ eĉ de posedo. Tio koincidas kun la premisoj de la biblia sinteno rilate la eldiron de la nomo de Dio. Pro tiu motivo iuj pasaĵoj de la Biblio malpermesas eldiri, ankaŭ pure mense, la nomon de Dio. Platono esploras kaj baraktas, la Biblio transsanltas la problemon kaj startas el la difino pri si de Dio mem. Sed la problemo de la etimologio daŭrigas resti.

En la fono de la esploro de Platono rimarkindas ke la kunligiteco inter la homa racio kaj homa lingvaĵo estis jam indikata de la duobla signifo de la greka vorto "logos", kiu signifas kaj racion kaj vorton: nur kiu posedas "logoson" - teoriecan racion - kapablas komuniki pere de "logos/vorto".

KRATILO

Ĉapitro I

HERM. Ĉu vi volas ke ni asociu eĉ la ĉi ĉeestan Sokraton en tiun ĉi nian diskutadon?

KRAT. Se tiel vi opinias.

HERM. Kratilo, jen li ĉi tie, subtenas, Sokrato, ke adekvateco³ de la nomo enestas en ĉiu el la aĵoj estantaj⁴ nature jam antaŭaranĝitaj, kaj ne ke la nomo estas tio per kio iuj, akordiĝintaj por eldiri, eldiras, elmetante ion de sia voĉo, sed estas jam antaŭaranĝita adekvateco de la nomoj por la Grekoj kaj por la barbaroj, la sama por ĉiuj. Se mi do lin demandas ĉu Kratilo estas aŭ ne al li nomo laŭ vero, li jesas. “Kaj kiu al Sokrato?”, mi al li diris. “Sokratolo!”, li respondis. “Do ĉu ankaŭ por la aliaj homoj ĝuste la nomo per kiu ni vokas ĉiun el ili, tiu estas la nomo por unuopulo?”; kaj tiu: “Sed certe ne por vi”, li diris, “la nomo Hermogeno, eĉ se ĉiuj homoj tiel vokas vin”. Kaj kiam lin mi demandas kaj eĉ montras deziron scii kion efektive li estas diranta, li nenion eksplikas kaj sin ŝirmas, ŝajnigante pripensi trameme, kvazaŭ li konus ĉi-koncerne tiaĵojn kiuj, se mem volus senvuale ilin esprimi, igus ke ankaŭ mi akordiĝu kaj fine ripetu kion li diras. Se vi iamaniere sukcesas kompreni la

³ La esprimo *ορθότες τὸν ὀνομάτων* estas tradukita per *adekvateco de la nomoj* kiam ĝi estas uzata por indiki la intrinsekan difinon de la aĵo aludata en la nomo, per *korekteco*, male, en ĉiuj aliaj kazoj.

⁴ *Aĵoj estantaj*, anstataŭ *estaĵoj*, ĉar oni volus reprodukti la platonan koncepton pri la estaĵoj, kiuj se ne havas la konsiston de la ideoj, ne estas certe senkonsistaj. Eble per tiuj vortoj Platono intencas distanciĝi el Heraklito laŭ kiu la movo signas, krom ŝanĝiĝon, ankaŭ malkonstantecon de la estaĵoj, kiu igas neebla la konon.

orakolon de Kratilo, mi vin aŭskultas kontente; aŭ, plibone, mi alprenus kun eĉ pli granda plezuro, kiel laŭ vi statas la afero rilate la adekvatecon de la nomoj, se al vi plaĉas.

SOKR. Ho Hermogeno, filo de Hiponiko, malnova proverbo diras ke malfacilas kompreni kiel reale statas la belaj gravaĵoj⁵. Kaj certe eĉ tiu de la nomoj ne estas akiro je malgranda gravo. Se mi povintus viziti ĉe Prodiko tiun lian kurson je kvindeko da drakmoj, per kiu la vizitanto, ĝuste laŭ lia diro, sin trovas sendeficite preparita pri tiu temo, nenio malhelpus ke vi estu haste instruata pri la vero de la adekvateco de la nomoj; sed mi tiun ne aŭskultis, mi nur lekcionojn je unu drakmo. Tial mi ne scias kia hazarde estas la vero koncerne tiun problemon; mi preta, tamen, priserĉe esplori kune kun vi kaj Kratilo. Koncerne kion li diras ke Hermogeno ne estas nomo por vi laŭvera, mia suspekto estas ke li ŝercumas. Li eble opinias ke vi, kvankam celante riĉaĵojn⁶, vi el tiuj sukcesas havigi al vi nenifoje. Sed, same kiel mi diris ĵus antaŭe, scii tiaĵojn malfacilas kaj, tial, nepras ke ni kune, senretene esprimiĝante, kribru ĉu ili statas kiel diras vi aŭ kiel diras Kratilo.

Ĉapitro II

HERM. Sed mi, ho Sokrato, malgraŭ prie oftaj diskutoj kun li kaj pluraj aliaj personoj, ne kapablas min persvadi ke troviĝas alia adekvateco de nomo se ne tiu de la konvencio kaj interhoma akordo. Al mi ŝajnas fakte ke se iu aplikas nomon al kelkaĵo, tiu ĉi estas la adekvata; kaj se, poste, li anstataŭas tiun per alia, kaj ne daŭrigas uzi tiun, pro

⁵ Proverbo atribuita al Solono kaj nun ilustranta la Sokratan inklinon al la gnomika tradicio.

⁶ Hermogeno signifis ankaŭ ‘bonfortunulo’ ĉar, disdividita laŭ siaj lingveroj, *Hermes* kaj *ĝenos*, ĝi fariĝas ‘el la gento de Hermeso’, dio en kiu oni veneris la protektanton de komercistoj kaj profitantoj.

nenia kialo la lasta estas malpli adekvata ol la malnova, same kiel kiam ni ŝanĝas nomon al servistoj [nenikiale la enigita nomo estas malpli adekvata ol la asignita antaŭe]⁷. Fakte ne el naturo ĉiu objekto jam antaŭdispoziciitan ricevas nomon - neniu nomo por neniu objekto -, sed nur el la normo kaj kutimo de tiuj kiuj tiel kutimas kaj nomas. Se, male, la afero prezentiĝas alimaniere, mi pretas lerni kaj aŭskulti ne nur Kratilon, sed ankaŭ kiun ajn alian.

SOKR. Eble vi diras ion validan, Hermogeno; sed ni ektrapensu. Ĉu vi do asertas ke tiu nomo per kiu iu nomas ĉiun ajn objekton, tiu estas la nomo adekvata⁸ por ĉiu objekto?

HERM. Tiel al mi ŝajnas.

SOKR. Ĉu kaj kiam la nomanto estas individua persono kaj kiam tia estas tuta urbo?

HERM. Tiel mi diras.

SOKR. Kaj kio? Se mi metas nomon al iu ajn el la aĵoj estantaj, ekzemple al tiu kiun ni nun nomas ‘homo’, se mi tiun per “ĉevalo”, kaj al tiu kiun nun ni nomas ‘ĉevalo’ indikas per ‘homo’, ĉu la sama estaĵo havos la nomon “homo” publike kaj ‘ĉevalo’ private? Kaj alikaze ‘homo’ private kaj ‘ĉevalo’ publike? Ĉu tiel vi diras?

HERM. Tiel al mi ŝajnas.

⁷ Eventulaj kvadrataj krampoj signalas tekstajn erojn ne troveblajn en ĉiuj manuskriptoj. Rilate la dividon en ĉapitroj, estas sekvata la divido de Hermann, kiu redaktis (1851-53) unu el la diversaj kritikaj eldonoj. Laŭ kelkaj filologoj en la tradicia teksto multas la la neoriginaj enŝtelitaĵoj. Pliofte estas sekvata la teksta disdivido laŭ la paĝnumerado kaj paĝsekiado de la fama Pariza eldono de la greka teksto flege de Henry Estienne en 1578.

⁸ La adekvateco, aŭ difino, povas esti intrinseka aŭ intenca. Por Kratilo ĝi estas nur intenca aŭ konvencia.

Ĉapitro III

SOKR. Ek, do, diru pri jeno: ĉu estas io kion vi difinas ‘diri laŭvere kaj diri laŭmalvere’?

HERM. Mi jes!

SOKR. Do, ĉu trafblas parolado laŭvera kaj parolado laŭmalvera?

HERM. Konsentinde.

SOKR. Kaj, do, kiu diras la aĵojn estantajn kiaj ili statas, tiu diras laŭvere, kaj kiu, male, ilin diras kiel ili ne statas, tiu diras malvere?

HERM. Ja jes!

SOKR. Ĉu eblas, do, diri per la parolo la aĵojn estantajn kaj tiujn neestantajn?

HERM. Konsentinde.

SOKR. Sed ĉu, do, la parolado, tiu laŭvera, estas vera rilate la tuton, dum ĝiaj eroj estas ne laŭveraj?

HERM. Ne, ankaŭ ĝiaj eroj.

SOKR. Kaj, krome, ĉu estas laŭveraj la eroj grandaj, kaj la malgrandaj male? Aŭ ĉu tiaj estas ĉiuj?

HERM. Ĉiuj, mi opinias.

SOKR. Do, ĉu estas iu ero de la parolado kiun vi diras malpli granda ol la nomo?

HERM. Ne! Sed estas tiu la malpli granda.

SOKR. Kaj, do, ĉu ankaŭ tiu [la nomo] diritas ero de la parolado vera?

HERM. Jes.

SOKR. Ĝi veras, kiel vi diras.

HERM. Jes.

SOKR. Kaj ĉu la ero de la malvera parolado ne estas mem malvera?

HERM. Tiel mi diras.

SOKR. Tial, eblas diri nomon veran kaj nomon malveran, se la samo eblas ankaŭ en la parolado.

HERM. Kiel ne?

SOKR. Tial, tiu kiun ĉiu dirus esti la nomo por kelkaĵo, ĉu la samo estus la nomo vera por ĉiu ajn objekto?

HERM. Jes.

SOKR. Eble eĉ ĉiuj kiujn iu dirus esti la nomoj por ĉiu estaĵo, ĉu tiaj ili estus ĝuste en la momento kiam li ilin eldiras?

HERM. Mi ne konas, ho Sokrato, alian adekvatecon de la nomo ol tiun ĉi: al mi eblas atribui al ĉiu aĵo tiun nomon kiun mi jam uzis, kaj al vi alian kiun vi viavice jam uzis. Tiel ankaŭ koncerne la urbojn mi konstatas nomojn asignitajn de iuj privatmaniere al la samaj objektoj, de Grekoj malsame ol aliaj Grekoj kaj de la Grekoj malsame ol barbaroj.

Ĉapitro IV

SOKR. Ek, Hermogeno, ni vidu ĉu al vi ŝajnas ke ankaŭ la aĵoj estantaj estas tiamaniere, nome, ke ilia realeco aperas laŭ aparta maniero al ĉiu, se sekvi Protagoron, asertanta ke ‘mezuro de ĉio’ estas la homo - tio estas kiaj la estaĵoj aperas [esti] al mi, tiaj estas por mi kaj kiaj ili aperas al vi tiaj ili estas por vi - aŭ ĉu al vi ŝajnas, ke ili havas en si mem ion esencan stabilecon?

HERM. Iam mi mem, ho Sokrato, puŝate de malfacilaĵoj, estis allogita ĝuste de la opiniaro asertata de Protagoro; sed al mi la afero ne prezentigas tiel.

SOKR. Kion? Tiel forte vi altiriĝis al tio, ĝispunkte ke al vi ne ŝajnas ke tute ne ekzistas homo malbona?

HERM. Ne, je Zeŭso! Eĉ mi tion spertis tiel ofte ke mi persvadiĝis ke ekzistas homoj ege malbonaj kaj eĉ multenombraj.

SOKR. Kiel?! Ĉu ŝajnis al vi ke, je tute bonaj, ne ekzistas plue?

HERM. Kaj ege malmultaj.

SOKR. Sed tiam tiel ŝajnis al vi?

HERM. Al mi jes.

SOKR. Kaj kiel, tial, kion vi devenigas el tio? Eble tiel: ke la komplete bonaj estas samtempe ankaŭ ege saĝaj, kaj tiuj tute malbonaj estas ege malsaĝaj?

HERM. Tiel al mi ŝajnas.

SOKR. Kaj tial, se Protagoro diris la veron kaj la vero estas tiela, nome ke kiel la aĵoj ŝajnas al iu ajn tiaj ili estas, ĉu eblas ke iuj el ni estas saĝaj, aliaj stultaj?

HERM. Certe ne.

SOKR. Kaj sendube, mi opinias, ke certe aperas: ke, ĉar ekzistas saĝo kaj malsaĝo, tute ne eblas ke Protagoro diras la veron: en nenio, fakte, iu povas esti pli saĝa ol alia, se kio al unuopulo aperas tio estas ankaŭ por unuopulo la vero.

HERM. Tiel estas.

Ĉapitro V

SOKR. Kaj eĉ ne, mi opinias, povas ŝajni al vi ke, imite de Eŭtidemo, ĉiuj aĵoj por ĉiuj estas samaspekte kunigitaj kaj porĉiamaj⁹: fakte, eĉ ne per tiu eskapilo la homoj povus esti samflanke iuj bonaj aliaj malbonaj, se virto kaj malvirto estiĝus sammaniere laŭ ĉiuj kaj ĉiame.

HERM. Vi asertas laŭvere.

⁹ Por Eŭtidemo valoras la principo: tute aŭ nenie, do kiu saĝas tiu tute saĝas! Tio estas implicite ekskludita de Hermogeno ĵus allasinta ke konstateblas diversgrada saĝo ĉe la homoj.

SOKR. Tial, se nek por ĉiuj ĉiuj estaĵoj estas ne sammaniere konsistaj kaj porĉiamaj, nek de unuopulo estas (esencigata) ĉiu aĵo, tial klaras ke ĝuste la estaĵoj posedas el si mem iun stabilan esencon, ne dependaj de ni aŭ de ni ne trenitaj supren malsupren pro la percepto kiun ni havas pri ili, sed en si mem rilate sian esencon al kies siamania posedo ili estas estiĝintaj.

HERM. Tiel al mi ŝajnas, ho Sokrato

SOKR. Sed ĉu, tial, la estaĵoj el si mem estus tiel antaŭdestinitaj, dum iliaj respektivaj aktivaĵoj ne simile? Aŭ eĉ ĉi lastaj, la aktivaĵoj, (estas) ia propraĵo de la aĵoj estantaj?

HERM. Certe eĉ tiuj ĉi.

SOKR. Tial, laŭ ilia naturo plenumiĝas iliaj aktivaĵoj kaj ne laŭ nia opinio. Ekzemple, se ni ekpretiĝas tranĉi iun ajn el la aĵoj estantaj, ĉu ĉiu el ili tranĉeblas kiel ni volas kaj per iu ajn ilo kiun ni volas? Aŭ, se ni volas tranĉi ĉiun aĵon laŭ la naturo de l' tranĉado kaj tranĉiĝado kaj per tiu ilo tiucele jam aranĝita, ĉu ni ne sukcesos ĝin tranĉi kaj al ni ne alvenos io profita kaj ni ne efike realigos nian farindaĵon, dum se, male, ni tranĉos kontraŭnature, ni misos kaj efektivigos nenion?

HERM. Al mi ŝajnas konsentende.

SOKR. Tial, plue se ni pretus bruligi iun ajn aĵon, ĉu oni devas ĝin bruligi ne laŭ ĉiu ajn elekto, sed nur laŭ tiu taŭga? Kaj ĉu tiu ne rilatas al la jam antaŭestablita maniero de bruliĝado por unuopa estaĵo kaj al la efektiva bruligado kaj al la ilo por tio jam aranĝita?

HERM. Ĝuste tias.

SOKR. Kaj ĉu ne estas tiel ankaŭ rilate aliajn aĵojn?

HERM. Certe.

Ĉapitro VI

SOKR. Kaj ĉu do ankaŭ la 'diri' ne estas unu el la agoj?

HERM. Jes.

SOKR. Tial, ĉu iu korekte diras se li tion farus laŭ la maniero kiu al li ŝajnas ĝusta por diri, aŭ, se li dirus laŭ la maniero jam establita la diro pri la aĵoj kaj la diriĝo kaj la ilo, nur tiam li alvenos al io bona kaj diros, dum malsammaniere li misos kaj atingos nenion?

HERM. Al mi ŝajnas tiel kiel vi diras.

SOKR. Kaj, do, ĉu ero de ‘diri’ ne estas nomi? Fakte okazas ke kunigante diversajn nomojn¹⁰ iumaniere oni eldiras la paroladojn.

HERM. Evidente.

SOKR. Do, ankaŭ nomdoni estas ago, se ankaŭ diri estis ago koncernanta la aĵojn.

HERM. Jes.

SOKR. Sed ĉu la agoj al ni ne ŝajnis konsistaj pro sia rilato al ni, sed havantaj el si mem sian apartan esencon?

HERM. Tiel estas.

SOKR. Kaj, tial, ĉu oni ne devas nomi laŭ la maniero jam pretigita por la nomado pri la aĵoj kaj nomiĝado kaj por la ilo, sed ne laŭ maniero niavole elektita de ni, se ĉiu kazo devas akordiĝi kun tio antaŭe dirita? kaj tiel ni atingus ion bonan kaj nomus, alimaniere ne?

HERM. Al mi tiel manifestiĝas.

Ĉapitro VII

SOKR. Ek, do: tio kion ni bezonas tranĉi, ĉu ne estas tranĉenda, ni diras, per io?

¹⁰ Certe ĉi-punte estas jam komprenite ke sub la vorto ‘nomo’ estas ampleksata ĉiu speco de vortoj, nome substantivoj verboj adverboj ktp: ĉio sume per kio estas aranĝita la homa parolado.

HERM. Jes.

SOKR. Kaj tio kion ni bezonas teksu, ĉu ne estas teksenda per io?
Kaj tio kion necesas bori, ĉu ne estas borenda per io?

HERM. Certe.

SOKR. Kaj fine, kion ni bezonas nomi, ĉu tio ne estas nomenda per io?

HERM. Tiel estas.

SOKR. Kaj kio estas tio per kiu oni boru?

HERM. La borilo.

SOKR. Kaj tio per kiu oni teksu?

HERM. La glitbobeno

SOKR. Kaj tio per kiu oni nomu?

HERM. La nomo.

SOKR. Vi prave diras. Tial ankaŭ la nomo estas ilo.

HERM. Jes.

SOKR. Tial se nun mi demandus: “Kia ilo estas la glitbobeno?”. Ĉu ne tiu per kiu ni teksas?

HERM. Jes.

SOKR. Kaj, teksante, kion ni faras? Ĉu ni ne distingas la vefton kaj varpon malgraŭ ilia kunstaro?

HERM. Jes.

SOKR. Kaj, do, ĉu vi sukcesos paroli sammaniere ankaŭ rilate la borilon kaj la aliajn objektojn?

HERM. Certe.

SOKR. Kaj ĉu vi sukcesas paroli sammaniere ankaŭ rilate la nomon? Kion ni faras kiam ni nomas per la ilo kiu estas la nomo?

HERM. Mi ne sukcesas tion precizigi.

SOKR. Ek! Ĉu ni [per ĝi] ne instruas ion reciproke kaj ni ne distingas la aĵojn laŭ ilia stato?

HERM. Sendube.

Ĉapitro VIII

SOKR. Ĉu la nomo, tial, estas instrumento taŭga por instrui ion kaj distingi la esencon, same kiel la glitbobeno teksaĵon¹¹?

HERM. Jes.

SOKR. Kaj ĉu siavice la glitbobeno ne estas ilo por teksti?

HERM. Kiel ne?

SOKR. Kaj tial taŭgulo por teksti uzas ‘bone’ la glitbobenon, kie ‘bone’ signifas laŭ tekso-arto, dum kapablulo instrui uzas efike la nomon, kie ‘bone’ signifas laŭ instrua maniero.

HERM. Jesende.

SOKR. Je kies helpo la teksisto devas ‘bone’ sin servi kiam mem uzas la glitbobenon?

HERM. Je tiu de lignaĵisto.

SOKR. Sed ĉu lignaĵisto estas kiu ajn aŭ nur kiu posedas tiun arton?

HERM. Kiu [posedas] tiun arton.

SOKR. Kaj boristo je kies produkto ‘bone’ sin servu kiam li uzos la borilon?

HERM. Je tiu de forĝisto.

SOKR. Ĉu forĝisto estas kiu ajn aŭ nur la posedanto de tiu arto?

HERM. La posedanto de tiu arto.

¹¹ Oni vidu la analogion inter nomi kaj teksti: la nomo estas instrumento por ordigi kaj distingi malsamaĵojn kaj krei rilatojn sammaniere kiel teksaĵo estas io ordigita tra diversaĵoj. Tiu koncepto trovas sian plejpravigan konfirmon ĉe diversaj kulturoj kiuj sugestis analogion inter parolarto kaj teksarto.

SOKR. Bone. Kaj instruisto, kiam uzas la nomon, per l' arto de kiu sin servu?

HERM. Eĉ tion mi ne scias.

SOKR. Ĉu eĉ pri jeno vi ne scias respondi: kiu al ni transdonas la nomojn kiujn ni uzas?

HERM. Evidente ne.

SOKR. Ĉu al vi ne ŝajnas ke estas la leĝo¹² kiu ilin al ni transdonas?

HERM. Tio versimilas.

SOKR. Tial, kiam la instruisto uzas la nomon, ĉu li ne uzos la elpensaĵojn de la leĝfaristo?

HERM. Tiel al mi ŝajnas.

SOKR. Sed ĉu al vi ŝajnas ke kiu ajn estas leĝfaristo aŭ nur kiu posedas tiun arton?

HERM. La posedanto de tiu arto.

SOKR. Do ne estas propre de ĉiu ajn homo asigni nomojn, Hermogeno, sed de kelka nomfaranto. Kaj tia estas, laŭ onia opinio, la leĝfaristo, kiu vere estas la plej malofta el la artfarantoj inter la homoj.

HERM. Tio probablas.

Ĉapitro IX

SOKR. Nu bone, konsideru kion priatentas leĝfaristo kiam asignas la nomojn: kaj deduktu el la kazoj proponitaj antaŭe: kion priatentante, la lignaĵisto aranĝas glitbobenon? Ĉu ne, eble, ion kio sianature estas jam taŭgigita por teksado?

¹² Leĝo kaj leĝfaristo pli ol precizan koncepton aŭ personon indikas komencantaron kiu sekve fariĝas tradicio; sed tiu kategorio estas komparata al profesia metiisto. Sed kio okazas se al tiu 'leĝa' nomanto deficietas kompetento? La respondo ĉe la fino.

HERM. Nedubinde.

SOKR. Kio do (sekvas)? Se al li rompiĝas la glitbobeno dum li ĝin konstruas, ĉu li konstruos alian rigardante la rompiĝintan, aŭ prefere tiun ideon, kiun rigardinte, li jam estis kontruanta la glitbobenon rompiĝintan?

HERM. Tiun ĉi, al mi ŝajnas.

SOKR. Kaj ĉu tiun ĉi ni povas tutprave nomi ‘kio mem estas la glitbobeno en si mem’?¹³

HERM. Tiel ŝajnas.

SOKR. Nu, kiam oni devas konstrui glitbobenojn por vestaĵoj leĝeraj aŭ tiun por malleĝeraj aŭ linteksaĵoj aŭ lanteksaĵoj aŭ ĉiualispecaj, ĉu ne necesas unufanke ke ĉiuj glitbobenoj konstruiĝu laŭ la ideo de glitbobeno, kaj aliflanke ĉu ne necesas doti ĉiun konkretan plenumaĵon [nome ĉiu konstruiĝanta glitbobeno] per tiu modelo, jam aranĝita kiel plej taŭga por ĉiu aparta tasko?

HERM. Evidente.

SOKR. Kaj ankaŭ por aliaj instrumentoj samaferas: necesas, fakte, ke kiu elpensas instrumenton sianature jam adaptitan al ĉiu aparta ellaboraĵo, ĝin transversu en tiun materion per kiu li ĝin konstruas, ne en kiun ajn laŭ sia volo, sed en tiun kiu estas al tio jam antaŭdotita. Tiel, la borilo, el sia naturo taŭga por ĉiu laboro, kiel kompreneble, postulas esti laŭcele funkciigita sur la feron.

HERM. Kompreneble.

SOKR. Kaj la glitbobeno jam antaŭaranĝita sianature por ĉiu plenumaĵo, en la lignon.

HERM. Tiel estas.

¹³ Platono ekenirigas tiun kiu estos, en pli maturaj tempoj, sia batala ĉevalo: la teorio de la ideoj kiuj el Hiperurano signas ĉiun aĵon estantan. La aludo fariĝos pli eksplicita ĉe la fino.

SOKR. Fakte, unuopa glitbobeno, kiel opinieblas, el sia natura, taŭgas por ĉiu tipo de teksaĵo, kaj tiel la aliaj instrumentoj.

HERM. Certe.

SOKR. Kaj tial, plejbonulo, ankaŭ la nomon, kiu el sia naturo disponebla al ĉiu uzado, tiu leĝofaristo devas kapabliĝi ĝin stampi en la sonojn kaj silabojn kaj, rigardante al tio ‘kio mem estas la nomo en si mem’, elpensi kaj asigni ĉiujn nomojn, se li devas esti iu kiu aŭtoritatece donas la nomojn, ĉu ne? Kaj se poste la diversaj leĝofaristoj ĝin transverŝas ne en la samajn silabojn, tio ne devas esti neagnoskita. Eĉ ne, fakte, la diversaj forĝistoj transmetas en la saman feron, kvankam produktante per la sama laboro la saman instrumenton, tion li konstruas en la sama fero; sed same, kondiĉe ke li transdonu la saman ideon, kvankam en alian feron, same la instrumento samkorekte estiĝas, malgraŭ ĝin oni konstruu ĉi tie aŭ ĉe la barbaroj. Ĉu ne estas tiel?

HERM. Sendube.

SOKR. Kaj tial sammaniere vi taksu la leĝfariston, tiun ĉi-tiejan kaj tiun ĉe la barbaroj: kondiĉe ke li transverŝu la ideon de la nomo konvena al ĉiu uzado en silabojn kiujn ajn, li ne estos leĝofaristo neniel malpli malplibona, la ĉi-tiea aŭ tiu de kiu ajn loko.

HERM. Certe.

Ĉapitro X

SOKR. Sed kiu estas kiu scios ĉu la konvena glitbobena ideo subkuŝas en iu okaza ligno? Ĉu kiu ĝin konstruis, la lignaĵisto, aŭ kiu ĝin uzos, la teksisto?

HERM. Pliprobable, ho Sokrato, kiu ĝin uzos.

SOKR. Kaj kiu do profitu la produktaĵon de la konstruanto de liroj? Ĉu ne kiu kapablas bonrezulte direkti la faradan agon de tiu kiu konstruas kaj scias sperti ĉu la konstruita objekto estis farita laŭarte aŭ ne?

HERM. Konsentite.

SOKR. Kaj kiu estas tiu?

HERM. La citrludisto.

SOKR. Kaj kiu profitos la produktaĵon de la ŝipkonstruisto?

HERM. Ŝipgvidisto.

SOKR. Kaj kiu povus pli kompetente direkti la farenadaĵon de la leĝfaristo kaj prave taksi la faritaĵon, ĉi tie kiel inter la barbaroj? Ĉu ne ol kiu ĝin uzos?

HERM. Jes.

SOKR. Kaj ĉu tia ne estas, tial, kiu kapablas demandi?

HERM. Tio certas.

SOKR. Kaj kiu scias ankaŭ respondi?

HERM. Jes.

SOKR. Kaj la kapablulon en demandado kaj respondado ĉu vi difinus 'dialektikulo' aŭ ĉu laŭ kiu alia maniero?

HERM. Ne tiun ĉi, sed tiun!.

SOKR. Ĉu laboro de lignaĵisto ne konsistas en la konstruado de rudro sub la direkto de ŝipgvidisto, se la rudro devas esti efika?

HERM. Sajnas.

SOKR. Kaj certe tiu de la leĝfaristo, kiel intuicieblas, konsistas en konstruado de la nomo, havante kiel gvidisto dialektikulon, se li volos adekvate doni la nomojn.

HERM. Tiel estas.

SOKR. Konjektendas do, ho Hermogeno, ke ne malgravas la tasko asigni la nomon, kiel opinias vi, nek afero por etmensaj homoj aŭ ordinaruloj. Kaj prave diras Kratilo asertante, ke la estaĵoj havas la nomojn el la naturo, kaj ke ne ĉiuj estas laŭartaj kreintoj de nomoj, sed nur kiu atente konsideras la nomon kiun laŭnature havas ĉiu objekto, kaj kapablas transverŝi ties ideon kaj en la literojn kaj en la silabojn.

HERM. Mi ne scias, ho Sokrato, kiel oni povus kontraŭi kion vi diras. Ĉiukaze, eble, ne facilas lasi sin konvinki pri tio ĉi tie surmomente, sed mi opinias ke mi estus plie konsentema kun vi jenamaniere, tio estas se vi kondukus jene: nome se vi sciigus al mi kiun vi diras esti la laŭnatura adekvateco de la nomo¹⁴.

SOKR. Sed mi, kara Hermogeno, mi je tiaĵoj asertas nenion, kaj certe vi forgesis kion mi diris ĵus antaŭe, tio estas ke mi nenion scias sed ke mi ne sciis kaj estus pripensanta kune kun vi. Kaj nun al ni, al mi kaj al vi, kiuj estas priserĉantaj, montriĝas laŭ maniero tre malsama ol antaŭe, ke la nomo estas provizita je kelka laŭnatura adekvateco kaj ke ne estas propra al ĉiu homo la kompetento asigni - adekvate - la nomojn; aŭ ĉu ne?

HERM. Evidente.

Ĉapitro XI

SOKR. Tial, necesas priserĉi la konsekvencojn de tio, se vi tion deziras prilumiĝi pri kia estas tiu ĝia adekvateco.

HERM. Sed certe mi deziras tion scii.

SOKR. Priserĉu, do!

¹⁴ Hermogeno kredas ke Sokrato estas amikiĝanta kun la tezo de Kratilo. Sed temas nur pri dialoga eskapilo, ĉar la fina konkludo kontraŭas ankaŭ Kratilon.

HERM. Sed kiamaniere oni esploru?

SOKR. La plej profitiga el la esploroj, amiko, estas kiu utiligas tiujn kiuj pri ĝi kompetentas, ilin kompensante per mono kaj akirante de ili ankaŭ laŭdajn favorojn. Kaj tiaj estas la sofistoj, danke al kiuj ankaŭ via frato Kaliaso, per elspezo de multe da mono, famas kiel sciiginto. Kaj ĉar vi ne ĝuas la patrajn bonaĵojn, vi devas lin sekvi de proksime kaj lin preĝpeti por ke li vin instruu pri la korekteco en tiaĵoj, kiun mem lernis ĉe Protagoro.

HERM. Estus eksterkonvena mia peto, ho Sokrato, se, dum mi unuflanke tute rifuzas la ‘veron’ de Protagoro, aliflanke mi kontente akceptus kiel indajn je iu ajn estimo la deduktaĵojn el tiu ‘vero’.

SOKR. Sed se eĉ tio vin ne kontentigas, necesas lerni de Homero kaj de aliaj poetoj.

HERM. Kaj kion diras Homero, ho Sokrato, rilate la nomojn kaj kie?

SOKR. En multaj lokoj, sed la plej belajn kaj gravajn allasojn li asertas en tiuj pasaĵoj en kiuj li distingas la nomojn kiuj al la samaj objektoj asignas la homoj kaj la dioj. Aŭ ĉu vi ne opinias ke en tiuj lokoj li diras ion grandan kaj miran pri la adekvateco de la nomoj¹⁵? Sendube klaras fakte ke la dioj, rilate la adekvatecon de la nomoj, uzas ĝuste tiujn kiuj laŭnature estas nomoj. Aŭ ĉu tion vi ne kredas?

HERM. Mi bone scias, ke se hazarde la dioj alvokas, ilin alvokas adekvate. Sed kiuj estas tiuj nomoj kiujn vi aludas?

¹⁵ Oni ne forgesu ke dum la tuta svarmo de etimologioj (ĉirkaŭ 140), Sokrato ne rezignas sian kutiman ironion: fakte, ili ofte montras nenion aŭ eble la malon, ĉiam por devigi akcepti ke la nomoj ne ĉiam estas tute konvenciaj, kiel Hermogeno subtenas. Li, tute kaprice, foje aldonas foje malaldonas vortajn elementojn. Nur unu dudeko, el 140, estas konfirmitaj de la aktuala lingvisma scienco.

SOKR. Ĉu vi ne scias, do, ke pri la rivero en Trojo, kiu duelis kun E-festo, li diras: “*Ξάντος* (Ksantos)¹⁶ ĝin nomas la dioj kaj la homoj *Σκαμάνδριος* (Skamandro)”?

HERM. Mi jes.

SOKR. Nu, ĉu vi ne opinias ke estas estiminda afero tiu oportuno scii kiel ĝi adekvate nomiĝas Ksanto anstataŭ Skamandro? Kaj, se, plue, vi volas, rilate la birdon, pri kiu li¹⁷ diras ke “*χάλκις* nomas la dioj sed *κὺμινδης* la homoj”, ĉu vi opinias ke malgravus alpreni la kvanton je kiu estas pli adekvate ke la sama birdo estu nomata *χάλκις* prefere ol *κὺμινδης*? Kaj krome *Βαττεία* kaj *Μυρῖνε*¹⁸ kaj aliaj en tiu poeto kaj en aliaj? Sed eble tiaĵoj estas pli grandaj ol kiel kaj mi kaj vi povas mal-kovri: male rilate *Σκαμάνδριος* kaj *Αστύναξ*, kiuj estas laŭliadire nomoj de la filo de Ektoro, estas afero pli homnivela, laŭŝajne ĉe mi, kaj pli facile eksplorable, kiu ajn estu, laŭ lia diro, ilia adekvateco. Sendube vi konas la versojn en kiu troviĝas tio kion mi diras.

HERM. Certe.

SOKR. Nu, kiun el tiuj du nomoj, laŭ via opinio, Homero juĝas pli adekvate asignata al la infano? ĉu *Σκαμάνδριος* aŭ *Αστύναξ* (Skamandro aŭ Astianakso)?

HERM. Mi ne scias kion diri.

Ĉapitro XII

SOKR. Nu prikonsideru tion: se iu enketus ĉe vi tiel: “kiuj, laŭ via opinio, atribuas pli adekvate la nomojn? ĉu la uloj pli inteligentaj aŭ la uloj malpli inteligentaj?”

HERM. Kompreneble, la uloj pli inteligentaj, mi respondus.

¹⁶ La rondaj krampoj post la grekgrafia vorto entenas la saman esperantigitan.

¹⁷ Nome Homero.

¹⁸ Monteto najbare de Trojo.

SOKR. Kaj, do, ĉu al vi ŝajnas ke en la urboj estas pli inteligentaj la viroj aŭ la virinoj, se paroli ĝenerale?

HERM. La viroj.

SOKR. Vi scias ke Homero diras ke la filo de Ektoro estis nomata *Ἀστυάναξ* (Astianakso) ĉe la Trojaj viroj. Ĉu ne klaras, tial, ke *Σκαμάνδριος* (Skamandro) estis nomata ĉe la virinoj, se konsideri ke la viroj lin nomis *Ἀστυάναξ* (Astianakso)?

HERM. Tio versimilas, certe.

SOKR. Kaj ĉu ke ankaŭ Homero pritaksis la virojn de Trojo pli inteligentaj ol la ties virinoj?

HERM. Mi opinias ke jes.

SOKR. Ĉu, do, li opiniis ke estis asignita, al la infano, *Ἀστυάναξ* pli adekvate ol *Σκαμάνδριος*?

HERM. Ŝajnas tiel.

SOKR. Nu ni provu do malkovri la kialon. Ĉu li mem ne liveras al ni tre validan kialon? Li diras fakte: “sole li defendis por ili la urbon kaj la longajn muregojn”. Pro tio, kompreneble, adekvatas nomi la filon de la savanto *Ἀστυάναξ*, tio estas ‘sinjoro de la urbo’, kiun lia patro defendadis, kiel diras Homero.

HERM. Al mi montriĝas tiel.

SOKR. Kaj kial tio? Mi mem, se sincerece diri, ankoraŭ tion ne komprenas; ĉu vi, male, Hermogeno, tion komprenas?

HERM. Je Zeŭso, mi ne!

SOKR. Sed, amiko mia, ĉu eĉ al *Ἕκτορ* (Hektoro) la nomon ne asignis Homero mem?

HERM. Kiel?

SOKR. Ĉar al mi ŝajnas ke ankaŭ tiu nomo similas en io al *Ἀστυάναξ*, kaj ili estas verŝajne helenaj nomoj. Fakte, *ἀναξ* (sinjoro) kaj *Ἕκ-*

τορ (kiu tenas energie) proksimume signifas ambaŭ la samon kaj ambaŭ estas reĝaj nomoj: fakte, rilate kion unu estas ἀναξ rilate tion li certe estas ankaŭ Ἴκτωρ; klaras fakte, ke li ĝin plene dominas, nome ĝin κέκτῃται (posedas) kaj ĝin ἔχει (tenas). Aŭ ĉu al vi ŝajnas ke mi estas diranta neniaĵon kaj, male, senkonscie, estas imaganta alkroĉiĝi al io kvazaŭ al senkonsistaĵo de la opinio de Homero rilate la adekvatecon de la nomoj?

HERM. Je Zeŭso, certe vi ne, laŭ kio al mi ŝajnas; male, eble vi estas alkroĉiĝanta al konsistaĵo.

Ĉapitro XIII

SOKR. Absolute adekvatas, kiel al mi ŝajnas, nomi ‘leono’ la naskiton el leono kaj ĉevalo la naskiton el ĉevalo; kaj mi ne aludas al la kazo en kiu el ĉevalo naskiĝas, kiel monstro, io malsama ol ĉevalo, sed al la kazo en kiu la naskito apartenas al specio laŭ ties laŭnaturo: se ĉevalo kontraŭnature generas bovidon kiu laŭnature estas ido de bovbesto, oni ne devas ĝin klasi ĉevalido, sed bovido. Kaj eĉ ne, mi kredas, se el homo naskiĝas ne homido, la naskito devas esti klasata homo; kaj tio sammaniere eĉ rilate arbojn kaj ĉiujn aliajn estaĵojn. Aŭ ĉu ne ŝajnas tiel ankaŭ al vi?

HERM. Tielas ankaŭ por mi.

SOKR. Vi bone asertas; sed zorgu ke vi ne lasu vin trompi far mi: fakte, spurante la saman rezonadon, ankaŭ iu ajn naskito el reĝo rajtus esti nomata reĝo; ke se, poste, la nomo signifas la samon per tiuj ĉi aŭ aliaj silaboj, tio ne gravas; kaj eĉ ne se oni aldonas aŭ malaldonas literon, eĉ ne tio gravas, kondiĉe ke dominanta estu la esenco de la aĵo montrata en la nomo.

HERM. Kion vi diras?

SOKR. Nenio komplika: okazas same kiel por la elementoj¹⁹. Kiel vi scias ke ni pri ili eldiras nomojn kiuj ne estas la samaj elementoj, escepte de kvar: la *E*, la *Y*, la *O*, la *Ω*; koncerne aliajn elementojn, voĉajn aŭ senvoĉajn, vi scias ke ni eldiras aliajn literojn de ni aldonitajn, konstruante tiel iliajn nomojn; sed estas korekte nomi per tiu nomo kion ĝi al ni montras, kondiĉe ke ni en ĝi sentigas klara la forton²⁰. Ni prenu, ekzemple, *βῆτα*: vi vidu, ke per la aldono de *ῆτα*, de *ταῦ* kaj de *ἄλφα* ĝi estis neniel damaĝata ĝispunkte ke ĝi ne montru per la intera nomo la naturon de tiu elemento kiun la leĝofaristo intencis montri; tiel bone li kapablis doni la nomojn al la literoj.

HERM. Al mi ŝajnas ke vi diras la veron.

SOKR. Ĉu la sama preparolo por la reĝo? Fakte, reĝo el reĝo, kaj bono el bono, kaj belo el belo, kaj tiel por ĉiuj aliaj estaĵoj, el ĉiu individuo de iu specio alia naskito samspecia kondiĉe ke ne naskiĝas monstro: tial ili devas esti nomataj per la samaj nomoj. Eblas tamen ĉiukaze varii en la silaboj, tiel ke povas ŝajni al nespertulo ke estas malsamaj inter si nomoj kiuj fakte samas; same kiel al ni la kuraciloj de la kuracistoj, variantaj en la koloroj kaj odoroj, ŝajnas malsamaj dum ili, male, estas la samaj, kaj fakte al la kuracisto, ĉar li konsideras la efikon de la kuraciloj kaj ne sin lasas trompi per la eksteraj aldonaĵoj, ili taksiĝas samaj. Kaj tiel, probable, ankaŭ kiu kompetentas pri nomoj konsideras ilian forton kaj ne sin lasas devii se iu litero estas aldonita aŭ delokita aŭ

¹⁹ Nome literoj.

²⁰ Nome fonetika. Helpas la komprenadon, aŭ malpli miskomprenadon, scii, ke la ideo ke la alfabeto estas ne nur instrumento por la nomado sed ankaŭ aranĝilo por kontroli la realon kaj interveni sur ĝin, estis komuna konvinko en la antaŭsokrata mondkoncepto. La vorto apartenas, antaŭĉio, al la aĵo kaj diri signifas elvoki, neniam estas io indifera por la fakta sfero.

forstrekitaj, aŭ se en literoj tute malsamaj plueblas la forto de la nomo. Samkiel ni diris ĵus antaŭe: *Ἀστὺνάναξ* kaj *Ἐκτωρ* ne prezentas iun ajn literon samsonan escepte de la *ταῦ*, kaj tamen ili sencigas la samon. Kaj ankaŭ *Ἀρχέπολις* (‘reganto de la urbo’) kiujn literojn prezentas komunaj kun la antaŭaj? Tamen ĝi sencigas la samon; kaj troviĝas pluraj aliaj nomoj kiuj signifas nenion alian ol reĝon, kaj aliaj, siavice, strategon, kiel ekzemple *ἄγις* (kondotiero), *πολεμαρχος* (milita ĉefo) kaj *εὐπόλεμος* (sperta batalanto). Kaj plue aliaj nomoj havas kuracistajn signifojn kiaj *ιατροκλῆς* (fama kuracisto) kaj *ακεσίμβροτος* (resaniganto de mortemuloj); kaj eble multajn aliajn ni povas trovi kiuj aŭdiĝas diverssone en la silaboj kaj literoj, sed kiuj per sia esprima kapablo komunikas la saman koncepton. Ĉu same ŝajnas ankaŭ al vi, aŭ ne?

HERM. Jes, sendube.

Ĉapitro XIV

SOKR. Tial ĉu al la estaĵoj laŭnature naskiĝintaj necesas atribui la samajn nomojn?

HERM. Certe.

SOKR. Kaj kion al tiuj ne laŭnaturaj, kiuj naskiĝas laŭforme de monstroj? Ekzemple, kiam el viro bona kaj pia originas malpiulo, ĉu tio ne similas la supre menciitajn kazojn, kie se ĉevalo generas bovinan idon, ĉu tiu ĉi ne devis certe ricevi la nomon de la generanto, sed tiun de la specio al kiu ĝi apartenas?

HERM. Estas tiel.

SOKR. Kaj ĉu ankaŭ al malpiulo generita de piulo necesas, tial, doni la nomon de sia specio?

HERM. Tiel estas.

SOKR. Ne *Θεόφιλον* (amikon de la dio) nek *Μνησίθεον* (memorulon pri la dioj), nek alian similan, sed iun kiu signifu la kontraŭon de tiuj, se ĝuste al la nomoj apartenu adekvateco.

HERM. Nenio pli certa, ho Sokrato.

SOKR. Tiel plue povas esti ke statas laŭ adekvata maniero, Hermogeno, la nomo *Ὀρέστης* (Oresto), ĉu se al li ĝin atribuis la kazo ĉu la poeto, por rimarkigi per la nomo la aspekton bestan, sovaĝan kaj *ὄρεινόν* (montara) de lia karaktero.

HERM. Tiel ŝajnas, ho Sokrato.

SOKR. Kaj krome versimilas ke ankaŭ lia patro havis nomon laŭnaturan

HERM. Tio ŝajnas.

SOKR. Ŝajnas, fakte, ke *Ἀγαμέμνον* (Agamenono) estis homo tia ke kun granda energio kaj ega persisto aktivis en la entreprenoj je kiuj li kredis, tiujn plenumante ĝisfine per sia virto. Estas certe signo de rezisto kaj persisto lia *μονή* (permanenteco) fronte al Trojo. Ke tiu homo estas *ἀγαστός* (admirinda) pro sia *ἐπιμονή* (superkonstanteco) signifas ĝuste la nomo *Ἀγαμέμνον*. Sed eble ankaŭ *Ἄτρεϋς* (Atreo) adaptas tute adekvate. Kaj vere lia mortigo sur Krisipon kaj tio kruela de li plenumita sur Tieston, estas evidentaj agoj damaĝaj kaj *ἀτηρὰ* (ruinigaj) rilate la virton. Nu, la deveno de la nomo preskaŭ netroveblas kaj restas kaŝita tiel ke ne al ĉiuj ĝi senvualas la naturon de la homo; sed al kutimiĝanto trakti pri la nomoj montras sufiĉe klare kion signifas *Ἄτρεϋς*: fakte surbaze de *ἀτειρής* (necedeblo), kiel surbaze de *ἄτρεστος* (sentima) aŭ *ἀτηρός* (malfeliĉa), ĉiukaze la nomo estas asignata laŭ adekvata maniero. Al mi ŝajnas ke ankaŭ al *Πέλοπς* (Pelopo) la nomo estas aplikata kvazaŭ laŭmezure: tiu ĉi, fakte, signifas “kiu travidas proksimaĵojn” [meritas tian nomiĝon].

HERM. Kaj kiel?

SOKR. Oni diras, se ekzempli, ankaŭ kontraŭ tiu homo ke mortigante Mirtilon li sukcesis nek antaŭvidi nek antaŭsenti iun ajn el la sinsekvaj foraj sekvoj por la tuta sia gento, per kiom da malfeliĉoj tiun li ple-nigintus, ĉar li vidis nur la proksimaĵon kaj tujajon - tio estas *πέλας* (proksime) - kiam li deziregis ĉiukoste edziĝi al Ipodamia. Kaj ankaŭ pri *Τάνταλος* (Tantalo) ĉiu povus opinii, ke la nomo estis asignita adekvate kaj laŭnature, se veras tio kion oni rakontas pri li.

HERM. Kio estas tio?

SOKR. La malfeliĉaĵoj, multaj kaj teruraj, kiuj lin kaptis ankoraŭ dumvive, el tiuj laste la kompleta ruiniĝo de lia patrujo, kaj, postmorte, en Adeso, la *ταλαντεία* (pendado) de la ŝtono sur kapo, surpriza pro la konsonanco kun la nomo: kaj reale ŝajnas kvazaŭ iu, volante al li asigni la nomon *ταλάντατος* (la plej malfeliĉa) lin nomis maskoforme, kaj anstataŭe diris *Τάνταλος*; kaj tiel ankaŭ al li ŝajnas ke la nomon provizis la sorto per kiu li famas. Sed konjekteblas, ke ankaŭ al lia patro, kiu laŭdire estis Zeŭso, la nomo tre adekvate estas apogita, sed malfacilas tion kompreni. Fakte la nomo 'Zeŭso' similas parolon, kies, se dividita en du partojn, unu siautile uzas iuj dum la duan uzas aliaj - unuj fakte lin nomas *Ζῆνα*, aliaj *Δία* -; la du partoj kunigitaj, por formi unuaĵon, montras la naturon de la dio: tio do estas ĝuste tio kion, kiel ni diras, la nomo devas esti kapabla por fari. Fakte ekzistas nek inter ni nek inter la aliaj estuloj iu kiu estas kaŭzo de la *ζῆν* (vivi) pli ol kiu mastras kaj regas ĉiujn aĵojn. Al tiu, tial, okazas esti adekvate nomata kiel la dio *δι' ὃν ζῆ* (pere de kiu la vivo) apartenas al ĉiuj vivantoj; sed, kiel mi diris, la nomo, kvankam unusola, estis dudisigita, en *Δία* kaj en *Ζῆνα*. Kaj ke tiu ĉi estas filo de *Κρόνος* povas ŝajni maldece al tiu kiu

tion aŭdas dirita unuspire, dum prave estas oportune dirate ke *Δία* estas ido de granda *διανοία* (intelekto): fakte ĝi signifas *κόρος* (infano, [aŭ puro]) ne laŭ la senco de infano sed en la senco de *καθαρόν* (puro) kiu troviĝas en li, kaj de *ἀκήρατον τοῦ νοῦ* (integreco de la menso). Kaj li estas filo de *Οὐρανός* (Urano [aŭ Ĉielo]), laŭ onidiro: cetere oportunas ke la kontemplado al la alto estu vortigita per tiu nomo, *οὐρανία* (ĉiela), *ὀρῶσα τὰ ἄνω* (kiu kontemplas la estaĵojn en alto), kaj ĝuste de tie, ho Hermogeno, la *μετεωρολόγοι* (esplorantoj pri ĉielaĵoj) diras ke devenas la *καθαρός νοῦς* (pura menso), kaj ke al la ĉielo estas oportune donita tia nomo. Sed se mi elingigus la genealogion de Heziodo, kiuj laŭ li estis la gepatroj ankoraŭ pli antikvaj ol tiuj, mi ne ĉesus paŝpaŝe montri kiel al ili estis asignitaj adekvate la nomoj, ĝis mi ĝisfunde spertos kion kapablas atingi tiu, jam elĉerpiĝinta aŭ ne, saĝo, kiu ĝuste nun sur min falis tiel senaverte, mi ne scias el kie²¹.

HERM. Kaj ĝuste, ho Sokrato, al mi ŝajnas ke vi, simile al tiuj kiuj estas superekscititaj de la diaĵo, estas aŭguranta.

Ĉapitro XV

SOKR. Kaj por mi, Hermogeno, la precipa responculo de la faliĝo de saĝo sur min estas Eŭtifrono el la loĝantaro de Prospalta: mi restis ĉe li de

²¹ Sokrato ŝajnas voli montri siajn dubojn pri siaj diraĵoj por, certe, la samajn dubojn inokuli en Hermogenon.

Certe, Sokrato ne kredas je tiu hipotezo, kiu nun utilas por enŝteli dubojn ĉu el etimologio eblas ĉerpi instruaĵojn pri la adekvateco inter la nomoj kaj la objektoj. Oni notu, ke se la etimologia serio povas aperi ŝerca, ĝi tamen estas tre serioza ĉar per ĝi estas montrate ke eĉ la supozita antikva saĝo ne helpas al la solvo de la adekvateco de la nomoj kaj, plue, ke tiu “popola-mita” saĝfonto ne jam uzis kritikan dialektikon.

ektagiĝo kaj lin atente aŭskultis. Povas esti, ke li, diallogite kia estas, ne nur plenplenigis al mi la orelojn per sia dia saĝo, sed eĉ ĝin gluis ankaŭ al mia animo. Al mi ŝajnas, do, ke estas bone jene konduiti: por hodiaŭ tiu ĉi eluzi kaj ekzameni la ceteron koncerne la nomojn, morgaŭ, male, se vi konsentas, ni faros pro ĝi ekzorcon kaj nin purigos, kiam ni estus trovintaj kapablulon de tiaĵoj, sendepende ĉu tiu estas iu el la sacerdotoj aŭ iu ajn el la sofistoj.

HERM. Sed mi konsentus ĉar mi volonte aŭskultus la ceteron nediritan pri la nomoj.

SOKR. Tion ni, do, faru. De kie vi volas ke ni komencu esplori, ĉar ni volas sekvi certan kriterion, por malkovri ĉu la nomoj mem al ni atestas ke ĉiu el ili estis neniam asignita hazarde, sed havas sian adekvatecon? Nu, la nomoj kutime uzataj por la herooj kaj homoj eble povas nin trompe altiri: multaj el ili fakte estis donitaj pro eponimio de la prapatroj, kiu en iuj kazoj neniel adaptiĝas, kiel ni diris dekomence. Multaj aliaj estas asignitaj por aŭspicii, kiel al *Εὐτυχίδης* (bonŝanculo), *Σοσίας* (savanto), *Θεόφιλος* (simpatia al la dioj) kaj ankoraŭ multaj. El mi do venas sugesto ke ni devas forlasi tiaspecajn nomojn: versimile ni trovos, prefere, nomojn adekvate asignitajn precipe inter la aĵoj stabile estantaj kaj tiaj antaŭfiksitaj. Opiniendas ke precipe por tiaĵoj estis serioze kribrita la almeto de la nomoj: kaj eble iuj el ili estis altruditaj de povo pli dia ol homa²².

HERM. Al mi ŝajnas ke vi diras laŭbone, ho Sokrato.

²² Certe, Sokrato ne kredas je tiu hipotezo, kiu nun utilas por enŝteli dubojn ĉu el etimologio eblas ĉerpi instruaĵojn pri la adekvateco inter la nomoj kaj la objektoj.

Ĉapitro XVI

SOKR. Ĉu ne justas, do, ke ni komencu el la dioj, esplorante pri la kialo pro kiu ili estis nomataj ĝuste per tiu nomo *θεοὶ*?

HERM. Tio versimilas.

SOKR. Mi ĉi-rilate suspektas tiaĵon: al mi ŝajnas ke la unuaj setlantoj de Helenlando konsideris *θεοὶ* nur kiujn hodiaŭ tiaj konsideras multaj el la barbaroj, nome la suno, la tero, la steloj kaj la ĉielo; kaj ĉar ilin konstatis sin movantaj ĉiuj ĉiam kure kaj *θέοντα* (kurantaj), el tiu fenomeno *θεῖν* (kuri) ili ilin nomis *θεοὶ*. Sekve renkontante, unu post la aliajn, la ceterajn, ankaŭ por tiuj ili aplikis la saman nomon. Ĉu probablas ke trafas la veron tio kion mi estas diranta, aŭ ne?

HERM. Certe, tio sin montras versimila.

SOKR. Kaj kion ni esploru post tio?

HERM. Evidente pri la *δαίμονες*²³ (demonoj).

SOKR. Kaj vere, ho Hermogeno, kion povus enteni la nomo *δαίμονες*? Vidu ĉu mi asertas ion seriozan.

HERM. Sufiĉas ke vi diru!

²³ En la greka religio, tiu vorto estis plenumita por dia potenco kiu ne estis objekto de kulto kaj ne havis figurajn reprezentaĵojn samkiel la aliaj dioj. Troviĝis *δαίμονες* bonaj, “ĝenioj amikaj” kaj “ĝenioj malbonaj”: la koncepto de demono, senvestita je ĉiu antropomorfismo, permesis al Sokrato kaj al aliaj filozofoj eninternigi la nocion pri dia kaj dieca. La “demono” antonomazie estis la diecaĵo kiun oni ne povis kaj ne volis nomi. La posta kulturo procedis laŭ la sama eninternigo, rezervante tiun vokmanieron “demono” al psikaj malbonaj kaj pereigaj fortoj el kiuj iuj estas posedataj kaj pro tio bezonaj je ekzorco. Plimalfrue demonoj prenis la rolon de protektantaj entaĵoj (en Eraklito el Efeso), koincidontaj iamaniere kun tiu de la gardanĝeloj de kristanismo dum la paganaj demonoj subklasiĝis al la defalintaj anĝeloj.

SOKR. Ĉu vi scias kiaj estas la *δαίμονες*, se atenti la paroladojn de Heziodo?

HERM. Ĝi nun ne elmensiĝas.

SOKR. Kaj eĉ ne ke li diras ke estis ora la unua homara generacio?

HERM. Tion, certe, mi scias.

SOKR. Pri ĝi li do diras:

“Sed post kiam tiu generacio, de la *Μοῖρα*²⁴ (Fatalo) estis subterigitaj / sanktaj *δαίμονες*, subteraj ili estas nomataj / bonuloj, ŝirmantoj kontraŭ la malbono, gardantoj de la mortemaj homoj”.

HERM. Kaj kio el tio?

SOKR. Mi opinias ke li epitetis tiun genton ora ne ĉar farita el oro, sed ĉar ‘bona kaj bela’. Cetere por mi, pri tio pruvo estas, ke li diras ke ni estas generacio el fero.

HERM. La veron vi diras.

SOKR. Kaj, do, ĉu vi opinias, ke ankaŭ rilate la niatempulojn, se kelka estas bona, oni dirus pri tiu ke li apartenas al tiu generacio el oro?

HERM. Nedubable.

SOKR. Sed ĉu la bonaj estas io alia ol saĝohavaj?

HERM. Saĝhavaj²⁵.

SOKR. Al mi ŝajnas ke ĝuste tion li intencas per *δαίμονες*: pro tio ke ili estis inteligentaj kaj *δαῖμονες* (spertuloj) epitetis *δαίμονες*, kaj en nia antikva lingvo troviĝas tiu nomo. Tial adekvate diras li kaj same multaj aliaj poetoj, kiuj asertas, ke se mortas homo vere bona, tiu atingas elstaran sorton kaj honoron kaj fariĝas *δαίμων*, ĉerpante la nomiĝon el la raciemo. Sammaniere ankaŭ mi allasas ke ĉiu homo, se

²⁴ *Μοῖρα* = Fatalo. Heziodo, *Ἔργα καὶ Ἡμέραι*, La verkoj kaj la tagoj, 121-23.

²⁵ Ekaperas la fama, sed poste kontrastita, sokrata doktrino, laŭ kiu scio identiĝas kun virto.

reale bona, ĝuste estas *δαιμόνιος* (demona), kaj dumvive kaj postmorte, kaj adekvate estas nomata *δαίμονα*.

HERM. Kaj al mi ŝajnas, ho Sokrato, ke mi estas en plena akordo kun vi pri tio. Sed *ἥρωσ* (heroo) kio estus?

SOKR. Sed tio ne multe malfacilas kompreniĝi: malmulte fakte estas modifita ilia nomo, kiu montras originon el *ἔρωσ* (amo).

HERM. Kiel vi diras?

SOKR. Ĉu vi ne scias ke la *ἥρωες* (herooj) estas duondioj?

HERM. Nu?

SOKR. Ĉiuj, sendube, naskiĝis aŭ el iu *ἐρασθεῖς* (enamiĝinta), aŭ el iu dio enamiĝinta al mortemulino, aŭ el mortemulo enamiĝinta al diino. Se vi konsideras ankaŭ tiun vorton laŭ la antikva atika dialekto, tion vi pliefike eniras: ĝi montros, fakte, ke el la vorto *ἔρωσ*, el kiu naskiĝis la *ἥρωες*, nur malmulte oni deviis celante tiun nomon. Tial, aŭ tion ĝuste signifas la nomo *ἥρωες*, aŭ ke ili estis saĝaj kaj lertegaj *ρήτορες* (retoroj)²⁶ kaj dialektikuloj, ĉar ili estis lertaj en *ἔρωτᾶν* (demandadi); fakte *εἶπειν* signifas diri. Kiel, do, ni ĵus antaŭe diris, la *ἥρωες*, nomitaj laŭ la atika dialekto, taksigās samtempe *ρήτορες* kaj *ἔρωτητικοί* (demandantoj), tiel ke la posteularo de *ἥρωες* fariĝas generacio de retoroj kaj sofistoj. Sed ne tion malfacilas kompreni, malfacilas, male, precipe rilate la nomon ‘homoj’: kial ili estis nomataj *ἄνθρωπο*? ĉu vi tion scias por diri al mi?

²⁶ Ankaŭ por la grekoj, kiel por diversaj kulturoj, la lerteco de parolado partoprenas je la forto de la vorto kiu entenas produktivan energion, kiel, ekzemple, la biblia kreado per la vorto. Ĉi tie retoroj signifas parolkultantoj kaj ankaŭ retorikistoj. Platonon krome kompleze asocias al la herooj la arton de la vorto.

Ĉapitro XVII

HERM. Kiel mi faru por tion scii, karulo? Eĉ se mi kapablas trovi respondon, mi ne engaĝiĝus pri tio ĉar mi certas ke vi ĝin trovos pli lerte ol mi.

SOKR. Vi, do, fidas la inspiron de Eŭtifrono, laŭsignite.

HERM. Evidentas.

SOKR. Kaj oportune vi fidas: ĉar ankaŭ nun al mi ŝajnas esti kompreninta ion kun elstara subtileco, kaj riskos, se mi min atente ne detenu, esti almenaŭ hodiaŭ pli saĝa ol bezonate. Alertiĝu, do, pri tio kion mi diras. Unualoke, fakte, rilate la nomojn nepras konscii pri jeno: ofte ni enŝtelas literojn, aŭ el ili elstrekas, kiam ni kreas nomojn por tio al kio ni volas referenci, kaj ŝanĝas akcentojn. Ekzemple, *Διὶ φίλος* (kara al Zeŭso): por ke ĝi fariĝus nomo anstataŭ lokucio²⁷, ni el ĝi elstrekas la duan *ἰῶτα* kaj eldiras malsuprene anstataŭ suprene la centran silabon. Male, en aliaj kazoj, ni enŝovas literojn kaj eldiras suprene silabojn malsuprenajn.

HERM. Vi diras la veron.

SOKR. Ĝuste unu el tiuj fenomenoj okazis ankaŭ rilate al *ἄνθρωποι* (homoj), se atenti tion kio al mi ŝajnas. Fakte, el lokucio naskiĝis nomo, post kiam oni forstrekis unusolan literon, *ἄλφα*, kaj igis suprena la finan elementon.

HERM. Kion vi diras?

SOKR. Jenon mi diras: tiu nomo, *ἄνθρωπος*, signifas ke, dum la aliaj bestoj pri la aferoj kiujn ili vidas konsideras nenion, nek pripensas, nek *ἀναθρεῖ* (atente observas), *ἄνθρωπος*, male, jam ekvidante kion

²⁷ La sama vorto *ῥήμα* ĉi tie indikas lokucion, aliloke indikos, pli teknike, verbon: ekheloj de lingvistiko.

li vidas - kion ni diras ankaŭ per *ὄπωπε* (estis ekvidanta) - tuj *ἀναθρεῖ* kaj komencas esplori kion li *ὄπωπε* (ekvidis). El tio prave al la homo, unika inter la bestoj, estis asignita la nomo *ἄνθρωπος* ĉar *ἀναθρῶν ἄ* *ὄπωπε* (kiu meditas pri tio kion mem estas vidinta).

HERM. Kio viciĝas post tio? ĉu mi povas vin demandi pri io kion al mi plaĉus scii?

SOKR. Certe.

HERM. Iu afero ŝajnas al mi eksplora tujpost la jam dirita. Fakte, proprajoj de homo ni diras la *ψυχή* (animon) kaj *σῶμα* (korpon).

SOKR. Kaj kiel ne?

HERM. Provu ni, do, ekzameni ankaŭ tiujn ĉi nomojn sammaniere de la antaŭaj.

SOKR. Ĉu vi, do, invitas ekzameni *ψυχή*, kiel ĝi adekvate ricevis tiun nomon, kaj tui post *σῶμα*?

HERM. Jes.

SOKR. Se klarigi tion surmomente, mi opinias ke kiuj atribuis nomon al la *ψυχή* pensis jene, tio estas ke ĝi kiam ĉeestas en la korpo, estas por tiu ĉi la kaŭzo de l' vivo, ĉar al tiu ĉi ĝi provizas la spirokapablon kaj *ἀνα ψῶχον* (restaŭriĝo-kapablon); sed kiam apenaŭ ekseniĝas tiu *ἀνα ψῶχον* (spiro-kapablilo), la korpo kadukiĝas kaj mortas: tial, ĝuste pro tio, al mi ŝajnas ke oni ĝin nomis *ψυχή*. Kaj se vi volas... haltu momentete, ĉar al mi ŝajnas travideti ion kio al la amikoj de Eŭtifrono rezultus pli konvinkiga. La supran eksplikon, fakte, ili, se opinii laŭ ŝajno, malŝatos kaj taksos nerafinita: vidu, do, ĉu la jena plaĉas ankaŭ al vi.

HERM. Sufiĉas ke vi tion diras.

SOKR. La *φύσις* (naturo) de la tuta korpo, tiel farita ke ĝi vivu kaj cirkuladu, kion alian al vi ŝajnas *ἔχειν* (regi) kaj *ὀχεῖν* (kuntreni) ol la *ψυχή*?

HRMOGENO: Nenion alian.

SOKR. Kaj tial? Ĉu vi ne kredas kun Anaksagoro²⁸ ke estas la *νοῦς* (menso) kaj *ψυχή* kiuj ordigas kaj regas ankaŭ la *φύσιν* de ĉiuj aliaj estaĵoj?

HERM. Mi jes.

SOKR. Oportunus, tial, nomi *φυσέχη* tiun potencon kiu *φύσιν ὀχεῖ* καὶ ἔχει (naturon portas kaj regas). Sed, por igi ĝin eleganta, eblas ankaŭ ĝin difini *ψυχή*.

HERM. Sendube, kaj ŝajnas al mi ke tiu ĉi devenigo estas aranĝita pli kredinda ol tiu.

SOKR. Kaj fakte tiel estas; ankaŭ se, laŭvere, ŝajnas ridinda la maniero laŭ kiu estis trudita la nomo donita.

HERM. Sed, ek, kiel ni povas diri la staton de la nomo postvenanta?

SOKR. Ĉu vi aludas al la *σῶμα*?

HERM. Ja, jes.

SOKR. Diversmaniere, laŭvere al mi ŝajnas; kaj se ĝin eĉ iomete oni modifas, ankaŭ multmaniere. Fakte iuj diras, ke ĝi estas *σῆμα* (tombo, sed ankaŭ [signo]) de la animo kvazaŭ en ĝi entombigita dum la nuna vivo; kaj ĉar la *ψυχή* siavice per la korpo *σημαίνει* (signifas) tion kio *σημαίνει* (celas signifi), ankaŭ pro tiu motivo ĝi adekvate nomiĝas *σῆμα*. Tamen, plue, al mi ŝajnas en unualoko la sekvantaro de Orfeo tiuj kiuj altrudis tiun nomon, kvazaŭ la animo punpagante pro tio per kiu ĝuste punpagas, havas, por ke *σώζεται* (sin savu, estu defendata), tiun tegaĵon simila al karcero: de la animo tiu estas, do, kiel estas mem no-

²⁸ Anaksagoro, VI jarcento a.K., unua parolis pri *νοῦς*, la intelekto kiu ĉion ordigas kaj disponas. Nun Sokrato komparas al tiu *νοῦς* la psikon.

mita, τὸ σῶμα (gardejo), ĝis ĝi ne estingu la ŝuldojn. Kaj necesas ŝanĝi eĉ ne unu literon.

Ĉapitro XVIII

HERM. Pri tiuj, ho Sokrato, al mi ŝajnas ke estis esplorite jam laŭ-kontentige; sed pri la nomoj de la dioj, kiel vi ekzemplis ĵus antaŭe rilate Zeŭson, ĉu ni povus sammaniere ekzameni surbaze de kia adekvateco iliaj nomoj estis establitaj?

SOKR. Certe, je Jupitero, ho Hermogeno, niakonforte, se ni iom inteligentas, ni disponas je unusola vojo, la plej efika: allasi, tio estas, ke pri la dioj ni nenion scias, nek pri ili, nek pri iliaj nomoj per kiuj ili mem sin nomus: klaras fakte, ke ili sin nomas per nomoj vere adekvataj! Estas ankaŭ dua formo de adekvateco: ilin nomi ankaŭ ni laŭ nia normo ilin alvoki en la preĝoj, “kiuj ajn ili estus kaj sendepende de ilia preferata nomiĝo, pro tio ke plion ni ne scias²⁹”: tio al mi ŝajnas bona normo. Se vi volas, do, ni faru tiun esploron, sed kvazaŭ antaŭallasante al la dioj, ke ni ne intencas priserĉi ion ajn pri ili - ĉar ni estimas nin nekapablaj tion esplori - sed ni priserĉas rilate la homojn, pro kiu opiniaro ili donis al ili la nomojn. Tio, fakte, ne estas sinteno ekscitanta indignon.

HERM. Mi havas certecon, ho Sokrato, ke vi parolas laŭjuste, kaj do ni tiel faru.

SOKR. Kun kiu alia nomo se ne el tiu de Ἑστία komenci, kiel oni kutimas?

HERM. Justege.

SOKR. Kaj kion oni dirus ke pensis tiu kiu asignis la nomon al Ἑστία, ŝin eknomante?

²⁹ Estas tezo de Protagoro, nemalakceptata laŭŝajne de Sokrato.

HERM. Je Zeŭso, eĉ tion mi opinias ne facila.

SOKR. Certe probable, mia kara Hermogeno, ke la unuaj atribuan-toj de nomoj ne estus malkapabluloj, sed *μετεωρολόγοι* (metereologoj)³⁰ kaj sagacaj parolantoj.

HERM. Kial?

SOKR. Al mi ŝajnas evidente ke la almeto de nomoj estis verko de tiuspecaj homoj, kaj se iu konsiderus la fremdajn nomojn, tiu samkonstate malkovrus kion ĉiu el ili intencas komuniki. Ekzemple, ankaŭ en la kazo rilate kion ni nomas *οὐσία* (esenco), estas kiuj ĝin nomas *ἔσσία* kaj aliaj siavice *ὠσία*. Unualoke, surbaze de la dua el tiuj nomoj okazas, laŭprave, ke la *οὐσία* (esenco, substanco) de la estaĵoj nomiĝu *Ἔστία*, kaj ĉar vere eĉ ni diras *ἔστιν* (estas) kio partoprenas je la *οὐσία*, ankaŭ pro tio ni povas ŝin adekvate nomi *Ἔστία*. Ŝajnas fakte ke ankaŭ ni, antikvtempe, difinis *ἔσσία* la *οὐσίαν*. Kaj plie, se oni konsiderus ankaŭ la oferajn ritojn, oni rajtus opinii, ke tiel pensis kiuj asignis la nomojn: la fakto ke oni komencas oferi antaŭĉio al *Hestia* antaŭ ol al la ceteraj dioj estas propre, fakte, de tiuj kiuj difinis *ἔσσία* la *οὐσίαν* de ĉiuj estaĵoj. Kiuj, siavice, sin servis je *ὠσία*, versimile ankaŭ tiuj ĉi, proksimume kiel Heraklito, estis konstatintaj ke ĉiuj aĵoj estantaj estas ĉiam tramove dum nenio restas senmove; kaj ke, pro tio, tial, la kaŭzo kaj gvido de ilia persisto estas la *ᾠθοῦν* (kio puŝas): el tio ĝuste sekvas ke al ĝi estis donita la nomo *ὠσία*. Sed ĉio tio estu dirata samkiel dirus personoj kiuj nenion scias. Ĉi-punkte, post pri *Ἔστία*, prefereblas ekexplori pri *Ῥέα* kaj *Κρόνος*. Tamen pri la nomo de *Κρόνος* ni jam sufiĉe ekzamenis. Eble nenion pri ĝi mi diras!

³⁰ *Μετεωρολόγοι*: esplorantoj de ĉielaj eventaĵoj, nome astronomiistoj kaj, do, subtilpensantoj.

Ĉapitro XIX.

HERM. Kial, ho Sokrato?

SOKR. Karulo, en mia menso amasiĝas svarmo de saĝeco.

HEROMOGENO: Kaj kiel estas tio?

SOKR. Io multe ridinda se vorte esprimenda, tamen mi opinias ke ĝi havas ian kredeblecon.

HERM. Kian?

SOKR. Mi imagas travidi Herakliton eldiranta antikvajn saĝaĵojn, eĉ ĉerpeblajn el la epoko de *Κρόνος* kaj *Ψέα*, pri kiuj jam parolis Homero.

HERM. Kiel vi diras?

SOKR. Diras Heraklito: “ĉio moviĝas kaj nenio restas la sama” kaj, similigante la aĵojn estantajn al fluo de rivero, diras: “vi ne povas eniri dufoje la saman riveron”.

HERM. Klare tias ĉio.

SOKR. Kaj tial? Ĉu vi konjektas ke opiniis malsame ol Heraklito kiu nome difinis la gepatrojn de aliaj dioj, *Ψέα* kaj *Κρόνος*? Ĉu vi opinias, ke li hazarde altrudis al ambaŭ nomojn *ῥέυματα*³¹ (kurantaj)? Same kiel siavice Homero diras “Oceanon genezo de dioj” kaj “patrino” *Τηθὺς*. Kaj tiel ankaŭ Heziodo, laŭ mi. Kaj eĉ Orfeo kelkeloke diras:

“Unua Oceano *καλλιρροος* (belflua) nuptis,
li kiu edziĝis al fratino de sia patrino, *Τηθὺς*”.

Pripensu, do, kiel tiuj atestoj akordiĝas inter si kaj konfluemas al ĉiuj teorioj de Heraklito.

HERM. Io valida al mi ŝajnas tio kion vi diras, ho Sokrato. Tamen mi ne komprenas kion signifas la nomo *Τηθὺς*.

³¹ Etimologie *ῥέυματα* tradukeblas ‘riveroj’, sed la metaforeco ne estus tuj evidenta por legantoj niatempaj.

SOKR. Sed vere malmulte mankas ke tion ne diru el si la nomo mem, kiu kaŝmaniere estas nomo de fonto. Fakte la *διαττώμενον* (kio filtriĝas) kaj *ἡθούμενον* (kio gutetas) estas bildoj de fonto: kaj el ambaŭ tiuj nomoj estas kombinita la nomo *Τηθὺς*.

HERM. Tio, ho Sokrato, vere elegantas.

SOKR. Kaj kial ne ĝi devas esti? Sed kio postevanas? Pri Zeŭso ni jam traktis.

HRMOGENO: Jes.

SOKR. Ni traktu, do, pri liaj fratoj, pri *Ποσειδῶν* (Poseidono) kaj *Πλούτων* (Plutono), kaj pri la alia nomo per kiu estas indikata tiu lasta.

HERM. Certe.

SOKR. Do, pri la nomo de *Ποσειδῶν*, ĝi al li estis donita [de iu kiu unua lin nomis], ŝajnas al mi, ĉar lin, marŝantan, la naturo de la maro retenis kaj malpermesis lian antaŭeniron, sed estis por li kiel *δεσμὸς τῶν ποδῶν* (ligilo por la piedoj). Tial la nomanto donis al la dio, reganta tiun potencon, la nomon *Ποσειδῶν*, kvazaŭ temus pri *ποσί-δεσμος* (ligilo ĉe la piedoj); kaj la *ε* intermetiĝis eble por elegantigi. Probablas, tamen, ke ĝi ne tion volas signifi, kaj en la loko de la *σίγμα* oni antaŭdiris du *λάβδα*, kvazaŭ la dio estus *πολλὰ εἰδὸς* (saĝa pri multajoj). Sed eble el *σείειν* (skui) li estis nomita *ὁ σείων* (la skuanto); kaj la *πεῖ* kaj *δέλτα* estas aldonajoj. Rilate *Πλούτων*, tiu estis nomita surbaze de la dono de la *πλούτος* (riĉeco) ĉar el la profundecoj de la tero suprenvenas *πλούτος*; rilate al *Ἅιδης* (Hadeso), al mi ŝajnas ke la plejparto interpretas ke per tiu nomo oni referencas al *ἄιδες* (nevidebla) kaj, timhavinte pro la nomo, oni lin nomi *Πλούτων*.

Ĉapitro XX

HERM. Kaj al vi kiel ŝajnas, ho Sokrato?

SOKR. Al mi ŝajnas ke la homoj pro diversaj motivoj erare juĝis koncerne la potencon de tiu dio kaj lin timas kvankam li tion ne meritas. Kaj, efektive, ili timas la fakton ke ĉiu el ni, postmorte, definitive restas tie; kaj oni estas timigitaj ankaŭ el la konstato ke la animo, senigita je la korpo, iras en la direkton de li; sed al mi ŝajnas ke ĉio kunfluas al la sama punkto, kaj la regado de la dio kaj lia nomo.

HERM. Kiamaniere, do?

SOKR. Mi al vi sciigos tion kio ŝajnas al mi. Diru: por iu ajn vivulo kia la ligo pli forta, tia kiu ĝin restigu tie kie ĝi troviĝas? Ĉu la nepro aŭ la deziro?

HERM. Multe pli efikas, ho Sokrato, la deziro.

SOKR. Ĉu vi ne opinias, do, ke multaj forfuĝus el *Ἅιδης* (Hadeso), se li ilin ne ligus per la plej forta ligilo, kaj ne per la nepro?

HERM. Evidentas.

SOKR. Tial per kelka deziro li ilin ligas, kiel ŝajnas versimile, se ĝuste li ilin ligas per ligo pli granda kaj ne per la nepro.

HERM. Tiel ŝajnas.

SOKR. Ĉu cetere la deziroj, el si mem, ne estas diversaj?

HERM. Jes.

SOKR. Kaj tial per la plej granda el la deziroj li ilin ligas, se mem volas ilin reteni per la ligo pli efika.

HERM. Jes.

SOKR. Kaj ĉu troviĝas deziro pli granda ol tiu kiun oni sentas kiam oni juĝas ke, restante kune kun alia, oni fariĝos homo pli bona?

HERM. Je Zeŭso! Neniel, ho Sokrato.

SOKR. Tial ni diras, ho Hermogeno, ke neniu el tiuj el tie volas reveni ĉi-tien, eĉ ne la Sirenoj mem, kiuj mem allogiĝas same kiel ĉiuj aliaj:

tiel belas la paroladoj, kiel verŝajnas, kiujn ἄδης kapablas diri kiu estas ĝuste tiu dio, kiel ĝuste rezultas el tiu ĉi rezonado, perfekta sofisto kaj granda bonfaranto por la loĝantoj ĉe li, kiu vere ankaŭ al tiuj kiuj ankorau restas ĉi-supre sendas tiel grandajn bonaĵojn. Tial estas multaj la bonaĵoj kiuj tie malsupre lin ĉirkaŭas kaj el tio Πλοῦτος havis tiun nomon. Cetere ne voli travivi kun la homoj dum ili estas provizitaj je la korpo, kaj anstataŭe troviĝi kun ili kiam la animo³² estas jam liberigita el ĉiuj malbonoj kaj deziroj elfluantaj el la korpo, ĉu al vi ne ŝajnas propraĵo de filozofo kaj de laŭdeva pripensanto, ke tiel reale povas ilin reteni per la ligo de la deziro de virto, dum kiam ili havas ardon kaj frenezon de la korpo eĉ ne la patro Κρόνος kapablus ilin reteni ĉe si ilin ligante per la ligiloj pri kiuj onidiras?

HERM. Eblas ke vi diras ion valida, ho Sokrato.

SOKR. Kaj sendube, ho Hermogeno, la nomo ἄιδης tre fremdas el derivado el αἰδέξ (nevidebla), sed pliprobablas el εἰδέναι (scii) ĉiujn belaĵojn ekscitiĝis ἄιδης en la leĝa nomanto.

Ĉapitro XXI

HERM. Bone. Sed pri Demetra kaj Hera kaj Apolono kaj Atena kaj Hefesto kaj Areso kaj la aliaj dioj?

SOKR. Demetra ŝajnas estinti nomita Δημήτηρ pro la disdono de la nutraĵoj διδοῦσα ὡς μήτηρ (kiu donas kiel patrino); Ἑρα (Hera), male, estas ἐρατή (amebla), kaj fakte oni diras ke Zeŭso ŝin tenas ĉe si kiel edzinon, ĉar ἐρασθεῖς (enamiĝinta) al ŝi. Sed, eble, agante kiel kompetentulo pri ĉielajoj, la leĝa nomasignanto nomis Ἑρα iom kamufle la

³² Jen eksensvalorigo de la korpo kiu poste tiom influis, longatempe, ankaŭ kristanisman, por kiu, male, la korpo havas tiom da digneco ke ĝi partneras en la resurekto.

ἀέρ (aero) metante la komencan literon vortfinen: kaj vi povus kompreni se vi plurfoje sinsekve eldirus la nomon *Ἔρα*. Kaj nun pri *Φερρέφαττα* (Ferrefatta): multaj teruriĝas ankaŭ pro tiu nomo same kiel antaŭ tiu de *Ἀπόλλο* (Apolono) pro manko de sperta kono, mi kredas, pri la adekvateco de la nomoj. Fakte, ĝin ŝanĝante ili vidas *Φερσεφόνη* (Persefono) kaj ŝi perceptiĝas hororiga: male ĝi indikas, ke la diino estas plensaĝa. Ĉar la estaĵoj estas *φερόμενα* (moviĝantaj), kio estas *ἐφαπτόμενον* (kuniĝanta) kaj *ἐταφῶν* (tuŝanta) kaj kio kapablas tiaĵojn sekvi fariĝos saĝa. *Φερ'επαφα* do povus plikorekte nomiĝi la diino pro la saĝo kaj pro la *ἐπαφή τοῦ φερομένου* (kontakto kun tio kio sin movas), aŭ pro io simila - kaj kunlimas al *Ἄιδης*, kiu estas saĝa, ankaŭ pro la fakto ke eĉ ŝi tia estas -; sed nun oni aliigas ŝian nomon taksante pli konsiderinda la bonan eldiron ol la veron, tiel ke oni ŝin nomas *Φερρέφαττα* (Ferrefatta). Sammaniere rilate al *Ἀπόλλω* kies, kiel mi jam diris, multaj timiĝas pro la nomo, kvazaŭ ĝi signifus ion teruran. Ĉu vi tion ne rimarkis?

HERM. Certe kaj vi diras la veron.

SOKR. Tiu nomo, male, laŭ mia konjekto, brilege estis asignita al la potenco de la dio.

HERM. Kiel?

SOKR. Mi provos transdoni al vi kion mi opinias: ne troviĝas fakte nomo kiu povas pli taŭge agordiĝi, en sia unusoleco, kun la kvar potencaĵoj de la dio, tiel ke ĝi povu konveni al ĉiuj kaj iusence ilin montri: muziko, aŭgurarto, medicino, kaj persaga arto.

HERM. Diru, tial, ĉar al mi ŝajnas, ke vi estas asertanta, ke tiu nomo estas io aparta.

Ĉapitro XXII

SOKR. Kaj adekvate asignita, se konsideri ke la dio estas muzikkultanto. Antaŭ ĉio, la purigado, kaj la ritoj purigantaj, kaj en la medicino kaj en la aŭgurarto, kaj la sulfurigadoj per medicinaj kuraciloj kaj per tiuj orakolaj kaj plue per la banoj en tiuj kuraciloj kaj la aspergoj, ĉiuj tiaj artoj produktas unikan efikon, tio estas ili igas puran la homo, kaj en la korpo kaj en la animo. Aŭ ĉu ne?

HERM. Sendube.

SOKR. Tial ĉu ne devas esti tiu la dio kiu purigas, ἀπολούων (kiu lavas) kaj ἀπολύων (kiu liberas) el tiaj malbonaĵoj?

HERM. Sendube.

SOKR. Sur la bazo de ἀπολύσεις (liberigoj) kaj de ἀπολούσεις (purigaj lavadoj), ĉar li medicine praktikas tiaĵojn, oni lin povus adekvate difini Ἀπολούων (kiu lavas); dum surbaze de la aŭgurarto kaj de la vero kaj de la ἀπλοῦν - kiu samsencas kun Απολούων - laŭ ega adekvateco konvenus lin nomi kiel ĝuste faras Tesaloj: ĉiuj Tesaloj, fakte, difinas tiun dion Ἀπλοῦν (Aplono). Krome, pro lia αἰὲ βολῶν (ĉiam ĵetanta), nome mastro per sia arkista arto, li estas Ἀειβάλλων (kiu ĉiam trafas). Rilate muzikon, aldone, oni bezonas scii ke ἄλφα (alfa) signifas ofte ὄμοῦ (kune) [kiel en ἀκόλουθος (sekvanto) kaj en ἄκοιτις (geedzino) kaj en tiu ĉi kazo signifas ὄμοῦ πόλησις (kuna rotacio), kaj koncerne la ĉielon pro tiuj kiuj estas indikataj kiel πόλοι (polusoj), kaj koncerne la harmonion de la kanto, kiu estas ĝuste nomata sinfonio: ĉar ĉiuj tiuj karaterizoj, laŭopinie de spertuloj pri muziko kaj astronomio, pro supozebla harmonio πολεῖ (turniĝas) ĉiuj kune. Kaj tiu ĉi dio estras la harmonion ὁμοπολῶν (movante kune) ĉiujn tiaĵojn kaj por la dioj kaj por la homoj. Kiel ni, do, uzis ὁμοκέλευθος (kunvojaĝanto) kaj ὁμόκοιτις (litkunulo) - anstataŭante la ὄμο- per ἄ-, same ni nomis Ἀπόλλων tiun

kiu estis Ὀμοπολῶν, enŝovante duan λάβδα, ĉar tio estus homomino de nomo terura. Kaj ĝuste tion suspektas ĝis hodiaŭ iuj ĉar ili ne korekte konsideras la econ de la nomo kaj ĝin timas kvazaŭ ĝi signifus ion ruinan: ĝi, male, kiel mi ĵus diris, kontentige konvenas al ĉiuj fortoj de la dio, tio estas ἀπλοῦς, ἀεὶ βάλλοντος, ἀπολούων kaj ὀμοπολῶν. Al la μούσαι (muzoj), krome, kaj ĝenerale al la μουσική (muziko), la nomo startis el μῶσθαι (aspiri), plejprobable, kaj el la serĉemo kaj el filozofiemo. Λητώ (Latona) el la mildeco de la diino, pro ŝia sinteno ἐθελήμων (bonfara) koncerne tion pri kio estas preĝalvokata. Sed eble la afero kuŝas en la modo laŭ kiu ŝin nomas fremduloj - multaj, fakte, nomas Ληθῶ -: verŝajnas, do, ke ŝi estis nomata Ληθῶ ĉe kiuj tiel ŝin nomas rimarkigante la neakrecon de ἦθους (karaktero) kaj, eĉ, mildecon kaj λεῖον (dolĉecon). Ἄρτεμις (Artemida), plue, ŝajnas, pro ἀρτεμᾶς (netuŝita) kaj pro la honoro el la deziro de la virgeco; sed eble ἀρετῆς ἵστορ (praktikanta virtojn) volis difini la diinon tiu kiu ŝin nomis kaj ankaŭ pro ἄροτον μισησάσα (kiu malŝatas generadon) flanke de viro en virino. Aŭ pro iu ajn el tiu motivoj aŭ pro ĉiuj kune, tiun nomon metis kiu ĝin metis³³.

Ĉapitro XXIII

HERM. Kaj Dionizo kaj Afrodita?

SOKR. Grandajn aferojn vi pridemandas, ho filo de Hiponiko. Sed la karakterizo de la nomoj de tiuj dioj povas esti dirita ĉu serioze ĉu ŝerce. Rilate la seriozan aspekton, petu de iu alia; tiun ŝercan, male, nenio malhelpas pritrakti; fakte, ankaŭ la dioj amas ŝerci. Kaj tial Διόνυσος (Dionizo) povus esti nomata, laŭŝerce, ὁ διδοὺς τὸν οἶνον (kiu

³³ El tiu amasiĝo de informoj, foje pli embarasigaj ol koheraj, travidiĝas la ironieca ŝajnakcepto de la konceptoj de la du kontraŭuloj pri adekvateco de la nomoj.

donacas la vinon), do *Διδοίνυσος*; kaj el *οἶνος* (vino), ĉar enŝovas *οἶεσθαι* (kredi) en la plejmulto de la trinkantoj ke mem havas *νοῦν* (inteligenton) kvankam je tiu malprovizitaj, li povus pravege esti nomita *οἶόνους*. Pri *Ἀφροδίτης* (Afrodita) ne decas kontraŭstari Heziodon, sed tuj konsenti ke ŝi estis tiel nomata pro ŝia naskiĝo el *ἀφρὸς* (ŝaŭmo).

HERM. Kaj certe, ho Sokrato, vi, ĉar vi estas atenano, ne forgesos Atenan, kaj eĉ ne Efeston kaj Areson.

SOKR. Kaj tio eĉ ne justus.

HERM. Ne, certe.

SOKR. Do, pri la dua nomo de tiu diino ne malfacilas indiki la kialon pro kiu oni tiun al ŝi donis.

HERM. Kiu?

SOKR. *Παλλάδα* (Palasa) ŝin oni nomas kelkkaze.

HERM. Kaj kiel ne?

SOKR. Se ni opinias, ke tiu nomo estis asignita pro ŝia aspekto “armite danci”, ni korekte juĝas, laŭ mia scio: fakte levi sin mem aŭ ion ajn alten el tersurfaco aŭ en la manoj oni esprimas per *πάλλειν* (lanĉi) kaj *πάλλεσθαι* (salti), *ὀρχεῖν* (danciĝi) kaj *ὀρχεῖσθαι* (danci).

HERM. Jes.

SOKR. Tial el tio al *Παλλάδα* (Palasa).

HERM. Kaj certe laŭ adekvata maniero. Sed pri la alia kion al mi vi diras?

SOKR. Ĉu pri la nomo *Ἀτηνᾶ* (Atena)?

HERM. Jes.

SOKR. Tio pli penigas ol la antaŭa, amiko. Verŝajnas ĉiukaze, ke ankaŭ la antikvuloj juĝis *Ἀτηνᾶν* samekiel la hodiaŭaj sciantoj pri Homero. El tiuj, fakte, la plejparto, interpretante la poeton, diras ke li faris

el Ἄτηνᾶ la νοῦν (menson) mem kaj la διάνοιαν (inlelekton); kaj verŝajnas ke la konstruintoj de nomoj elpensis pri ŝi ion similan, ŝin titolante, laŭ maniero eĉ pli signifoplena, Φεοῦ νόησις (penso de dio), kvazaŭ li enŝtelus ke ŝi estas ἄθεονόα (dia inteligento), uzante ἄλφραν anstataŭ ἦταν laŭ la kutimo de fremduloj kaj ἰῶταν anstataŭ σίγμαν. Sed eble eĉ ne per tiu interpreta vojo: eble, ĉar τὰ θεῖα νοούσα (pripensanta diajn aferojn) pli bone ol la aliaj, li ŝin nomis Φεονόη. Sed nenio malhelpas, ke li ŝin nomus Ἐθωνόη, kvazaŭ tiu diino estus ἐν τῷ ἦθει νόησις (pensado en ŝia naturo); sed, poste, li mem aŭ aliaj post li, deviigante la nomon al formo - laŭ ilia tiama opiniado - pli bela, ŝin nomis Ἄτηνᾶα.

HERM. Kaj pri Ἥφαιστος (Efestoj), kion vi diras?

SOKR. Ĉu min demandas pri tiu nobla φάεος ἵστωρ (spertulo pri lumoj)?

HERM. Tiel ŝajnas.

SOKR. Sed ĉu ne klaras por ĉiuj ke, tiu ĉi, malgraŭ la almeto de antaŭ si de la ἦτα., estas Φαῖστος (luma)?

HERM. Tio eblas, kondiĉe ke al vi ne ŝajnu alie, kiel cetere probablas.

SOKR. Por ke tio ne ŝajnu, vi de mi petu pri Ἄρης (Areso).

HERM. Mi vin demandas.

SOKR. Do, se vi volas, Ἄρης povus konsisti je ἄρρεν (maskla) kaj ἀνδρεῖον (kuraĝa); sed se, alifonte, ĝi rilatus al malmola kaj nefleksebla, kiuj ĝuste nomiĝas ἄρρατον, ankaŭ tiel ĉiukaze konvenus al militema dio adekvate nomiĝi Ἄρης (Areso).

HERM. Konsenteble.

SOKR. Sed nun, je la nomoj de la dioj, ni flankelasu la diojn ĉar mi ĝeniĝas paroli pri ili: pri aliaj, laŭ via elekto, proponu ke ni esploru “por

ke vi vidu kiaj estas la ĉevaloj” de Eŭtifrono³⁴.

HERM. Tiel mi kondukos, ankaŭ se de vi mi pripetus ion rilate *Ἑρμῆς* (Hermeso), konstatinte ke Kratilo diras ankaŭ ke mi ne estas Hermogeno. Ni provu esplori pri la signifo de la nomo *Ἑρμῆς* por scii ĉu li diras ion seriozan.

SOKR. Sed efektive povas esti ke tiu nomo, *Ἑρμῆς*, iamaniere koncernus la paroladon; cetere, *ἐρμηνεύσα εἶναι* (esti interpretisto) kaj la mesaĝisto kaj ŝtelisto kaj trompisto en konversacioj kaj komercisto, ĉiuj tiuj aktivaĵoj rilatas la forton de la parolado; tial, kiel ni diris antaŭe, *εἴρειν* (diri) estas la utiligo de la parolo, dum tio, pri kio ekzemple ofte parolas Homero kiam li diras *ἐμήσατο* (imagis), egalvaloras al ruze elpensi. Startante el ambaŭ tiuj datenoj, la nomdonanto altrudas al ni tiun dion kiel la *μησάμενος* (kiu elpensis) la diron kaj la paroladon - diri estas ĝuste *εἴρειν* -, kvazaŭ li nin informus: “Ho homoj, kiu *τὸ εἴρειν ἐμήσατο* (elpensis la dirarton) merite povas esti de vi nomata *Εἰρέμης*; sed hodiaŭ ni, opiniante plibeligi la nomon, lin nomas *Ἑρμῆς*. [Kaj ankaŭ *Ἴρις* (Iris) verŝajne ricevis sian nomon el *εἶρειν*, ĉar ŝi agis mesaĝiste].

HERM. Je Zeŭso! Tial eble prave diras Kratilo ke mi ne estas Hermogeno. fakte mi certe ne lertas elpensi paroladojn.

Ĉapitro XXIV

SOKR. Kaj ke *Πᾶν* (Pajno) estas filo de la duobla naturo de Hermeso havas sian probablecon, ho amiko.

HERM. Kiel?

³⁴ Tio estas la argumentaj fortoj favoraj al la tezo de Eŭtifrono. (Komparo el Iliado V,221-22).

SOKR. Ĉu vi scias ke la parolado esprimas $\pi\hat{\alpha}v$ (ĉion) kaj ĉirkaŭiras kaj vagadas, kaj estas dunatura, vera kaj malvera ³⁵?

HERM. Certe.

SOKR. Nu, la parto vera de tiu estas glata kaj laŭdia kaj loĝas alte inter la dioj; tiu mensoga malalte ĉe la plejparto de la homoj kaj estas akra kaj *τραγικόν* (kapra [tragika]): ĉi tie, fakte, troviĝas la plejparto de la mitoj kaj mensogoj, en la vivo do *τραγικόν*.

HERM. Certas tio.

SOKR. Kaj tial, korekte por tiu kiu indikas $\pi\hat{\alpha}v$ (ĉion) kaj ĉiam *πολῶν* (vaganta) temas pri *Πᾶν αἰπόλος* (Pajno kapreca), filo de la duobla naturo de Hermeso, supre glata, malsupre malglata kaj *τραγοεδής* (kaproforma [aŭ tragika]). Kaj certe *λόγος* (parolo)³⁶ aŭ parolfrato estas Pajno, se li estas filo de Hermeso: kaj neniu miro se frato similas fraton. Sed kiel mi sugestis, mia kara, ni preterlasu la diojn.

HERM. Pri jenaj ankoraŭ, se vi volas, ho Sokrato. Sed kio malhelpas pritrakti tiujn aliajn kiel, ekzemple, la sunon, lunon, stelojn, teron, eteron, aeron, fajron, akvon, sezonojn, jaron?

SOKR. El tiuj vi vicigas multajn; tamen, se tio al vi agrablas, mi konsentas.

HERM. Kaj certe vi agrabligos min.

³⁵ Reiro, tra la klasika sofisteca kulturo, al la *dissoj logoj* (duoblasencaj paroloj). Same kiel rilate la eltiron de etimologioj (por kiu Sokrato uzas kriteriojn malsamajn kaj eterogenajn, nome la malkumetado sintagma, la paronomazia, la asonanca ktp), ankaŭ sur la doktrineca kampo, apud la konstanta eraklitismo, okaze utiligas alijan kaj malsamajn kulturajn matricojn, kun senembarasa eklektismo. Ĉio tio allasas el la tuta etimologia esploro fonon de sensistemo kaj de nekohera teorio.

³⁶ Por ne miskompreni tiun pasagon, utilas scii ke la vorto *logos* (*λόγος*) en la helena, similkontekste aparte en la plej antikva, havis multegon da signifoj: menso, racio, parolo, proverbo, diskutado, rezonado ktp.

SOKR. Kiun deziras unua? Ĉu ni pritraktu, respektante la vicon de via ĵusa listo, ἥλιον (sunon) do?

HERM. Certe.

SOKR. Eblas ke ĝi fariĝos pli klara se ni uzos la doran nomon - Do-roj ĝin nomas ἄλιος (suno) -; do povas esti ἄλιος el la radiko ἀλίζειν (kunigi) homojn en saman lokon kiam ĝi leviĝas, sed povus deveni ankaŭ pro ĝia ἀεὶ εἰλεῖν ἰών (ĉiam irante turniĝi) terĉirkaŭe, aŭ probable ankaŭ ĉar, turniĝante, ŝajnas ποικίλειν (buntekolori) la aĵaron naskiĝ-antan el la tero: cetere ποικίλειν (bunte kolori, multespecigi) kaj αἰολεῖν (ornami per diversaj koloroj) samas.

HERM. Kaj kial σελήνε (luno)?

SOKR. Ŝajnas ke tio premu Anaksagoron kontraŭ muron.

HERM. Kial?

SOKR. Ŝajnas ke li klare montru pli antikva kion male li instruadis freŝa, nome ke la luno ricevas la lumon el la suno.

HERM. Kiamaniere?

SOKR. Ĉar certasence σέλας (brilo) kaj φῶς (lumo) samas.

HERM. Jes.

SOKR. Cetere, kelkmaniere, ĉiam νέον (nova) kaj ἔνον (malnova) estas tiu lumo ĉirkaŭ la luno, se Anaksagoranoj diras la veron: fakte (la suno) laŭŝajne turniĝante ĉiam ĉirkaŭ ĝin (la luno), je ĝi (lumo) ĵetas ĉiam novan dum malnova estas tiu de la antaŭa monato³⁷.

HERM. Certe.

SOKR. Sed multaj ĝin nomas Ζελαναία.

HERM. Vere.

³⁷ Jes, la suno ĉirkaŭ la luno (!), sed laŭvere tiu ĉi ricevas lumon el la suno, kion antikvuloj ne sciis.

SOKR. Pro tio ke ĝi posedas *σέλας νέον*³⁸ *καὶ ἔνον ἀεί* (brilon novan kaj malnovan ĉiam), ĝi povus nomiĝi plejĝuste per la nomo *Ζελαενονο-αία* kiu, kunfandiĝinte, fariĝas *Ζελαναία*.

HERM. Ditirambas tiu nomo, ho Sokrato! Sed kion vi diras pri la monato kaj astroj?

SOKR. *Μεῖς* (monato) el radiko *μεισοῦσθαι* (malpliigi) povus esti nomata *μείης*, dum la *ἄστρο* (astroj) probable eltiras sian nomiĝon el *ἀστραπή* (fulmo). Kaj *ἀστραπή*, ĉar *τὰ ὦπα ἀναστρέφει* (direktigas la okulojn), povus ankaŭ profite depreni el *ἀναστρωπή* kiu nun, en beligita formo, reduktiĝas al *ἀστραπή*.

HERM. Kaj la fajro kaj akvo?

SOKR. Rilate *πῦρ* (fajro) mi naĝas tra malfacilaĵoj: kaj ni riskas konstati ke la Eŭtifrona muzo jam min forlasis³⁹ aŭ ke tio estas io tre malfacila. Atente notu, do, kiun artifikon mi enkondukas en ĉiujn similajn okazojn kiam mi troviĝas tra malfacilaĵoj.

HERM. Kiun?

SOKR. Mi al vi sciigos. Tial respondu min: ĉu vi sciis diri al mi per kiu maniero *πῦρ* nomiĝas tiel?

HERM. Mi certe ne, je Jovo!

³⁸ Foje la grekaj vortoj estas registritaj kiel ili aperas en la greka teksto, sen eventuala modifo postulita de la gramatika kazo en la nova lingvo. Tio tamen ne ĝenas la komprenadon.

³⁹ Sub tiu kutima ironio de Sokrato, ĉu eblas vidi ion sceptikan pri la dioj?

Ĉapitro XXV

SOKR. Atente perceptu, oportune, kion mi suspektas tiurilate. Mi opinias, fakte, ke Helenoj, kaj aparte kiuj vivas sub barbara regado, prenis multajn nomojn el la barbaroj.

HERM. Kaj el tio?

SOKR. Se iu do serĉus kiel tiuj nomoj estis atribuitaj kaj profitas la kriteriojn de la helena lingvo, kaj ne la kriteriojn de tiuj el kiuj la nomo troviĝas deveninta, vi scias ke tiu baraktus tra malfacilaĵoj.

HERM. Versimile.

SOKR. Vidu, do, ĉu ankaŭ tiu nomo *πῦρ* ne estus barbarea. Fakte, malfacilas ĝin adapti al la helena lingvo, kaj estas konite ke Frigianoj ĝin tiel nomas, kvankam vorte aliigante iomete; kaj tiel ankaŭ por *ἰδωρ* (akvo), *κύνες* (hundoj) kaj multaj aliaj.

HERM. Tiel estas.

SOKR. Ni ne bezonas, tial, perforti tiujn nomojn, kvankam iu ajn povus havi ion objektan rilate ilin. Kaj tiel mi preterlasas *πῦρ* kaj *ἰδωρ*; sed ĉu *ἀήρ* (aero), ho Hermogeno, ne nomiĝas *ἀήρ* pro tio ke ĝi *αἴρει* (levas) aĵojn el la tersurfaco? aŭ ĉar ĝi *ἀεὶ ρεῖ* (ĉiam fluas)? aŭ ĉar el ĝia fluo naskiĝas la vento? Foje, fakte, poetoj indikas la ventojn per *ἀήται*: el tio, eble, *ἀητόρρουν* (vento kuranta) signifus kvazaŭ oni dirus *πνευματόρρουν* (blovo fluanta). *Ἄιθῆρ* (etero), poste, tiamaniere: ĉar ĝi *ἀεὶ θεῖ* (ĉiam fluas) fluante ĉirkaŭ la *ἀήρ* (aero), povas nomiĝi *ἀειθεῆρ*. *Γῆ* (tero), tamen, kion ĝi signifas estas plibone dirate ĝin nomante *γαῖα*: fakte *γαῖα* povus pliadekvate esti nomata *γεννήτειρα* (generintino), laŭ la Homera esprimo: kaj ties *γεγάσιν* (estas generitaj) interpretiĝas ĝuste “generiĝi”. Bone. Kion ni havis poste?

HERM. *Ἔρραι*, (sezonoj), Sokrato, kaj *ἐνιαυτός* (jaro) kaj *ἔτος* (jaro).

SOKR. Ja jes. *Ωραι* (sezonoj) devas esti eldirataj laŭ la antikva atika lingvo, se vi volas scii la versimilon: ili fakte estas *ῶΡΑΙ* pro ilia *ὀρίζειν* (determini) la vintrojn kaj somerojn, ventojn kaj la fruktojn de la tero. Ĉar *ὀρίζουσαι* (determinantoj), ili povas esti adekvate nomataj *ὥραι*; *ἐνιαυτός* (jaro) kaj *ἔτος* (jaro) riskas esti la sama afero. Fakte, tion kio pelas al la lumo la aĵojn naskiĝantaj kaj fariĝantaj, ĉiu laŭ sia vico, kaj tion kio ilin *ἐν αὐτῷ ἐξετάζον* (en si mem serĉas), ĝuste tion - kiel ni antaŭe konsideris rilate la nomon de Zeŭso, kiun, dividitan laŭ du eroj, iuj nomas *Ζῆνα*, aliaj *Δία*, tiel ankaŭ ĉi-kaze - iuj nomas *ἐνιαυτός*, ĉar *ἐν ἑαυτῷ* (en si mem), aliaj *ἔτος* pro tio ke *ἐτάζει* (serĉas). Sed la tuta esprimo, tiu *ἐν αὐτῷ ἐτάζον*, kvankam unusola, eble estas eldirata laŭ du malsamaj manieroj: tial el unu sola esprimo naskiĝis du nomoj, *ἐνιαυτός* kaj *ἔτος*.

HERM. Vere, vi, Sokrato, multe progresas.

SOKR. Ja, laŭvide, mi ŝajnas alproksimiĝanta al saĝo!

HERM. Jese

SOKR. Baldaŭ vi flatdiros eĉ pli!

Ĉapitro XXVI

HERM. Sed post tiuspecaj nomoj mi plaĉe estus rigardanta per kiu adekvateco estis asignitaj la nomoj rilataj al la virtoj, kiel *φρόνησις* (raciemo), *σύνεσις* (kompreno) kaj *δικαιοσύνη* (justeco) kaj ĉiuj aliaj samspecaj.

SOKR. Vi vekas, amiko mia, kategorion de nomoj ne malmulte gravan; tamen, pro la fakto ke mi vestis la haŭton de leono, mi ne devas heziti,

sed ekzameni, kiel decas, pri *φρόνεςις*, *σύνεςις*, *γνώμη* (opinio), *ἐπιστήμη* (scienco) kaj ĉiuj aliaj kiujn vi difinas belaj nomoj.

HERM. Certe ni devas ĝisfine ne rezigni.

SOKR. Kaj certe, je la hundo, al mi ŝajnas ke senerare mi trafis kion elpensitan ĝisnun: opiniante ke tiuj plej antikvaj homoj altrudintaj la nomojn, sentis tion kio senescepte okazas hodiaŭ al la plejparto de nunaj saĝuloj, kiuj, pro sia ĉiama ĉiuflanka turniĝo por serĉi kiel stas la aĵoj estantaj, estas trafitaj per kapturturniĝoj, kaj tial al ili ŝajnas, ke la aĵoj estantaj turniĝas kaj moviĝas ĉiukaze. Kaj ili informas ke la kialo de tiu ilia interpreto ne estas ilia ena kondiĉo, kaj ke la estaĵoj mem estas aranĝitaj tiamaniere ke neniu el ili estas solida kaj stabila, dum, male, fluas kaj moviĝas kaj estas ĉiam mergitaj en pleneco de movo kaj generiĝo. Mi parolas evidente pri ĉiuj nomoj pridiskutitaj ĵusantaŭe.

HERM. Kiel tio, ho Sokrato?

SOKR. Ĉu, eble, vi ne atentis pri la ĵusa diraĵo: tio estas, ke la nomoj estas, ĉiuaspekte kaj ĉiusence, asignitaj al la estaĵoj kvazaŭ ili moviĝus kaj fluus kaj generiĝus?

HERM. Mi neniel tion perceptis.

SOKR. Unualoke, la nomo kiun ni eldiris unua estas ĉiuaspekte kaj ĉiusence taksebla kvazaŭ ĝi koncernus tiaĵojn.

HERM. Kiu?

SOKR. *φρόνεςις* (raciemo) estas fakte *φορᾶς καὶ ῥοῦ νόησις* (aludo pri movo kaj fluo). Sed oni povas ĝin devenigi ankaŭ el *ὄνησις φορᾶς* (avantaĝo de moviĝo): sed ĉiukaze estas koncernata la movo. Se ankoraŭ vi insistas, la *γνώμη* (juĝo) montras ĉiuaspekte kaj ĉiusence esploron kaj same *νόμησις γονῆς* (konsideron pri la generado): fakte esplori kaj konsideri samas. Kaj se vi plu deziras, eĉ *νόησις* (penso) estas *νέου ἔσις* (emo al novo) kaj esti nove por aĵoj estantaj signifas

esti ĉiam en fariĝo-stato: ke la animo aspiras al tio, do, intencas indiki kiu almetis la nomon *νόησις*. Fakte, antikvatempe ne estis eldirata *νόησις*, sed en la loko de *ἦτα* oni devis eldiri du *εἶ*: *νόεσις*. *Σοφροσύνη* (saĝo) estas *σωτερία* (savo) de tio pri kio ni ĵusjuse esploris, tio estas pri *φρόνησις* (raciemo). Kaj certe ankaŭ *ἐπιστήμη* (scienco) indikas ke la animo, tiu inda je konsidero, *ἐπομένη* (sekvas) la aĵojn moviĝantajn kaj nek postiras kaj nek antaŭeniras: tial oni devas, post la enkonduko de *ε*, al ĝi doni la nomon *ἐπειστήμη*. *Σύνεσις* (kompreno), siavice, povus aspekti egalvalora al *συλλογισμός* (rezonado), sed kiam oni eldiras *συνιέναι* (kompreni [kuniri]), oni tute ĉiuaspekte kaj ĉiusence celas diri la samon ol *ἐπιστασθαι* (posedi scienco-scion): fakte, *συνιέναι* signifas ke la animo moviĝas kune kun la aĵoj. Kaj certe ankaŭ *σοφία* (saĝo) signifas *ἐφάπτεσθαι φορᾶς* (kuniĝi al movo). Tiu, do, estas nomo tre obskura kaj fremda: sed helpe de poetoj necesas revenigi al la menso, ke diversloke, kiam al ili okazas paroli pri aferoj kiuj ekprocedas rapide, ili diras *ἔσύθη* (li sin ĵetis). Kaj ankaŭ viro el Lakonio, pro bona famo, nomiĝis *Σοῦς* (Rapido): tiel, fakte, la Lakedemonoj nomas la rapidan atakon. *Σοφία* (saĝo) signifas, do, *ἐπαφή* (alhokiĝo) al tiu movo, ĉar ĉiuj aĵoj estantaj estas moviĝantaj. koncerne *ἀγαθόν*, certe, tiu nomo emas aplikigi al ĉio *ἀγαστόν* (mirinda) de la tuta naturo. Pro la fakto, ke la aĵoj estantaj iradas, evidentas ke troviĝas, do, en ili rapido, sed ankaŭ malrapido. Nu, ne ĉio rapideca, sed io el ĝi estas *ἀγαστόν* (mirinda). Ĝuste *ἀγαστόν τοῦ θοοῦ* (admirinda en la rapido) merite akiras tian nomadon, *ἀγαθόν*. Pri *δικαιοσύνη* (justeco) plue, facilas konjekti ke tiu nomo estas atribuita pro *τοῦ δικαίου συνέσις* (konscio pri la justo): sed estas ĝuste *δικαίον* (justa) kiu malfacilas.

Ĉapitro XXVII

Kaj fakte versimilas, ke ĝis certa punkto reĝas akordo inter multaj, sed poste sparkas konflikto. Fakte, kiuj opinias, ke ĉio estas en marŝo, tiuj kredas, ke unuflanke ĝia plejparto estas nur io simila al simpla moviĝo kaj ke, aliflanke, ene de tiu ĉi tutaĵo estas enhavata io fluanta, pere de kiu generiĝas ĉio kio ekestiĝas; kaj ke tio estas tre rapida kaj tre subtila. Kaj efektive alimaniere ĝi ne povus pasi tra ĉio kio ekzistas, se ĝi ne estus tre subtila, tiel ke nenio ĝin retenu, kaj tre rapida tiel ke kontaktu la ceterajn estaĵojn kvazaŭ tiuj ĉi estus senmovaj. Tial, ĉar *δαιόν* (trapasante) ĉiujn aliajn estaĵojn ilin regas, adekvate ĝi estis nomata *δίκαιον*, per aldono de la forto de la *κόππα* cele de facila eldiro. Ĝis tiu punkto, do, kiel ni diris ĵusĵuse, regas akordo inter multaj ke tio estas la *δίκαιον*. Sed mi, ho Hermogeno, je la konsidero ke mi estas persistema koncerne tiun temon, mi sekrete eksciis jenon: ke tiu *δίκαιον* koincidas kun kaŭzo - fakte tiu *δι' ὃ* (per kio) io generiĝas, tiu do estas la kaŭzo - kaj iu diris, ke pro tiu motivo estus korekte ĝin nomi Dia (Zeŭso). Sed kiam, malgraŭe, aŭdinte tiaĵojn, denove mi senurĝe enketas ĉe ili: “Kio estas, karega, la justo, se tia estas la afero?”, ja ŝajnas ke mi demandas pli transe ol dece, kaj ke mi transsaltas el tranĉeo. Ili asertas ke mi jam pri tio sciis sufiĉe kaj, celante min supersatigi, komencas diri unu ian aferon, alia alian kaj ili ne plu akordiĝas. Kaj tiam iu diras, ke tia estas la *δίκαιον*, la suno, ĉar nur tiu ĉi, *δαιόν* (trairante) kaj *κῶον* (bruligante), estras la aĵojn estantajn. Kaj kiam, kontenta pro esti aŭdinta ion belan, mi sciigas tion al iu, tiu ĉi, min aŭskultante, min priridas kaj pripetas ĉu mi kredas ke inter la homoj estas nenio *δίκαιον* post la sunsubiro. Kiam mi, tiam, insistas por ke tiu siavice esprimu sian

opinion, li diras: “la fajro”⁴⁰; sed tio malfacile kompreneblas. Kaj alia diras ke ne estas la fajro mem, sed tiu sama varmo kiu kuŝas ene de la fajro. Kaj alia, priridante tiaĵojn, asertas ke *δίκαιον* koincidas kun tio kion diras Anaksagoro, tio estas kun la inteligento: kaj aldonas ke tiu lasta, ĉar sendependa kaj nemiksita kun io ajn, ordigas ĉiujn estaĵojn trairate ilin ĉiujn. Kaj tiam, amiko mia, mi estas embarasita eĉ pli ol antaŭe kiam mi provis kompreni kio estas *δίκαιον*. Sed, malgraŭe, tiu nomo, pri kiu ni enketis, ŝajnas esti asignita ĝuste pro la supramenciitaj motivoj.

HERMOGNO: Mi havas impreson, ho Sokrato, ke tiaĵojn vi aŭdis el aliaj kaj ne improvizas mem.

SOKR. Kaj pri la antaŭaj?

HERM. Ne, certe.

Ĉapitro XXVIII

SOKR. Aŭskultu do: ĉar eble ankaŭ pri la ceteraj mi povus vin trompi, kvazaŭ mi parolus neaŭdinte ĉe aliaj⁴¹. Kio ankoraŭ restas post justo? Ja pri *ἀνδρεία* (kuraĝo) eble ni ne jam pritraktis. Unuflanke *ἀδικία* (maljusto), montras ke temas pri malhelpo al tio kio kondukas kiel *δαιμόν* (trairanta), aliflanke *ἀνδρεία* (kuraĝo) havas signifon el la fakto ke *ἀνδρεία* eltirus sian nomiĝon en batalo - kaj nenio alio ol *ἐναντία ῥοή* (mala fluo) estas la batalo el si mem, se vere *ῥεῖ* (fluas) -; se, do, oni deprenas la *δέλταν* el la nomo *ἀνδρεία*, la restaĵo *ἀνρεία* indikas tiun saman fakton. Klaras, ĉiukaze, ke *ἀνδρεία* ne estas la fluado mala al ĉiuspeca fluo, sed nur al tiu kiu fluas kontraŭ la juston: alikaze ne estus, fakte, laŭdata

⁴⁰ Suno kaj fajro asociitaj al la justo (*δίκαιον*) eble, nesenironie, aludas al Heraklito, laŭ kiu, ekzemple, ‘la fajro juĝos kaj kondamne konsumos ĉiujn estaĵojn’.

⁴¹ Ŝajnas ke Sokrato dubas pri sia saĝo kaj volas elrevigi sian aŭskultanton.

ἀνδρεία. Kaj *ἄρρεν* (maskla) kaj *ἀνὴρ* (viro) aplikiĝas al io simila al jeno: al *ἄνω ῥοή* (fluo al alto). *Γυνή* (virino), ŝajnas al mi, simila al *γονή* (generado). Pri *φῆλυ* (virina), al mi ŝajnas ke ĝi nomiĝas el *θηλή* (mamo); kaj ĉu eble *θηλή*, ho Hermogeno, el *τεθηλέναι* (burĝoni), same kiel ĉio kio estas akvumata?

HERM. Tio versimilas, ho Sokrato.

SOKR. Kaj ankaŭ siavice *θάλλειν* (burĝoni), laŭ mia imagpovo, prezentas la kreskon de gejunuloj pro tio ke ĝi okazas rapide kaj subite. Kaj ĝuste tion oni imitis per la nomo, ĝin komponante per *θεῖν* (kuri) kun *ἄλλεσθαι* (salti). Sed vi ne ekvidas ke mi min lasas treni for de la semita kampo apenaŭ mi ekeniras glatan vojon: tamen ankoraŭ restas multaj pritraktendaĵoj kiuj ŝajnas seriozaj.

HERM. Vi diras la veron.

SOKR. Kaj inter tiuj unu estas ankaŭ malkovri kion *τέχνη* (arto) volas signifi.

HERM. Certe, certe.

SOKR. Ĉu tion ne signifas *ἔξιν νοῦ* (posedo de inteligento) por tiu kiu forstrekas la *ταῦ* kaj enŝovas *οῦ* inter *χεῖ* kaj *νῦ* kaj inter *νῦ* kaj *ἦτα*?

HERM. Jes, sed apenaŭ ne senpene, ho Sokrato.

SOKR. Sed, kara, ĉu vi ne scias, ke la unuaj metitaj nomoj estis jam surkovritaj de tiuj kiuj volis ilin teatre celebri, aldonante aŭ deprenante literojn por faciligi eldiron kaj ilin ĉiumaniere distordante, kaj por ilin plibeligi kaj pro la tempotrivado? Kial al vi ne ŝajnas stranga la enŝovo de la *ῥω* en *κἀτοπτρον* (spegulo)? Sed tiaĵojn, mi opinias, plenumas kiuj ne prizorgas la veron kaj modlas la eldiron, tiel ke, enŝovante novaĵojn en la originajn nomojn, kunefikas por ke neniu homo komprenu kion

ajn intencis diri la nomo: samkiel ankaŭ rilate *Σφίγγα* (Sfingo), anstataŭ *Φυκός*, ili ĝin nomas *Σφίγγα*, kaj sammetode rilate multajn aliajn.

HERM. Ĝuste tiel, ho Sokrato.

SOKR. Sed, se oni koncedos, ke kiu ajn laŭkaprice enmetu kaj deprenu el la nomoj, granda estos la facileco kaj oni povos agordi ĉiun ajn nomon kun ĉiu ajn objekto.

HERM. Vi trafas la veron.

SOKR. La veron, sendube. Sed vi, kiel saĝa gvidanto, taskiĝu por defendi la ĝustan mezuron kaj la versimilecon.

HERM. Mi volus.

Ĉapitro XXIX

SOKR. Kaj kun vi, Hermogeno, tion volas ankaŭ mi. Sed ne saĝumtro, dikara, por ke vi “ne febligu mian forton”, ĉar mi atingos la kulminon de tiu jam dirita kiam, post *τέχνη* (rimedo), ni estos ekzamenintaj *μηχανή* (artifiko). *Μηχανή* ŝajnas al mi signo de *ἄνειν ἐπὶ πολῷ* (alveni pli foren): fakte, *μῆκος* (longo) iumaniere signifas *πολῷ* (multo); do, je ambaŭ tiuj nomoj, *μῆκος* kaj *ἄνειν*, estas konstituata *μηχανή*. Sed, kiel mi asertis ĵusĵuse, oni devas atingi la kulminon de la jam dirita. Necesas esplori, fakte, kion intencas signifi *ἀρετή* (virto) kaj *κακία* (malvirto). Unu el la du mi ankoraŭ ne enkadrigas, dum la alia ŝajnas alirebla: ĝi akordiĝas, fakte, kun la antaŭaj. Ĉar la estaĵoj *ἰώντα* (iras), ĉio kio estas *κακῶς ἰόν* (mise iranta) estos *κακία* (malvirto): sed super ĉio kiam tiu ĉi, nome *κακῶς ἰέναι* (mise esti) rilate la aĵojn, okazas en la animo, prenas la nomiĝon de la tuteco, nome *κακία* (malvirto). Kaj kio ajn estas *κακῶς ἰέναι* al mi ŝajnas ke estas montrata ankaŭ el *δειλία* (malkuraĝo), kiun ni ankoraŭ ne pritraktis kaj, male, ni preterlasis, dum ĝi bezonis esti konsiderita tuj post kuraĝo (*ἀνδρεία*).

Cetere ni preterlasis multajn aliajn similaĵojn. Nu, *δειλία* (malkuraĝo) indikas, ke agas potenca ĉeno de la animo: fakte *λίαν* (ekscese) spuras ion potencon. Tial la *δεσμὸς* (ligo) *λίαν* (troa, ekscesa) kaj grandega de la animo povus esti *δειλία*: kiel certe ankaŭ *ἀπορία* (malfacilo) estas malbono kaj, eble, tia estas ĉio kio malhelpas *ίέναι* (iri) kaj *πορεύεσθαι* (marŝi). Tion, sekve, ŝajnas signifi tiu *κακῶς ίέναι* (misiri), dum *πορεύεσθαι* esti penegite kaj embarasigite; kaj kiam je tio suferas la animo, ĝi plenpleniĝas je *κακία* (malvirto). Sed se por tiaĵoj konvenas la nomo *κακία*, ĝia malo povus esti *ἀρετή* (virto) pro tio ke ĝi precipe signifas *εὐπορία* (facileco), kaj ĉar la *ροή* (fluo) de la bona animo estas ĉiam senliga, tiel ke *ἀεὶ ῥέον* (kio fluas konstante) senbride kaj senhezite prenis kiel nomon, kiel versimilas, tiun vorton; kaj estas korekte ĝin nomi *ἀειρείτη* (kiu ĉiam fluas) - kaj eble kongruus *αίρετή* (preferebla) ĉar estas *αίρετωτάτης* (tre preferebla) tiu anima kondiĉo; sed kunfandiĝis kaj eldiriĝis *ἀρετή*. Eble vi suspektas ke mi, miavice, estas fantazianta: sed mi diras, ke se la nomo pri kiu mi parolis antaŭe, tio estas *κακία* (malvirto), estas korekte interpretita, samkorekte tio okazas ankaŭ por *ἀρετή*.

HERM. Kaj tial *κακόν* (malbono), per kiu vi eksplikis multajn el la antaŭaj kazoj, kion efektive povas signifi?

SOKR. Ion strangan, je Zeŭso, kaj malfacile kompreneblan, laŭ mi. Tial, do, mi aplikos ankaŭ al tiu nomo kelkan el miaj eskapvojoj.

HERM. Kiun?

SOKR. Tiu pro kiu mi diras ke ankaŭ tiu nomo estas barbareca.

HERM. Plej eble vi taksas korekte. Sed se vi konsentas, ni preterlasiu tiaĵojn, kaj anstataŭe ni provu kompreni per kiu racieco estis adekvate aranĝitaj *καλόν* (belo) kaj *αἰσχρόν* (malbelo).

SOKR. Nu, la signifo de *αἰσχρὸν* klaras el si mem: ĝi fakte agordiĝas kun la antaŭaj datenoj. Fakte, tiu kiu asignis la nomojn ŝajnas senhezite malkonsenti kun tio kio malhelpas kaj haltigas la fluon de la aĵoj estantaj kaj, konsekvence, al la *ἀεὶ ἴσχυον τὸν ῥοῦν* (kio ĉiam haltigas la fluon) almetis la jenan nomon: *ἀεισχυροῦν*; sed nun, kunfandigitan, ĝin oni nomas *αἰσχρὸν*.

HERM. Kaj pri *καλὸν* (belo)?

SOKR. Pli malfacilas kompreni tion! Tamen ĝi evidentas el si mem: nur en la sono kaj longo de la *οὔ* estis modifita.

HERM. Kiamaniere?

SOKR. Eblas ke tiu nomo estas kromnomo de la *διανοία* (menso).

HERM. Kiel vi diras?

SOKR. Vigle atentu. Kiu vi opinias ke estas la kaŭzo de *κληθῆναι* (esti nomita) por ĉiu el la aĵoj estantaj? Ĉu ne estas, eble, kio inspiris la nomojn?

HERM. Jes, certe.

SOKR. Nu, ĉu tio povus esti la *διανοία* (menso) de la dioj aŭ de la homoj, aŭ de ambaŭ?

HERM. Jes.

SOKR. Nu *τὸ καλέσαν* (kio altiras nomi) la aĵojn kaj *τὸ καλοῦν* (kio altiris nomi), ĉu ne estas la samo, la *διανοία*?

HERM. Ŝajnas.

SOKR. Ĉu, tial, kio produktita de la menso kaj *διανοία* estas laŭdinda, kio ne tia, mallaŭdinda?

HERM. Ne dubinde.

SOKR. Tial ĉu kio taŭgas por kuraci ne plenumas la sanon kaj kio utilas por konstrui ne produktas aĵojn rilatajn al la konstruado? Kia via respondo?

HERM. Mi same.

SOKR. Kaj tial *καλοῦν* (kio altiras nomi) la aĵojn *καλά* (belajn) ĝi aranĝas, ĉu ne⁴²?

HERMOGENO; Devas esti tiel.

SOKR. Kaj ĉu tio ne estas, kiel ni diris antaŭe, *διανοία* (menso)?

HMOGENO: Certe.

SOKR. Certe, tial, tiu ĉi *καλόν* estas la kromnomo de racieco produktanta aĵojn tiajn kiajn, ilin sentante *καλά* (belaj), ni favore salutas

HERM. Tiel ŝajnas.

Ĉapitro XXX

SOKR. Kio ankoraŭ ceteras el tiuspecaj nomoj?

HERM. Tiuj koncernantaj la belon kaj bonon: nome profita, avantaĝa, utila, gajnodona, kaj ties malaj.

SOKR. Do, rilate *συμφέρον* (profita) vi povus iumaniere solvi laŭirante la antaŭajn kazojn. Ĝi, fakte, ŝajnas io frateca al la kono. Efektive ĝi montras nenion alian ol *ἄμα φερόν* (movon kunan) de la animo kun la estaĵoj, kaj la aferoj plenumitaj per tiu versimile meritas ke ĝi nomiĝu *συμφέροντα* (kunportantaj) kaj *σύμφορα* (kunfarantaj) el *συμπεριφέρεσθαι* (kunmoviĝi ĉirkaŭe); kaj el *κέρδος* (gajno) la *κερδαλέον* (gajniga). *Κέρδος*, poste, montras kion ĝi intencas signifi se oni redonas al la nomo la *νῦ* en la loko de *δέλτα*: ĝi, fakte, nomas, malsamvorte, la bonon. Fakte ĉar ĝi *κεράννυται* (miksiĝas) al ĉiuj estaĵoj ilin trairante, la nomon oni metis por signi tiun ĝian forton: enŝovinte *dèlta* en la loko de *ny*, oni eldiris *kèrdos*.

HERM. Kaj pri *λυσιτελοῦν* (avantaĝa)?

⁴² En kelkaj manuskriptoj estas dirata la kialo: la longa *oδ* estis akrobate ŝanĝita en la mallonga *o*.

SOKR. *Ŝainas al mi, ho Hermogeno, ke λυσιτελοῦν esprimas ion ne laŭkutime de butikistoj elmetantaj la elspezkonton. Sed ĉar la bono, estante plej rapida en tio kio ĝi estas, ne lasas senmovaj la aĵojn, nek konsentas ke la movo, atinginte la τέλος (plenumaĵon), haltu kaj ĉesu moviĝadi, sed, male, se iu ajn τέλος provas en si gipsiĝi, ĉiam tiun ĝi λύει (malplektas) kaj igas la movon senĉesa kaj ĉiamdaŭra: pro tiuj motivoj al mi ŝajnas ke estis pri la bono dirate λυστελοῦν: fakte, λύον τὸ τέλος (impulsante post la plenumaĵo) per la movo, estis nomita λυστελοῦν. Ὠφέλιμον (utila) fine estas fremda nomo, kiun diversloke uzas ankaŭ Homero kun la verbo ὀφέλλειν (esti utila); kaj tiu estas la adekvata nomo aludanta ‘kreski kaj produkti’.*

Ĉapitro XXXI

HERM. Kaj ankoraŭ pri la maloj de tiuj kiel ni konduitu?

SOKRARO: Se mi ne eraras, la nomojn kiuj estas neado rilate la signifon de tiuj ne necesas pritrakti, laŭ mia sento.

HERM. Kiuj tiaj?

SOKR. *Ἀσύμφορον* (malutila), *ἄωφελ'ες* (senutila), *ἀλυστελ'ες* (damaĝa) kaj *ἀκερδ'ες* (malgajniga).

HERM. Vi diras la veron.

SOKR. Sed tio ankaŭ por *βλαβερὸν* (damaĝa) kaj *ζημιῶδες* (noca).

HERM. Jes.

SOKR. Kaj plieksplike *βλαβερὸν* (damaĝa) esprimas esti *βλάβτον τὸν ροῦν* (kio damaĝas la fluon): kaj *βλάβτον* (kio damaĝas) signifas siavice *βουλόμενον ἄπτειν* (kio volas nodi). Cetere *ἄπτειν* (nodi) kaj ligi estas la samo, io abomeninda ĉiukaze. Tial *βουλόμενον ἄπτειν ροῦν* (kio volas nodi la fluon) estus laŭ maniero tre adekvata *βουλαπτεροῦν*, sed al mi ŝajnas ke povas esti, laŭ beligita formo, *βλαβερὸν*.

HERM. Buntaj eliras el vi la nomoj, ho Sokrato. Efektive nun, dum vi eldiris tiun ĉi nomon, *βουλαπτεροῦν*, al mi ŝajnis, ke fluus el via buŝo fluteca sono ekkantanta preludon de la himno al Atena.

SOKR. Ne mi estas la kaŭzo sed kiuj asignis tiun nomon.

HERMGENO: Veron vi diras, sed, nun, pri *ζημιῶδες* (damaĝa) kiel juĝendi?

SOKR. Kion apartecan povus signifi *ζημιῶδες*? Notu, Hermogeno, kiel mi diras la veron asertante, ke la homoj, intermetante aŭ eliminante literojn, grave aliigas la sencon de la nomoj, ĝispunkte ke ankaŭ per ne-grava ŝanĝo ili foje signifas la malon. Kiel, ekzemple, en *δεον* (kio ligas [necesa]): tio venis al mia menso kaj al mi ĝin memorigis tio kion mi estis ekdiranta ĵusĵuse, tio estas ke nia tiel bela moderna lingvo inversigis *δέον* kaj *ζημιῶδες* al ties kontraŭaj sencoj, obskurante kion origine ili intencis, dum la antikva lingvo montras kion ambaŭ nomoj intencis signifi⁴³.

HERM. Kiel vi diras?

SOKR. Jen mi tion eksplikos. Vi scias, ke niaj antikvuloj oftege uzis la *ῶτα* kaj *δέλτα*, aparte la virinoj kiuj plejofte emas konservi la antaŭan lingvon. Nun, male, oni anstataŭas *ῶταν* per *ἦτα* kaj *δέλταν* per *ζῆτα* kvazaŭ ili estus pli sone grandiozaj.

HERM. Kaj kiel?

SOKR. Ekzemple, *ἡμέρα* (tago) iuj el plej antikvaj homoj eldiris *ἰμέρα*, iuj, *ἐμέρα*, aliaj, dum hodiaŭ ni diras *ἡμέρα*.

HERM. Tiel estas.

⁴³ Sume por Sokrato la nomoj, tiam, estis adekvate asignitaj: nur la posteŭloj ruinigis la adekvatecon pro ilia pretendo pri beligo kaj pro malzorgo. El kio tia konvinko en Platono?

SOKR. Ĉu vi, do, scias, ke inter ĉiuj nur la antikva nomo rivelas la intencon de tiu kiu ĝin almetis? Fakte oni donis la nomon *ἡμέρα* pro tio ke el la mallumo fontas la lumo por la homoj kontentaj kaj *ἡμείροντες* (sopirantaj).

HERM. Eble tiel statas.

SOKR. Nun, male, pompe resonigita, vi ne povas kompreni kion signifas *ἡμέρα*. Tamen iuj opinias, ke ĉar *ἡμέρα* (tago) igas la estaĵojn *ἡμερα* (mildaj), pro tio ĝi estis nomata tiel.

HERM. Same taksas mi.

SOKR. Kaj ĉu vi scias ke la antikvuloj nomis *δυογόν* (duopa trenado) la *ζυγόν* (jugo)?

HERM. Certe.

SOKR. Kaj *ζυγόν* montras nenion, dum male iam estis nomata *δυογόν*, pro la ligo de *δυο* (du) al *ἀγωγῆ* (trenado); sed nun estas nomata *ζυγόν*. Kaj tiel rilate multegajn aliajn nomojn.

HERM. Ŝajnas.

SOKR. Kiel tiuj, do, same *δέον* (kio ligas [necesa]), tieldirita antaŭĉie signifas la malon rilate al ĉiuj nomoj koncerntaj la bonon: fakte, malgraŭ ĝia identiĝo kun la *ιδέα* (ideo) mem de bono⁴⁴, *δέον* ŝajnas esti iu *δεσμὸς* (ligo) kaj obstaklo al la movo, kvazaŭ ĝi estus frato de *βλαβερὸν* (damaĝa).

HERM. Sendube, ho Sokrato, tiel prospektiĝas.

SOKR. Sed ne, se vi uzas la antikvan nomon, kiu verŝajne estis asignita ege pli adekvate ol tiu nuna; eĉ ĝi akordiĝos kun la antaŭaj nomoj de la bonoj, kiam vi anstataŭ *εἶ* asignus *ἰώταν*, kiel en antikvaj tempoj: fakte, *διὸν* (kio trairas), kaj ne *δέον*, signifas bonon, kiun la vorto ĝuste

⁴⁴ Ĉu “ideo”? Ĉi-punkte de la formiĝo de la filozofia penso de Platono, la teorio de la ideo estas ankoraŭ apenaŭ ĝermanta: pro tio kelkaj tradukas ‘speco de bono’.

laŭdas. Kaj tiel ne kontraŭdiras sin mem kiu almetis la nomojn: fakte, *δέον*, *ὠφέλιμον* (utila), *λυστελοῦν* (avantaĝa), *κερδαλέον* (gajniga), *ἀγαθον* (bona), *συμφέρον* (fruktodona) kaj *εὐπορον* sin montras samsencaj, signifante per malsamaj nomoj, ke estas laŭdata kio metas ordigon kaj ĉiemoŭiĝon, dum, male, estas mallaŭdata kio bremsas kaj ligas. Kaj ankaŭ *ζημιῶδες* (malutila), se vi asignos laŭ antikva maniero *δέλταν* en la loko de *ζῆτα*, al vi klariĝos ke ĝi estas la nomo por *δοῦν τὸ ἰόν* (liganta tion kio fluas), ĉar origine oni asignis *δημῶδες*.

Ĉapitro XXXII

HERM. Kaj pri *ἡδομή* (plezuro), *λύπη* (sufero), *ἐπιθυμία* (deziro) kaj aliaj similaj, ho Sokrato?

SOKR. Ili ne prezentigas tre malfacilaj, Hermogeno. Fakte *ἡδονή* (plezuro), ago kiu tendencas al *ἡ ὄνησις* (avantaĝo), verŝajne tenas tiun nomon pro enŝovo de *δέλτα* - tiel ke fariĝas *ἡδονή* anstataŭ *ἡονή* - kaj rilate *λύπη* (doloro) eblas ke ĝi ricevis sian nomon el *διάλυσις* (malfortiĝo) de la korpo, kiun sub tiu pasio la korpo suferas. Kaj *ἀνία* (afliktiĝo) estas kio obstaklas *ἰέναι* (iri). Kaj *ἀλγηδών* (sufero) ŝajnas parolo el fremdujo, nome formita startante el *ἀλγεινὸν* (kio suferigas). *Ὀδύνη* (profunda doloro), male, verŝajne ricevis sian nomon el *ἐνδουσις* (enirado) en la afliktiĝo. Rilate *ἀχθηδών* (pezo, ĝenaĵo), plue, klaras al ĉiu, ke temas pri nomo konstruita laŭbilde de *βάρος* (pezeco) de la movo. Eble *χαρά* (ĝojo) tiel nomiĝis pro *διάχυσις* (disvastiĝo) kaj facileco de *ρόη* (moviĝo) de la animo. *Τέρψις* (plezuro), male, el *τερπνὸν* (plezuriga): kaj *τερπνὸν* el *ἔρψις* (serpentumado) tra la animo estis tiel nomita, ĉar ĝi estas similigata al *πνοή* (blovo); korekte la nomo devus esti *ἔρπνου*, sed laŭ la tempopaso finiĝis en *τερπνὸν*. *Εὐφροσύνη* (gajo), se daŭrigi, ne bezonas eksplikon pri sia

deveno: al ĉiu, fakte, klaras ke ĝi kaptis tiun nomon el εὖ συμφέρεσθαι (bone moviĝi kune) de la animo kune kun la estaĵoj, kaj laŭvere la adekvata nomo estus *Εὐφροσύνη*; male oni ĝin diras *εὐφροσύνη*. Eĉ *ἐπιθημία* (deziro) ne malfacilas: evidentas, fakte, ke ĝi estis tiel nomata pro la forto de *ἐπὶ τὸν θυμὸν ἰούσα* (adresiĝanta al la animo). *Φυμὸς* (animo) povus ricevinti tiun nomon el *θύσις* (agitiĝo) kaj el ekscitiĝo de la animo. Kaj ankaŭ *ἡμερος* (korkkonsumiĝo) estis certe tiel nomata pro la fluo kiu fortege trenas la animon: ĉar la fluo fakte estas *ἰέμενος ῥεῖ* (impete urĝanta) kaj *ἐφιέμενος* (strebanta) al la estaĵoj kaj, tial, forte trenas la animon per *ἔσις τῆς ῥοῆς* (kuntreno de la fluo): pro la kunfluo de ĉiuj tiuj fortoj estis uzata la nomo *ἡμερος*. Kaj *πόθος* (priploro) sammaniere estas tiel nomata pro tio ke ĝi aludas al afero ne aktuala, sed al *ἄλλοθί που ὄν καὶ ἄπόν* (kio estas aliloke kaj fora): el tio estis kromnomita *πόθος* kio, estas nomata *ἡμερος* (aspiro) kiam ĉeestas tio celata; kiam malaperas tiu objekto, male, tiu sama sento estas nomata *πόθος*. Fine *ἔρως* (amo), pro la fakto ke *εἰσρεῖν ἔξωθεν* (fluas enen el maleno) kaj tiu *ροή* (fluo) ne estas propra al tiu kiu ĝin havas, sed estas enkondukita enen el maleno pere de la okuloj, pro tiuj motivoj el *ἐσρεῖν* (flui enen), estis nomata, almenaŭ antikvajn tempojn, *ἔσρους* - fakte estis uzata *οὐ* anstataŭ *ὠ* -, dum hodiaŭ estas nomata *ἔρως* pro la anstataŭo de *οὐ* per *ὠ*. Sed kion vi volas ke ni esploru ankoraŭ?

HERM. Δῶξα (opinio) kaj nomoj similaj kiel pritraktendaj ĉe vi?

SOKR. Nu, δῶξα estis tiel nomata aŭ pro *διωξις* (postkuro) kiun plenumas la animo, *διώκουσα* (postsekvanta) por scipovi kiel statas la aferoj, aŭ pro *βολῆ ἀπὸ τοῦ τοξου* (pafarko). Pliprobablas tiu lasta. Fakte, almenaŭ *οἴησις* (kredo) akordiĝas kun tio. Tion, fakte, ŝajnas montri *οἴσις* (inklino) de la animo al ĉiu aĵo, por distingi kia estas ĉiu el

la aĵoj estantaj, same kiel ankaŭ *βουλή* (decido) iamaniere signifas *βολήν* (ĵeton) kaj *βούλεσθαι* (voli) signifas *ἐφίεσθαι* (tendenci al) kaj krome *βουλεύεσθαι* (decidi): ĉiuj tiaj vortoj, kromsignifantaj *δόξην*, ŝajnas esti bildoj de *βολή* (ĵeto): kiel, siavice, ĝia malo, *ἀβουλία* (decidomanko), ŝajnas esti *ἀτυχία* (malsukceso) de iu *οὐ βαλόν* (kiu ne frapas) *οὐδ'ε τυχών* (neniam atingante) kion *ἐβαλλε* (celis) kaj *ἐβούλετο* (volis) kaj pri kio *ἐβουλεύετο* (decidis) kaj al kio *ἐφίετο* (tendencis).

HERM. Tiaĵojn al mi ŝajnas, ho Sokrato, ke vi jam ekamasigas iom tro rapidritme.

SOKR. Fakte mi estas kure celanta la finon. *Ἀνάγκην* (neceson), tial, mi volas ankoraŭ bone esplori, ĉar ĝi lokiĝas tuj post tiuj nomoj, kaj ankaŭ *ἐκουσιον* (volan). Nu, rilate *ἐκούσιον*, oni povintus montri per tiu nomo la *εἶκον* (kio cedas) kaj tion kio ne kontraŭmetas reziston, sed, se tiel diri, *εἶκον τῷ ἰόντι* (cedas al tio kio iras), tio estas al tio kio okazas laŭ la volo. Kaj *ἀναγκαῖος* (necesa), male, kun kio kontraŭmetas reziston, nome kio estas kontraŭ la volo, koncernos eraron kaj nescion, kaj estas konstruata laŭbilde de marŝado flanke de *ἄγκη* (interkrutejoj), ĉar tiuj ĉi, kiuj estas nelaŭireblaj, aspraj kaj arbarkovritaj, malrapidigas la marŝadon. El tio eble, do, estis alnomita *ἀναγκαῖος*, pro similo al marŝado tra *ἄγκη* (interkrutaĵoj). Sed ĝis kiam estas forto, ĝin ni ne forlasu: kaj ankaŭ vi, ne forlasu, sed plue pripetu.

Ĉapitro XXXIII

HERM. Tial mi aŭdacas peti pri la afero plej granda kaj plej bela, tio estas *ἀλήθεια* (vero), *ψεῦδος* (malvero) kaj *ὄν* (tio kio estas) kaj ĝuste pri tio kion trairas nia dirado, la *ὄνομα* (nomo) mem: kial ĝi havas tiun nomon.

SOKR. Tial estas io kion vi nomas *μαίεσθαι* (serĉi).

HERM. Mi jes, nome *ζετεῖν* (serĉi).

SOKR. Similas *ὄνομα* (nomo) al nomo devenigita el kunfandiĝo de la esprimo kiu diras ke *ὄν* (kio estas) estas tio pri kio oni serĉe esploras. Plibone vi tion povus rekonii en tio kion ni difinas *ὀνομαστός* (nomebla): ĉi tie fakte estas klarmaniere montrate, ke ĝi estas *ὄν οὐ μάσμα ἐστίν* (tio kio estas, pri kio okazas esploro). *Ἀλήθεια* (vero)⁴⁵, poste, similas al la aliaj nomoj [rilate kunfandiĝon]: fakte versimilas, ke per tiu lokucio estis aludata iuspeca *θεία φορά* (dia movo) la movo de tio kio estas, kvazaŭ temus pri *θεία ἄλλη* (dia agitiĝo). *Ψεῦδος* (malvero) estas la malo de *φορά* (movo): fakte ankoraŭ oni reiras mallaŭdi tion kio estas retenata kaj necesigata resti en kvieto, kaj estas aranĝita laŭbilde de *καθεύδοντοι* (dormantoj); la *ψεῖ*, aldonita, kaŝas kion intencis la nomanto. Kaj *ὄν* (tio kio estas) kaj *οὐσία* (esenco) akordiĝas kun la vero, se ili prenas *ἰῶταν*: fakte, ĝi signifas *ἰὸν* (kio iras) kaj *οὐκ ὄν* (tio kio ne estas) siavice signifas *οὐκ ἰὸν* (kio ne iras), same kiel iuj tiel eldiras.

HERM. Ŝajnas al mi, ho Sokrato, ke vi sagacege malkunmetis tiujn nomojn. Sed se iu plie al vi demandus kian la adekvatecon pri tiu *ἰὸν* (tio kio iras), *ῥέον* (kio fluas) kaj pri *δοῦν* (kio ligas)...

SOKR. “Ĉu vi celas scii kion ni al li respondus?” vi diras? Aŭ ne?

HERM. Ĝuste jes.

SOKR. Vere vojon ni jam trovis ĵusĵuse, tiel ke ni, respondante, ŝajnas diri ion validan.

HERM. Kiu estas?

SOKR. Diru ke tio kion ni ne konas estas barbareca. Povas esti ke kelkaj el tiuj nomoj vere tiaj estas⁴⁶. Sed povas ankaŭ esti ke, pro antikveco, la unuaj nomoj estas netroveblaj. Konsiderinte ke la nomoj estas

⁴⁵ Ĉu ne evidentas la ironia karaktero de tiu etimologio? Tio aperos klara kiam estos montrate kiel la nomo nenimaniere povas interŝanĝiĝi, kaj eĉ malpli identiĝi, kun la *ὄν* (la aĵo). La tuta argumentado estas pritraktata iom gajige kvazaŭ por diri ke tiu vojo por trovi la adekvateco de la nomoj ne estas valida.

renversitaj ĉiuflanke, ni spertas nenian miron se la antikva lingvo mal-same ol la hodiaŭa neniel distanciĝas el unu el iu barbarea.

HERM. Vi diras nenion eksterveran.

SOKR. Fakte, mi diras aferojn versimilajn. Sed tiu ĉi ne estas disputo konsentanta pretekstojn; male, necesas ke ni serioze engaĝiĝu esplori tiaĵojn. Sed ni konsideru: se ulo enketus ĉe ni pri lokucioj per kiuj esprimiĝas iu nomo, kaj poste provus informiĝi pri la aliaj per kiuj esprimiĝis siavice tiuj lastaj lokucioj, kaj ne ĉesus fari tion, ĉu tiam ne necesas ke la enketito finiĝus por rifuzi la sekvon?

HERM. Tiel ŝajnas al mi.

SOKR. Kaj kiam - laŭracie - ekĉesus kiu, neante, rezignas? Ĉu eble ne kiam li atingas tiujn nomojn kiuj taksigigas bazaj elementoj de la sinsekvaj lokucioj aŭ nomoj⁴⁷? Tiuj ĉi fakte, se tiaj estas, devas ne plu prezentiĝi kiel komponitaj el aliaj nomoj. Ekzemple, ni diris ĵusĵuse, ke *ἀγαθός* (bona) estas komponitaj el *ἀγαστός* (admira) kaj el *θοός* (rapida), kaj eble el aliaj, kaj eble tamen ni povus diri, ke *θοός* estas komponita el aliaj, kaj tiuj ĉi el aliaj; tamen se eventuale ni atingas tion kio ne estas komponita el alia nomo, ni prave povas diri, ke ni estas antaŭ elemento ne plu reirebla al alia nomo.

HERM. Al mi ŝajnas ke vi korekte rezonas.

⁴⁶ Sokrato daŭrigas lanĉi dubojn rilate sian etimologian analizon, kiu tamen trafas ion veran kontraŭ la tezo de Hermogeno, laŭ kiu la nomoj estas pure konvencijaj. Ĉi-punkte ŝajnas ke Platono allasu ke sia teorio estas sena je fundamento

⁴⁷ Sokrato estas altiranta Hermogenon konстати ke la duaj nomoj dependas de la unuaj, kaj rezultos ke ĝuste la unuaj estas nekoneblaj. Necesas do trairi alian vojon. Kiun?

SOKR. Kaj ĉu ne okazas, ke ankaŭ nun vi petas de mi, ĝuste, pri nomoj kiuj kelkmaniere troviĝas esti originaj elementoj kaj, do, pri kiuj ni devas ekzameni alimaniere kia estas ilia adekvateco?

HERM. Versimile estas.

SOKR. Jes, Hermogeno, versimilas; ŝajnas, fakte, ke ĉiuj antaŭaj nomoj dismembriĝus en tiujn ĉi. Sed se tiel estas, kaj tiel al mi ŝajnas esti, done vi ekzameni ĉi tie kune kun mi, por ke mi ne ekdeliru deklarante kia devas esti la adekvateco de la unuaj nomoj.

HERM. Vi parolu, ke, per la tuta kapablo en mi, mi ekzamenos kune kun vi⁴⁸.

Ĉapitro XXXIV

SOKR. Kaj pro tio, ke unusola estas la adekvateco de ĉiu nomo, kaj de la unua kaj de la lasta, kaj ke, en la fakto esti nomo, neniu el tiuj esceptas, mi opinias ke ankaŭ vi konsentas.

HERM. Ĉerte.

SOKR. Sed vere, almenaŭ rilate la nomojn pritraktitajn de ni ĝis nun, la serĉata adekvateco celis fariĝi tia ke ĝi sukcesu montri kia estas ĉiu el la aĵoj estantaj.

HERM. Kiel ne?

SOKR. Kaj tian karakterizon, ĉiukaze, devas posedi ne malpli la unuaj ol la postaj nomoj, se veraj nomoj.

HERM. Sendube.

⁴⁸ La sinteno de Sokrato al kuna esplorado estas ne nur provo por agrabligi ĉe la diskutantoj siajn vidpunktojn, sed temas pri vera menssinteno ĉar finfine li ne proponas sian konceptadon pri la lingvaĵo, se ne en la fina parto, kie tamen ne estas dirate kio la vortoj estas sed estas montrate kio ili ne estas.

SOKR. Sed la postaj, kiel versimilas, kapablis tion realigi per la helpo de la antaŭaj.

HERM. Tiel ŝajnas.

SOKR. Bone. Sed la unuaj nomoj, al kiuj ne jam faras subporton aliaj, per kiu maniero, laŭ plej eble, igos al ni ege evidentaj la aĵojn estantajn, se vere ili estas nomoj? Sed vi respondu pri tio: se ni havus nek voĉon nek lingvon, kaj volus montri unu al la alia la estaĵojn, ĉu eble ni ne provus signali, kiel nun faras la mutuloj, per la manoj kaj la kapo kaj cetera korpa?

HERM. Kaj efektive, kiel alie, ho Sokrato?

SOKR. Se, tial, almenaŭ laŭ mia opinio, ni volus indiki tion kio altas kaj malpezas, ni levus la manon en la direkton de la ĉielo, imitante la naturon mem de la aĵo; se, male, estaĵojn poziciitajn sube kaj pezajn, en la direkton de la tero. Kaj se ni volus indiki ĉevalon kurantan aŭ iun ajn beston, vi scias ke ni igus niajn korpojn kaj teniĝon kiel eble plej similaj al tiuj iliaj.

HERM. Al mi ŝajnas ke la afero nepre estas kiel vi diras.

SOKR. Tiamaniere fakte, mi opinias, okazus montra ago pri io: kiam la korpo, kiel versimilas, imitas la aĵon kiun ĝi volas montri.

HERM. Jes.

SOKR. Sed ĉar ni volas montri per la voĉo kaj lango kaj buŝo ion, ĉu kio devenas el tiuj ne rezultigas agon montran pri io kiam pere de tiuj okazus ago imita de kiu ajn aĵo?

HERM. Nepre, al mi ŝajnas.

SOKR. Tial la nomo estas, kiel evidentas, ago imitanta, per la voĉo, kion oni celas imiti: kaj kiu per la voĉo imitas, tiu nomas kion imitas.

HERMPGENO: Tiel ŝajnas al mi.

SOKR. Je Zeŭso, al mi, male, ŝajnas ke ankoraŭ ne estas konvinke eksplikate, amiko.

HERM. Kaj kial?

SOKR. Ni estus devigataj allasi ke kiuj imitas ŝafojn, virkokojn kaj aliajn bestojn almetas nomon al tio kion ili imitas.

HERM. Vi verdiras.

SOKR. Ĉu do ŝajnas al vi ke la afero laŭvere tias?

HERM. Al mi ne. Sed kia imitado povas esti la nomo, ho Sokrato?

SOKR. Unualoke, kredeble, al mi ŝajnas ke ni ne nomus se ni imitus la aĵojn laŭ la maniero per kiu ni ilin imitas per la muziko - kvankam eĉ ĉi-kaze ni imitas per la voĉo -; kaj eĉ ne se imitus ankaŭ ni la samajn aĵojn kiujn la muziko imitas. Jenon ĝuste mi pripetas: ĉu la aĵoj havas, ĉiu propre, siajn voĉon kaj figuron kaj, multaj el ili, koloron?

HERM. Certe.

SOKR. Probablas ke realiĝas nomiga tekniko ne kiam iu voĉe imitas tiaĵojn, kaj eĉ ne pentre tiujn bildigas; realiĝas fakte muzika tekniko en la unua kazo, kaj tiu pentra en la dua. Ĉu tiel ne estas?

HERM. Jes.

SOKR. Kaj kion pri tio vi diras? Ĉu al vi ne ŝajnas, ke unuopa estaĵo havas ankaŭ sian esencon, same kiel propran koloron kaj kion ni aludis ĵusĵuse? Kaj unue la koloro kaj voĉo, ĉu tiuj mem ne posedas sian esencon same kiel la ceteraj estaĵoj konsideritaj indaj esti nomataj posedantaj la eston?

HERM. Al mi ŝajnas.

SOKR. Tial, se iu kapablas imiti ĝuste tion de ĉiu estaĵo, nome la esencon, per literoj kaj silaboj, tiu ne rivelus tion kio estas ĉiu estaĵo? Aŭ ĉu ne?

HERM. Certe, certege.

SOKR. Kaj tial kiel vi difinus ulon kapablan tion fari? Rilate la antaŭajn vi diris ke la unua estas muzikulo, la alia pentristo; kaj kio pri tiu ĉi?

HERM. Al mi ŝajnas, ho Sokrato, ke tia, kiu estas ĝuste nia serĉindaĵo jam delongatempe, povus esti la nomanto.

Ĉapitro XXXV

SOKR. Tial, se tio veras, tempo estas ke oni ekzameni tiujn nomojn, pri kiuj vi pripetis, nome *ῥοή* (fluo), *ίέναι* (iri) kaj *σχέσις* (reteno): ĉu li, nome la nomanto, per literoj kaj silaboj kaptas je ili tion kio ili estas tiel ke imitiĝu ilia esenco, aŭ ne?

HERM. Certe.

SOKR. Nu, kuraĝu, ni vidu tial ĉu nur tiuj estas la unuaj nomoj aŭ ankaŭ aliaj multaj.

HERM. Mi opinias ke ankaŭ aliaj.

SOKR. Kaj tio versimilas. Sed kiu povas esti la vojo por ĉerpi tion el kio startas la imitanto kiam li komencas imiti? Ĉar la imito⁴⁹ de la esenco okazas per silaboj kaj literoj, ĉu la plej urĝa tasko ne estas distingi la elementojn, laŭmetode de interesitoj pri ritmoj kiuj distingas unualoke

⁴⁹ Oni notu, en platona rezonado, per kiuj ŝtupoj estas malfortigita la tezo de Kratilo laŭ kiu ne eblas diri malveron: a) la koncepto pri la nomo kiel imitaĵo de la aĵo; b) la koncepto pri la nomo kiel similaĵo al la aĵo; c) elmonro ke tia similaĵo ne necesas.

la valoron de la elementoj, poste de la silaboj, kaj tra tiu vojo ili alvenas konsideri laste la ritmojn, sed ne antaŭe?

HERM. Jes.

SOKR. Do, ĉu ankaŭ ni ne distingu unualoke la vokalojn, poste, de la aliaj, laŭ kvalito de iliaj elementoj senvoĉaj kaj mutaj - proksimume tiel diras la spertuloj pri tiuj aferoj - kaj plue tiujn kiuj ne estas ankoraŭ vokaloj, sed neniel mutaj? Kaj inter la vokaloj, tiujn kiuj havas mal-samajn kvalitojn⁵⁰? Kaj post tiu distingado inter la elementoj, ni denove devas en ĉiuj estaĵoj, al kiuj necesas asigni la nomojn, klare distingi ĉu inter ili troviĝus kelkaj al kiuj ĉiuj aliaj rilatas kiel al la elementoj, kaj el kiuj eblas travidi ilin mem kaj konstati ĉu inter ili estas diferencaj specoj, same kiel jam en la elementoj. Post diligenta ekzameno pri ĉiuj tiaĵoj, necesas listigi unuopan elementon laŭ la simileco, kaj se el ili al unusola aĵo necesas atribui unu solan, kaj se multajn kunmiksitaĵojn: same kiel faras la pentristoj kiuj, kiam volas pentri portreton similtan, foje almetas nur purpuron foje kiun ajn koloron, sed foje multajn kunmiksitaĵojn, ekzemple kiam ili pretigas homan karnecan koloron aŭ alian samtipan - laŭ, mi opinias, la koloro taksata bezona al la unuopa bildo -; tiel ankaŭ ni atribuos la elementojn al la estaĵoj, unukaze unusolan al unusola estaĵo, tiun kiu povas ŝajni bezonata al ĝi, alikaze multajn kune, formante ĝuste kion ni nomas silabojn, kaj kunigante siavice la silabojn, je kiuj estas formataj la nomoj kaj la lokucioj; kaj plue per la nomoj kaj lokucioj ni sukcesos komponi ion grandiozan, belan, kaj kompleksan⁵¹: same tiel tie la vivantan estaĵon per la pentro, tie ĉi la paroladon per la nomado-arto, la

⁵⁰ Sokrato atentigas pri la fonetiko disdividante la vortojn en ties elementoj. Jam la sofista movado tion ekkultis. Je lumo de la hodiaŭa fonetiko, la tiea klasifiko estas ne-kompleta. Ĉiukaze ĉi-tie Platono komencas utiligi kriterion apogitan sur la maniero de la sonartikulacio krom sur ĝiaj karakterizoj.

retoriko aŭ kiu ajn arto. Aŭ plibone, ne ni; parolante mi min lasis treniĝi! Fakte, tiaĵojn, kiajn nun aperas konstruitajn, kompilis la antikvuloj; rilate nin, se kapablaj ilin kribri laŭsagace, ni devas, tiel distingante, tiumaniere observi ĉu la originaj nomoj kaj la postaj estis atribuitaj adekvate aŭ ne: kunigi alimaniere, vidu, kara Hermogeno, ke ne estiĝu afero stulta kaj devojiga⁵².

HERM. Eble, je Zeŭso, ho Sokrato.

Ĉapitro XXXVI

SOKR. Nu? Ĉu vi tiel konfidas je via lerteco ke vi povu distingi tiaĵojn tiucele? Rilate min, mi ne!

HERM. Kaj tial mi estas tre fora.

SOKR. Ĉu ni rezignu tiaĵojn, do? aŭ ĉu vi volas ke, laŭ niaj fortoj, ankaŭ se ni kapablas travidi apenaŭan ion de ili, ni reprovu, antaŭmetante tamen, kiel antaŭ nelonge ni faris rilate la diojn, ke, kvankam nenion sciante pri la vero, ni prezentu la ideojn de homoj rilate tiaĵojn? Kaj tiel ankaŭ nun ĉu vi volas ke ni procedu dirante al ni mem ke se neprus ke ni aŭ kiu ajn ilin distingus, por bona rezulto necesus ilin distingi laŭ tiu metodo, sed ke ni nun devus engaĝiĝi pri tiu temo laŭ, se tion diri per komuna moto, niaj fortoj? Aŭ kiel vi diras?

⁵¹ Sen sin lasi altiri de la komplekseco, Platono rilate la lingvan fenomenon tiun traktos pli komplete kaj distinkte en la *Sofisto*. Ĉi tie estas prilaborata teorio pri la nomo.

⁵² Sokrato, ĉi-punkte, opinias ke estas jam definitive montrate ke la nomo havas sian laŭnaturan adekvatecon garantiatan el ĝia rilato kun la nomo mem, ne el ĝia rilato kun la aĵo estanta. Sed estas momenta konkludo ĉar tiuposte li rezultigos ke ne eblas, kaj absurdas, vidi adekvatecon, aŭ kiun ajn konformecon, inter elementaj fonetikaj vortpecoj kaj aspektoj de la realo.

HERM. Certe, ŝajnas al mi ĝuste tiel.

SOKR. Riveligōs ridinde, laŭ mi, ho Hermogeno, ke la objektoj imititaj per literoj kaj silaboj estus definitaj; tamen tio nepras. Fakte ni havas nenion pli utilan ol eniri la veron de la pranomoj, kondiĉe ke vi ne volu ke, imite de la tragediistoj kiuj en malfacilaĵoj sin turnas al artifikoj alten tirante la diojn, ankaŭ ni forfuĝos el la embaraso tiel dirante: la unuajn nomojn asignis la dioj kaj, do, ili estas adekvataj. Ĉu eble ankaŭ por ni tiu estas la plej efika el la pruvoj? Aŭ eble ke ni ilin ricevis el kelkaj barbaroj kaj la barbaroj estus pli antikvaj ol ni? Aŭ ke pro la antikveco ne eblas ekzameno same kiel okazas rilate la nomojn el la barbaraj gentoj? Tiaj pruvoj, fakte, estus ĉiuj eskapvojoj, kaj eĉ ruze persvadaj ĉe tiuj kiuj ne volas montri kiamaniere el la unuaj nomoj estis asignitaj adekvate. Tamen, kiu ne konas, iumaniere, la adekvatecon de la unuaj nomoj, ne kapablas gajni scion pri la postaj, kiuj senescepte povus esti klarigitaj per tiuj kiuj ni nenion scias; klaras, male, ke kiu sin proklamas spertulo pri tiuj, estas devigata tion pruve montri super ĉio kaj sendubige rilate la unuajn monojn, aŭ devas scii ke pri la lastaj li povus diri nur stultaĵojn. Aŭ ĉu traalivoje kuras via opinio?

HERM. Ne, absolute ne malsampense, ho Sokrato.

SOKR. Ĉiukaze tio kion ni mense elpensis rilate la unuajn nomojn estas ofenda kaj ridinda⁵³. Mi vin igas partoprena se vi volas; sed se vi sukcesus elfosi, el kiu ajn fonto, ion pli taŭgan, engaĝiĝe provu kaj igu partoprena ankaŭ min.

HERM. Tion mi faros. Sed vi kuraĝe antaŭeniru.

⁵³ Sokrato, kvankam engaĝiĝinta pravi ke la lingvaĵo havas ian adekvatecon ne el uzo kaj konvencio, nun avertas siajn kunparolantojn, ke ili ne tro fidu pri la etimologioj trovitaj kaj elpensitaj de li kaj ke ne eblas malkovri, per tiu vojo, adekvatecon inter la nomoj kaj la aĵoj.

Ĉapitro XXXVII

SOKR. Unualoke, do, la $\acute{\rho}\acute{\omega}$ al mi ŝajnas esti instrumento de la tuta *κίνεσις* (movo), pri kiu ni ne jam diris kial ĝi havas tiun nomon; sed klaras, ke ĝi volas esti *εἶσις* (irado): fakte, antikvajn tempojn oni ne profitis je *ἦτα*, sed je *εἶ*. La komenco startas el *κίειν* (iri) - nomo fremda - kiu signifas *ἰέναι* (iri). Se, tial, iu trovus la antikvan nomon kongruan al nia lingvo, ĝin li korekte nomus *ἔσις*; sed nun el la fremda *κίειν*, per la anstataŭo de *ἦτα* kaj enŝovo de *νῦ* estis nomita *κίνεσις*, sed ĝi devintus esti nomita *κείνεσις* [aŭ *εἶσις*]. *Στάσις* (halto) inspiras certe la malon de *ἰέναι* (iri), sed pro plibeligo estis nomita *στάσις*. La elemento $\acute{\rho}\acute{\omega}$, do, mi tion ripetas, ŝajnis esti bela instrumento de la movo al la nomasignanto pro ĝia similo al *φορᾶ* (movo), kaj, fakte, multloke tiun ĉi li uzis anstataŭ tiun: unualoke, en la sama *ρεῖν* (flui) kaj *ροή* (fluo) li imitas per tiu litero *φορᾶ*, kaj poste en *τρόμος* (tremo) kaj en *τρέχειν* (kuri) kaj ankaŭ en la verboj similaj, kiel *κρούειν* (puŝi), *θραύειν* (rompi), *ἐρείκειν* (disŝiri), *θρύπτειν* (dispecigi), *κερματίζειν* (percetigi), *ῥυμβεῖν* (turnigi), ĉiujn tiujn aferojn li perceptigas per la $\acute{\rho}\acute{\omega}$. Li vidis fakte, mi opinias, ke la lango pro tiu litero restas malofte senmova, dum male ege vibras: tial al mi ŝajnas ke li profitis tiun tiucele. *Ἰώταν*, aliflanke, li profitis ĝin aplikante al ĉio leĝera, ĉar ĝi taŭge povas perfekte *ἴοι ἄν* (povas iri) tra ĉiuj aĵoj. Tial *ἰέναι* (iri) kaj *ἰεσθαί* (sin ĵeti) li aranĝis pere de *ἰῶτα*, kiel ankaŭ pere de *φεῖ* (fi), *ψεῖ* (psi), *σίγμα* (sigma) kaj *ζῆτα* (zeta), kiuj estas literoj frikativaj, li imitis ĉiujn tiaĵojn kunige nomasignante, ekzemple *ψυχρὸν* (frostoj), *ζέον* (bola), *σειεσθαί* (skuiĝi) kaj vortkomplekso *σεῖ σμόν* (skuo). Kaj vi imitas tion kio havas blovoformon, tie ĉiukaze, la nomasignanto ŝajnas enmeti precipe tiujn literojn. Cetere, la forton de la premo kaj apogo de la lango en la *δέλτα* kaj *ταῦ* eble li estimis utila por la imito de *δεσμὸς* (ligo) kaj *στάσις* (halto). Kaj konstatinte ke la lango *ὀλισθάνει* (glitas) aparte en la *λάβδα*, por ilin similigi al tio li

por tiuj eltrovis la nomojn *λεῖα* (glataĵoj), kaj ankaŭ *ὀλισθάνειν* (gliti), *λιπαρός* (unkta), *κολλῶδες* (gluteneca) kaj samspecaĵojn. Pro la fakto ke, krome, al la glitado de la lango kontraŭstaras la forto de *γάμμα*, li kreis *γλίσχυρος* (viskeca), *γλυκὸν* (dolĉa) kaj *γλοιῶδες* (glueca). Sed ankoraŭ, perceptinte en *νῦ* la internecon de la voĉo, li enkondukis la nomojn *ἔνδον* (interno) kaj *ἐντὸς* (ene), kvazaŭ li volus produkti per literoj la realon. Kaj, plue, li sin helpis asignis *ἄλφαν* al *μεγάλω* (granda) kaj *ἦταν* al *μήκος* (longo), ĉar tiuj literoj estas grandaj. Bezoninte la signon *οῦ* por *γογγύλος* (ronda), malavare miksitis ĉion en la konstruon de la nomo. Kaj ankaŭ rilate aliajn estaĵojn la nomasignanto ŝajnas procedi samtiele, konstruante, literon post litero kaj silabon post silabo, signon kaj nomon por ĉiu el la aĵoj estantaj, kaj startante el tiuj, daŭrigante en la produktado, li ŝajnas sukcesinti kompili la ceterojn per tiuj samaj. Tia, Hermogeno, ŝajnas esti la origino de la adekvateco de la nomoj, kondiĉe ke Kratilo, ĉi tie kun ni, ne diras alie.

Ĉapitro XXXVIII

HERM. Certe, ho Sokrato, Kratilo multe ĝenas min, kiel mi diris ĉe la komenco, kiam li asertas ke estas jes ja adekvateco en la nomoj, sen tamen klarigi kia ĝi estas, tiel ke mi ne sukcesas kompreni ĉu ĉiufoje li pri tio parolas tiom obskure intence aŭ hazarde. Nun, do, Kratilo, antaŭ Sokrato diru al mi ĉu al vi plaĉas la maniero elpensita de Sokrato por paroli pri la nomoj, aŭ ĉu, male, vi havas alimaniere ion por diri pli belan. Kaj se tion vi havas, eksplicite diru por ke vi aŭ lernu el Sokrato aŭ instruu nin du.

KRAT. Kial, ho Hermogeno? Ĉu al vi ŝajnas ke facilas lerni kaj instrui tiom rapide iun ajn aferon, kaj senriske iun tiel gravan, kiu prezentiĝas, pravege, kiel la plej granda inter la grandegaj?

HERM. Je Zeŭso, al mi ne! Sed mi taksas utila la diron de Heziodo, laŭ kiu se iu akumulas, ankaŭ se nur malmulton al malmulto, okazas

avantaĝo. Se, do, vi kapablas fari eĉ nur iomete pli, ne rezignu, sed faru tiun plezuron al Sokrato - ĉar vi estas justa - kaj al mi.

SOKR. Cetere, ankaŭ mi, Kratilo, ne engaĝiĝus defendi ĝisfunde iun ajn el la antaŭaj miaj diritaĵoj, sed mi provis ilin ekzameni kune kun Hermogeno, laŭ maniero de mia opinio, tial ke almenaŭ pro tio parolu kuraĝe, se vi havas ion pli belan por diri, ĉar mi pretas ĝin ricevi. Kaj se vi vere havas ion pli belan ol tion por diri, mi ne mirus: al mi, fakte, ŝajnas, ke vi tiaĵojn jam mem konsideris kaj ilin lernis el aliaj. Se vi, do, decidus komuniki ion pli belan, alskribu ankaŭ min kiel unu el viaj lerne esplorantoj pri la adekvateco de la nomoj.

KRAT. Vere, ho Sokrato, mi interesiĝis, kiel vi diras, pri tio kaj eble mi igus vin mia disĉiplo. Tamen mi timas ke la afero estas tute malsama ol tio, ĉar iumaniere ekscitiĝas en mi deziro ripeti al vi la frazon de Aĥilo, tiun kiun li diras al Ajakso en la Preĝoj: “Ajakso, posteulo de Zeŭzo, Telamoniido, sinjoro de popoloj / ĉion vi sciis diri laŭbezone de mia animo”. Ankaŭ vi al mi, ho Sokrato, ŝajnas orakoli laŭ la deziroj de mia koro, jen se vin inspiris Eŭtifrono jen se alia Muzo jam delonge en vi, sen via konscio.

SOKR. Ho bona Kratilo, mi delonge miras el mi mem pri mia saĝo, kiun tamen mi ne fidas. Al mi ŝajnas, do, ke necesas rekonsideri kio estas tio kion mi diras. Esti erarigita ĝuste de si mem estas la plej grava el ĉiuj: fakte, se la erariganto el ni ne malapudas eĉ ne malmulte, sed ĉiam loĝas ĉe ni, kiel tio ne povas terure esti? Necesas pro tio, kiel konvenas, reiri plurfoje al tio kion oni diris antaŭe kaj provi rigardi, kiel diras fama poeto, “samtempe antaŭen kaj malantaŭen”. Kaj, do, jam ek de nun ni vidu kion ni diris. Adekvateco de la nomo, ni tiel juĝas, estas kio sukcesas montri tion kio la aĵo estas: ĉu ni povas prave konkludi ke tio estis sufiĉe asertita laŭ kontentiga maniero?

KRAT. Ege kontentige, laŭ mi, Sokrato.

SOKR. Tial, ĉu celante instruon oni diras la nomojn?

KRAT. Certe.

SOKR. Ĉu pro tio ni rajtas diri ke tio estas arto kaj ke ekzistas tius-
pecaj teknikistoj?

KRAT. Sendube.

SOKR. Kiuj?

KRAT. Tiuj kiujn vi menciis ĉe la komenco, la leĝofaristoj.

SOKR. Kaj ĉu ni povas subteni ke ankaŭ tiu arto naskiĝas inter la
homoj kiel la aliaj artoj aŭ ne? Mi celas diri tion: ĉu inter la pentristoj
troviĝas iuj lertaj aliaj mallertaj?

KRAT. Certe.

SOKR. Kaj do ĉu la plej lertaj liveras pli belajn siajn laboraĵojn,
tiukaze figurojn, kaj la malpli lertaj malpli belajn? Kaj sammaniere la
domfaristoj: ĉu ne okazas ke iuj konstruas domojn pli belajn, aliaj mal-
pli belajn?

KRAT. Jes.

SOKR. Kaj do, ĉu ankaŭ inter la leĝofaristoj iuj liveras produktaĵojn
pli belajn kaj aliaj malpli belajn?

KRAT. Tio jam tia al mi ne ŝajnas⁵⁴.

SOKR. Ĉu al vi eble ne vidiĝas ke, inter la leĝoj, iuj estas plibonaj,
aliaj malpli validaj?

KRAT. Ne, certe ne.

SOKR. Tial eĉ ne rilate la nomojn, supozeble, al vi ŝajnas ke iu estas
asignita malplibone, alia plibone.

KRAT. Ne, sammotive.

⁵⁴ Por Kratilo valoras nur unu el du alternativaj kornoj: aŭ tute vera aŭ tute falsa; kiu scias ion ĉion scias pri ĝi; sukceso aŭ malsukceso.

SOKR. Tial ĉu la nomoj, ĉiuj, estis asignitaj laŭadekvate?

KRAT. Tiu kiuj almenaŭ estas veraj nomoj.

SOKR. Sed kiel? Ĉu ni ne asertas, kiel ni diris ĵusĵuse, ke al *Ἑρμογένες* (Hermogeno), ĉi tie ĉeesta, tiu ĉi nomo eĉ ne estis asignita, se al li ne konvenas io de la *Ἑρμοῦ γένεσις* (generacio de Hermeso), aŭ ke al li estis jes asignita, sed ne laŭ adekvateco?

KRAT. Ĝi al li eĉ ne estis asignita, laŭ mi, ho Sokrato, laŭaspekto al li ĝi estis atribuita, sed temas pri nomo apartenanta al iu alia, kies tiu oportune estas ankaŭ la naturo.

SOKR. Kaj ĉu oni eĉ ne mensogas kiam oni diras ke tiu ĉi estas Hermogeno? Alertiĝu, fakte, ke, aliflanke eĉ tio ne eblas: diri ke tiu ĉi estas Hermogeno, se li tia ne estas.

Ĉapitro XXXIX

KRAT. Kiel vi diras?!

SOKR. Ke aserti malveron, do, absolute ne eblas: ĉu tion ne implicas via logikaĵo? Estas multaj kiuj tion paradas, amiko Kratilo, kaj nune, kaj pasinte.

KRAT. Fakte, kiel povus iu, dirante kion estas diranta, diri ne tion kio estas? Aŭ ĉu ne estas jeno mensogo: diri ne la aferojn kiel ili estas?

SOKR. Tro subtila via parolado por mi kaj mia aĝo, karulo. Tamen bonvole respondu tion: ĉu al vi ŝajnas ke ne eblas pensi malveron, sed ĝin eldiri jes?

KRAT. Eĉ ĝin eldiri, laŭ mi ne eblas.

SOKR. Kaj ĉu eĉ ne aserti aŭ voki? Ekzemple, se iu, vin renkontante en fremda lando, premante vian manon al vi adresiĝus: “Saluton, eksterlande vaganta Atenano, Hermogeno, filo de Smikriono”, ĉu tiu el-

dirus tion aŭ asertus tion aŭ subtenus tion aŭ vokus tiel ne vin, sed tiun ĉi Hermogenon, aŭ iun alian? Aŭ neniun?

KRAT. Tiu ulo, ho Sokrato, laŭ mia sento, tiam elirigus nenion krom bruojn.

SOKR. Sed ankaŭ tiaĵo sufiĉas niabezone! Fakte kiu farus tiajn bruojn, tiu ilin elirigus veraj aŭ malveraj? Aŭ parte veraj kaj parte malveraj? Ĉar eĉ tio sufiĉus niabezone!

KRAT. Mi dirus, ke tiu bruegas, skuante senfrukte sin mem, kvazaŭ iu skuus bronzan vazon ĝin batante.

SOKR. Ek, ni vidu ĉu ni povas kelkmaniere akordiĝi, Kratilo: ĉu vi ne dirus ke unu afero estas la nomo, alia afero estas la aĵo kies ĝi estas nomo?

KRAT. Mi jes.

SOKR. Ĉu vi, do, konsentas ankaŭ ke la nomo estas iuspeca ago imitanta la aĵon?

KRAT. Sendube.

SOKR. Kaj tial ĉu vi diras ke ankaŭ la pentraj plenumaĵoj estas alimaniere agoj imitantaj certajn objektojn?

KRAT. Jes.

SOKR. Ek diru - ĉar eblas ke mi ne komprenas kion vi diras, dum povas esti ke vi diras korekte -: ĉu eblas asigni tiujn du imitaĵojn, la pentraĵajn kaj nomecajn, kaj ilin apudigi al la koncernaj objektoj kies ili estas imitaĵoj, aŭ ĉu ne?

KRAT. Eblas.

SOKR. Kaj antaŭ ĉio konsideru jenon. Ĉu oni ne povus asigni la figuron de viro al viro, tiun de virino al virino, kaj tiel la aliajn?

KRAT. Certege.

SOKR. Ĉu ankaŭ la kontraŭon, tiun de viro al virino, kaj tiun de virino al viro?

KRAT. Eblas eĉ tio.

SOKR. Kaj ĉu tiuj asignoj estos eble ambaŭ korektaj aŭ unu sola?

KRAT. Unu sola.

SOKR. Tiu, mi kredas, kiu asignu al ciu aĵo la konvenan kaj la similan.

KRAT. Al mi ŝajnas tiel.

SOKR. Kaj por ke ne batalu pervorte mi kaj vi, kiuj estas amikoj, konsentu kun tio kion mi komunikas. Mi difinas korekta, amiko mia, tian asignon bazitan sur ambaŭ imitaĵaj agoj, laŭfiguraj kaj laŭnomaj, sed tiu bazita sur la nomoj estas krom korekta ankaŭ vera⁵⁵; la alia, tiu kiu reprodukas kaj koncernas malsimilon, ne korekta, kaj ankaŭ malvera se koncernanta la nomojn.

KRAT. Atentiĝu, Sokrato, ke tio eble povas okazi rilate pentraĵajn plenumaĵojn, tio estas atribuo nekorekta, sed rilate la nomojn ne, ĉar necesas ke tio okazu ĉiam laŭadekvate.

SOKR. Kion vi diras? Laŭ kiu aspekto tiu ĉi (kazo) distingiĝas el tiu? Ĉu ne povas okazi ke iu, alproksimiĝante al viro, al tiu dirus: “tiu portreto koncernas vin” kaj al li indikus, unufoje, bildon de li kaj, alifoje, bildon de virino? Kaj por ‘indiki’ mi intencas meti sub la sensaco de la okuloj.

KRAT. Certe.

SOKR. Kaj tiam? Ĉu ne eblas, denove alproksimiĝante al la sama ulo, al li diri: “Tiu ĉi estas via nomo”? Iumaniere ankaŭ la nomo estas imita ago kiel la plenumaĵo pentra. Jenon mi celas diri: ĉu ne eblas diri al li: “Tiu ĉi estas via nomo”, kaj samtempe submeti al la percepto de

⁵⁵ Ĉi tie, ŝajnas, Sokrato akceptas la naturan apudecon de adekvateco kaj vero, sed temas nur pri dialoga taktiko; fakte je la fino tiu vidpunto estos tute forigita.

lia aŭdkapablo, unukaze, agon lin imitantan, kun la diro “viro”, kaj, alikaze, alian imitantan la virinan flankon de la homa genro, kun la diro “virino”? Ĉu al vi ne ŝajnas ke tio foje okazas?

KRAT. Mi volas, ho Sokrato, allasi tion: estu tiel!

SOKR. Kaj vi bone agas, karulo, se tiel vi sentemas: fakte nun rilate tiun punkton ne bezonatas ke ni kontraŭstaru. Sed se, do, ankaŭ ĉi-rilate oni uzas similan asignon, unu el tiuj ni volas difini ‘diri la veron’, la alia, male, ‘diri la malveron’. Se la aferoj tiel statas, kaj eblas asigni la nomojn nekorekte kaj ne asigni tiujn konvenajn al ĉiu okazaĵo, sed foje tiujn nekonvenajn, eblos tion fari ankaŭ rilate la verbojn. Sed se tio eblas por la verboj kaj nomoj, tio eblos ankaŭ por la paroladoj: la parolaj esprimoj, fakte, se mi ne mallerte opinias, estas la kombinaĵo je tiuj. Aŭ kiel vi opinias, Kratilo?

KRAT. Sammaniere: mi juĝas, fakte, ke vi diras prave.

SOKR. Kaj se ni denove komparas la unuajn nomojn kun la pentraĵoj eblas, jes, asigni, sed kiel en pentraj laboraĵoj, ĉiujn kolorojn kaj la konvenan aspekton, sed ankaŭ ne ĉiujn, kaj preterlasi iujn el ili kaj ankaŭ kelkajn aldoni, kaj ege plurajn kaj pli grandajn. Aŭ ĉu tiel ne estas?

KRAT. Tio okazas.

SOKR. Kaj, do, ĉu kiu asignas ĉiujn tiujn ne realigas belajn portretojn kaj figurojn, dum kiu je tiuj aldonas, aŭ malaldonas, produktas same portretojn kaj figurojn, sed malbelajn?

KRAT. Jes.

SOKR. Kaj, tial, kiu per literoj kaj silaboj produktas la esencon de la estaĵoj? Ĉu, apogite sur la sama regulo, se li asignas ĉiujn konvenajn elementojn, la bildo - tio estas la nomo - ne estos bela, dum se li preterlasas aŭ aldonas, eĉ malmulte, ne naskiĝas, jes, bildo, sed ne bela? tiel ke el nomoj iuj estos produktitaj bone, aliaj malbone?

KRAT. Eble.

SOKR. Kaj, do, ĉu troviĝos tiam la nomasignanto bona kaj la malbona?

KRAT. Jes.

SOKR. Sed ĝuste ĉi tiu havis la nomon ‘leĝofaristo’.

KRAT. Jes.

SOKR. Eble, tial, je Zeŭso, troviĝas, kiel en aliaj artoj, ankaŭ leĝofaristo unu lerta kaj alia mallerta, almenaŭ se kio ĵusjuse de ni dirita estas koncedita.

KRAT. Estas tiel. Sed vidu, ho Sokrato, kiam tiujn literojn, nome *αλφα* kaj *βήτα* kaj ĉiuj elementoj, ni asignas al la nomoj per la gramatika tekniko, se je ili ni forprenus aŭ aldonus aŭ translokigus kelkajn, ne okazas ke la nomo laŭ ni estas skribata, ankaŭ se ne korekte, male, ĝi neniel estas skribata kaj ĝi tuj fariĝas alia kiam ĝi suferas je tiaĵo⁵⁶.

SOKR. Sed estu atenta, Kratilo, ke esplorante tiaprincipe ni ne risku esplori neefike.

KRAT. Kiamaniere tio?

SOKR. Eble kion diritan de vi povas elteni estaĵoj kiuj necese estiĝas aŭ ne estiĝas danke al determinita numero kiel, ekzemple, en la deko aŭ en alia ajn numero: kiam vi deprenas aŭ aldonas ion, ĝi tuj fariĝas alia. Sed atentigu ke rilate iun ajn kvaliton aŭ la tutan bildan kvanton la adekvateco ne estu tiutipa, kaj ke, male, se vere volas esti bildo, ĝi absolute ne bezonus asigni ĉiujn elementojn tiel kiel ili ĉeestas en tio kies ĝi estas bildo. Bonvolu sekvi mian rezonadon. Ĉu ne povas esti du kiel la jenaj, se ekzempli, Kratilo kaj bildo de Kratilo, se unu el la dioj ne nur realigus viajn koloron kaj aspektojn kiel faras la pentristoj, sed kopie eksterigus ankaŭ vian enon kiel ĝi estas en vi, kaj reproduktus la samajn

⁵⁶ Kratilo insistas koincidigi malveron kun neekzistado sekvante ĉi-kaze, eble, la eleatikan skolon.

morbidecojn kaj la saman varmecon, kaj enskribus la samajn movon kaj animon kaj raciecon kiaj ili estas en vi, kaj, per simplaj vortoj, ĉiujn karakterizojn de vi posedatajn, kaj je ili enmetus aliajn tute konvenajn al vi? Tiukaze, ĉu estus Kratilo kaj la bildo de Kratilo, aŭ du Kratiloj?

KRAT. Al mi, ŝajnas, Sokrato, du Kratiloj.

Ĉapitro XL

SOKR. Ĉu vi vidas, do, amiko, ke necesas serĉi alitipan adekvatecon de la bildo kaj de aĵoj pri kiuj ni parolis ĵusjuse, kaj ne devigi la bildon, se en ĝi mankas io aŭ io estas aldonita, ĉesi esti tia? Aŭ ĉu vi ne konscias pri kiom la bildoj malproksimas el posedo de la samaj karakterizoj de la aĵoj de kiuj ili estas bildo?

KRAT. Mi jes.

SOKR. Kaj estus, tial, ridinda, Kratilo, tio kion suferus pro la nomoj tiuj aĵoj kies la nomoj estas nomoj, se ĉiuj sub ĉiuaspekte fariĝus similaj al tiuj. Ĉiuj estaĵoj, fakte, iumaniere fariĝus duoblaj, kaj pri neniu el ili oni sciis diri kiu estas la estaĵo mem kaj kiu la nomo.

KRAT. Vi diras laŭvere.

SOKR. Ek do, nobla homo, rekonu ke ankaŭ rilate la nomon, unu estu asignita perfekte, alia ne, kaj ĝin ne devigu havi ĉiujn literojn por esti precize tia kia la objekto kies ĝi estas nomo, sed permesu ke ĝi enhavu ankaŭ literon ne konvenan. Kaj se tio rilate literon, ankaŭ rilate nomon en esprimo; kaj se rilate nomon, allasu ke renkontiĝu ankaŭ esprimo neadekvata en frazo, kaj ke malgraŭ tio la objekto estu nomata kaj esprimata, ĝis kiam en ĝi aperas la stampo de la objekto pri kiuj temas la esprimo, same tiel en la nomoj de la literoj, se vi memoras kion diradis ĵusjuse mi kaj Hermogeno.

KRAT. Jes, mi pri tio memoras.

SOKR. Bone, do. Fakte, kiam en ĝi troviĝas tia stampo, ankaŭ se allasite ke ĝi ne posedas ĉiujn karakterizojn konvenajn, la objekto estos certe esprimita, bone kiam je ili ĝi posedas ĉiujn, malbone kiam posedas malmultajn; ni allasu, karulo, ke ĝi estu esprimita, por eviti esti monpunitaj kiel kiu en Egino pasumas laŭstrate noktomalfrue kaj ne taksigi ankaŭ ni niavice atingantaj la veron pli malfrue ol dece. Aŭ serĉu alian adekvatecon de la nomo kaj ne konsentu kun la diro laŭ kiu la nomo estas ago montranta la objekton per silaboj kaj literoj. Ĉar se vi dirus ambaŭ tiaĵojn, vi ne povas sintonii kun vi mem.

KRAT. Sed al mi, Sokrato, ŝajnas ke vi parolas laŭmezure kaj mi kiel vi opinias.

SOKR. Ĉar, tial, tiaĵoj ĉe ni taksigas sammaniere, post tio ni esploru jenon: se la nomo, ni diras, devas esti asignita laŭadekvate, ĉu ĝi bezonas la konvenajn literojn?

KRAT. Jes.

SOKR. Kaj ĉu konvenas tiuj similaj al la objektoj?

KRAT. Certe.

SOKR. Tial la nomoj bone asignitaj estas asignitaj laŭ la supre menciita maniero; kaj se kelka el ili ne estis asignita bone, la ero pli grava el ĝi, eble, povus esti konstituata per literoj konvenaj kaj similaj, se ĝi aspiras esti bildo, sed ĝi povus enteni je ili ankaŭ kelkan ne konvenan, pro kiu la nomo ne estas bona kaj ne bone aranĝita. Ĉu ni tiel allasu aŭ alie?

KRAT. Mi opinias, ho Sokrato, ke ni ne devas kolizii pro io ajn: kvankam min ne kontentigas aserti ke nomo ĉeestas, kaj tamen ne estis adekvate asignita.

SOKR. Ĉu vin ne kontentigas jeno, ke la nomo estus ago montranta la objekton?

KRAT. Al mi jes.

SOKR. Sed ke iuj el la nomoj estas konstituataj per la antaŭaj, dum aliaj estas unuaj, ĉu tio ne ŝajnas al vi akceptinde dirate?

KRAT. Al mi, jes.

SOKR. Sed se la originaj nomoj devas esti agoj montrantaj certajn objektojn, ĉu vi konas metodon pli efikan por ke ili fariĝu agoj montrantaj ol ilin igi plej eble similaj al tiuj objektoj kiujn ili devas montri? Aŭ al vi pli plaĉas la metodo aludata de Hermogeno kaj multaj aliaj, tio estas ke la nomoj estas elementoj konvenciaj, kaj ke ili montras al tiuj kiuj elpensis la konvencion kaj jam konas la objektojn, kaj ke tiu konvencio estas la adekvateco de la nomo, kaj ke ne estas diverĝo se oni akordas kun la nuna situacio de la nomoj aŭ eĉ, male, se oni taksu granda kion nun ni nomas malgranda kaj malgranda kion ni nomas granda? Kiun el la du metodoj vi preferas⁵⁷?

KRAT. En ĉio kaj ĉiusence diferencas, ho Sokrato, montri kion oni volas montri per modelo simila ol per io okaza.

SOKR. Vi bone diras. Do, se la nomo devas esti simila al la objekto, ĉu ne necesas ke antaŭe ekzistas en naturo jam aranĝitaj la elementoj similaj al la objektoj je kiuj estas kombinitaj la unuaj nomoj? Mi celas diri jenon: ĉu iu kunmetintus tion pri kio ni parolis ĵusantaŭe, tio estas pentra plenumaĵo simila al iu ajn el la aĵoj estantaj, se ne ekzistus en naturo koloroj, helpe de kiuj estas formataj la objektoj pentritaj, similaj al tiuj kiujn imitas la pentra arto? Aŭ ĉu tio ne eblus?

KRAT. maleble.

SOKR. Tial ĉu sammaniere ankaŭ la nomoj neniam povus esti similaj al io ajn se tiuj komponantoj, helpe de kiuj estas kombinitaj la nomoj, ne ekzistus unualoke provizitaj je iu similo kun tiuj aĵoj kies la nomoj estas

⁵⁷ Kratilo ne cedas: pro lia naturalismo ne ekzistas nomoj malveraj aŭ malkorekte asignitaj. Metita antaŭ la alternativo inter simileco kaj konvencieco, la fiera naturaliso opcios - vidu tuj post - por la unua

imitaj agoj? Kaj ĉu ne estas la elementoj la materio je kiu ili devas esti kombinitaj?

KRAT. Jes.

Ĉapitro XLI

SOKR. Kaj do kuniĝu, fine, ankaŭ vi al la parolado al kiu jam aliĝis ĵusjuse Hermogeno. Ek, ĉu al vi ŝajnas ke ni korekte diris ke *ῥῶ* similas al *φορά* (foriro) kaj *κύνεις* (movo) kaj *σκληρότες* (malmolo), aŭ ni ne bone diris?

KRAT. Bone, al mi ŝajnas.

SOKR. Kaj *λάβδα* al *λείον* (glata) kaj al *μαλακὸν* (mola) kaj al tio ĵusjuse dirita de ni?

KRAT. Jes.

SOKR. Kaj sendube vi scias ke por la sama aĵo ni diras *σκληρότες* dum Eretrianoj nomas *σκληρότερ*⁵⁸.

KRAT. Certe.

SOKR. Ĉu tial *ῥῶ* (ῥ) kaj *σίγμα* (ς) similas ambaŭ al la sama aĵo kaj montras la saman aĵon al tiuj per vorto kun *ῥῶ* fina, kaj al ni per vorto kun *σίγμα* fina? Aŭ ĉu ili ĝin ne montras al ni aŭ al ili?

KRAT. Ĝin montras certe al ambaŭ.

SOKR. Ĉu tio pro la fakto ke *ῥῶ* kaj *σίγμα* taksigatas esti similaj, aŭ pro tio ke ili tiaj ne estas?

KRAT. Ĉar ili similas.

SOKR. Kaj ĉu ili eble similas ĉiuere?

⁵⁸ Konvenas percepti de tiu vorta malsamaĵo por komuniki samaĵon, por substreke sciigi, se ne jam perceptite, ke tiu ĉi tradukaĵo el la greka Kratilo sekvas, laŭeble, ankaŭ la vortan ordon kaj la aŭtoran frazan konstruon. Tio foje devigas relegi por kompreni, sed celas pli perceptigi la aŭtoran etoson.

KRAT. Almenaŭ rilate ilian econ montradi la $\varphi\rho\acute{\alpha}$ (movon), mi opinias.

SOKR. Kaj ĉu eble ankaŭ la $\lambda\acute{\alpha}\beta\delta\alpha$ kiu troviĝas ene? Ĉu tio ne montras la malon de $\sigma\kappa\lambda\epsilon\rho\acute{\omicron}\tau\epsilon\zeta$?

KRAT. Eble, fakte, ĝi estis enŝovita malkorekte, ho Sokrato. same kiel en la ekzemploj ĵusjuse prezentitaj al Hermogeno, kiam vi forprenis kaj aldonis literojn tie kie necesis, kaj tio al mi ŝajnis ke vi laŭrajte tion faris. Kaj nun, niakaze, eble, anstataŭ $\lambda\acute{\alpha}\beta\delta\alpha$ nepras eldiri $\rho\acute{\omega}$ ⁵⁹.

SOKR. Vi oportune diras. Kaj tial, rilate kion ni diras nun, ĉu ni neniel interkompreniĝas reciproke kiam unu diras $\sigma\kappa\lambda\epsilon\rho\acute{\omicron}\nu$ (malmola), kaj vi eĉ ne scias kion mi diras nun?

KRAT. Mi jes, almenaŭ helpate de la kutimo, karega.

SOKR. Sed dirante ‘kutimo’, ĉu vi opinias diri ion distingeblan el konvencio? Aŭ ĉu vi estas asertanta ke ‘kutimo’ estas io ajn malsama kaj ne la fakto ke mi, eldirante tiun vorton, aludas tiun aĵon kaj vi komprenas ke mi aludas tiun aĵon? Ĉu vi ne diras tion?

KRAT. Jes.

SOKR. Kaj, do, se kiam mi eldiras vorton, vi komprenas, okazas el mi al vi montra ago.

KRAT. Jes.

SOKR. Kaj tio, ĉiukaze, pro la malsimilo el tio kion intencas mi kiu eldiras, se $\lambda\acute{\alpha}\beta\delta\alpha$ malsimilas el tio kion vi diras $\sigma\kappa\lambda\epsilon\rho\acute{\omicron}\tau\epsilon$. Sed se tiel estas, kion alian tio signifas ol ke vi mem konvenciis kun vi mem kaj ke por vi la adekvateco de la nomo fariĝas kutimo, se konsideri ke ĝi havas kapablon montran⁶⁰ la literoj kaj similaj kaj la malsimilaj kiam ili eniras la kutimon kaj la konvencion? Sed se la kutimo (uzo) neni-

⁵⁹ Oni notu ke tiom post iom Sokrato distanciĝas el la eraklitea (ĉio malkonsistige fluas) filozofio, kaj por pli motive ĝin dispeli ekanoncos sian naskiĝantan teorion pri la ideoj, kiuj ĉiukaze restas firmaj kaj solidaj eĉ fronte al la monda medio kies aĵoj vere naĝas en flueco.

maniere koincidas kun konvencio, ne estus sufiĉe korekte diri ke la similo estas faktoro montra, sed tia estas la uzo: fakte, eĉ tiu ĉi ‘montras’, laŭŝajne, per la similo kaj malsimilo. Kaj ĉar ni interkonsentas pri tio, Kratilo - mi taksos vian silenton konsento - nepras ke kelkmaniere konvencio kaj kutimo kontribuu al la montrado de la aĵoj kiujn havas en menson ni parolantoj; ĉar, karega, se vi volas konsideri numero-sistemon, el kie vi opinias ke vi povos akiri la nomojn similajn por ĉiu unuopa numero se vi ne allasas ke via akordo kaj via konvencio havu iuspecan regon sur la adekvateco de la nomoj? Certe, ankaŭ al mi plaĉas ke la nomoj estu kiel plej eble similaj al la aĵoj; alertiĝu, tamen, ke tia altira forto de la similo ne estu inside viskoza, laŭesprime de Hermogeno, kaj ke ne necesu, male, profiti ankaŭ de tiu malnobla ilo, la konvencio, por la adekvateco de la nomoj. Ĉar, almenaŭ laŭeble, oni esprimiĝus multe pli bone, se oni parolus per vortoj, tute aŭ plejparte, similaj, nome difinantaj la objektojn, kaj multe malpli bone en la kontraŭa kazo. Sed, post tio, diru al mi plue jenon: kian fortunon posedas ĉe ni la nomoj kaj kion belan, laŭ ni, ili plenumas?

Ĉapitro XLII

KRAT. Ke ili instruas al mi ŝajnas, ho Sokrato, kaj ke tre evidentas jeno: kiu konas la nomojn, tiu konas ankaŭ la aĵojn estantajn.

SOKR. Eble, Kratilo, vi intencas diri ion similan al jeno: kiam iu scias la nomon kiel ĝi vere estas - kaj ĝi estas tia kia la objekto - tiu scias

⁶⁰ Fine riveligas laŭ kiu senco la nomo estas imita ago: ne inter la objekto kaj la nomo, sed inter la intenco de la eldiranto kaj la kompreno de la aŭskultanto. La nomo, do, ne priskribas, nek imitas, nek resumas; ĝi estas ago konvencia por montri iun aĵon. Sed el refuto de la teorio de Hermogeno ni scias ke konvencio devas respekti la naturan realon de la objektoj: do ne temas pri pura konvencio.

ankaŭ la objekton, ĝuste pro tio ke ĝi montriĝas⁶¹ simila al la nomo: kaj fakte unusola estas la arto rilate al ĉiuj aĵoj similaj inter si. Al mi ŝajnas, do, ke surbaze de tio vi asertas ke kiu spertas la nomojn tiu spertas ankaŭ la aĵojn.

KRAT. Veregas tio kion vi diras.

SOKR. Haltu momentete: ni esploru kia ajn povas esti tiu maniero de instruado de la aĵoj estantaj, pri kiu vi estas nun parolanta⁶², kaj ĉu vid-iĝas ankaŭ alia, kvankam restante tiu la pli efika, aŭ ĉu ne estas alia krom tiu. Laŭ kiu el la du manieroj vi trapensas?

KRAT. Mi certe laŭ tiu maniero: absolute troviĝas neniu alia, sed tiu estas la sola kaj la pli efika.

SOKR. Kaj ĉu vi opinias ke trovi la aĵojn estantajn estas tiu sama metodo, kaj ke kiu trovas la nomojn tiu trovis ankaŭ tiujn aĵojn kies ili estas la nomoj? aŭ ĉu la serĉado kaj trovado postulas alian metodon dum la lernado tiun?

KRAT. Certege, serĉado kaj trovado postulas tiun saman metodon rilate la samajn aĵojn.

⁶¹ Kiel oni vidis, la teorio de nomo kiel imito finiĝas en senliran kontraŭdiron kaj ĝenerale vanigas la eblon de konstanta adekvateco de la nomoj, al kiu apogiĝas diversmaniere kaj Hermogeno kaj Kratilo, kaj precipe malkonfirmas la eblon rilatigi la nomon al la aĵo kiel, male, okazas inter la aparta aĵo kaj la samo vidata en sia esenco.

⁶² El la sinsekvo de la diskutado kompreneblas ke por Sokrato imito estas simpla rilato inter la nomo kaj la aĵo dum por Kratilo ĝi estas identiĝo kun la aĵo, tiel ke kiu konas la nomon tiu konas ankaŭ la aĵon.

SOKR. Ek, Kratilo, alertigŭ: se iu serĉante la aĵojn spuras la nomojn, esplorante pri tio kio volas esti ĉiu, ĉu vi ne suspektas ke enplektiĝas ne malgranda risiko sin trompi⁶³?

KRAT. Kiamaniere?

SOKR. Klaras ke kiu unua metis la nomojn, kiaj li juĝis la aĵojn, tiaj li asignis la nomojn. Aŭ ĉu ne?

KRAT. Jes.

SOKR. Se, do, tiu ne taksis laŭkorekte, sed metis la nomojn laŭ sia etalono, kion vi opinias ke okazos ĉe ni lin sekvantaj? Ĉu io alio ol esti devojigitaj?

KRAT. Ne tiel ponendas la afero, ho Sokrato, kaj, male, nepras ke la nominto sciante metis la nomojn: alimaniere, kiel mi jam diris, ili eĉ ne estus nomoj. Kaj la pleja pruvo ke la leĝa nominto ne trompiĝis estu por vi jeno: ili ne estus ĉiam ĉiuj harmoniantaj inter si. Kaj ĉu tiel ne opiniis ankaŭ vi mem dirante ke ĉiuj nomoj naskiĝis sammaniere kaj por sama celo?

SOKR. Sed tio, bona Kratilo, nenimaniere estas defendo. Fakte, se, post la unua eraro, la nomanto daŭrigis asigni aliajn perforte ilin harmoniigante kun tiu unua, tio ne strangas; tio okazas foje ankaŭ rilate la geometriajn figurojn: se oni plenumis unuan eraron, eĉ malgrandan kaj kaŝan, la aliaj sinsekve alvenontaj samsortas kun la unua, eĉ se pluraj. Nepras, tial, ke ĉe la komenco de ĉiu afero ĉiu homo plenumu profundan rezonadon kaj profundan konsideron por certiĝi ĉu tiu subporte

⁶³ Grande gravas tiu sokrata demando ĉar ĝi klarigas la pozicion de Platono: el tio klare rezultas ke la celo de Platono en *Kratilo* estas opono al la reduktado de la esploro pri la aĵoj al esploro pli la nomoj. Inter la nomoj kaj la aĵoj estas neniu, natura kaj efektiva, konekso. Tial la vortoj ne povus esti ilo por atingi la konon, sed ili estas subkondiĉitaj al la estaĵoj.

funkcias akurate aŭ ne, kaj ke, kiam ĉio estas ekzamenita laŭ postulita maniero, la cetero alestiĝu kiel ties sekvo. Ĉiukaze mi mirus se ankaŭ la nomoj akordus unuj kun la aliaj. Ekzamenu denove, fakte, ni kiujn ni pritraktis antaŭe. Ni estas, fakte, subtenantaj ke la nomoj komunikas al ni la esencon de ĉio kio iras kaj moviĝas kaj trakuras. Ĉu laŭ malsama maniero ol tiu al vi ŝajnas ke ili montras?

KRAT. Ĝuste laŭ tiu, kaj ili signifas laŭ korekta maniero.

SOKR. Komencante, tial, el tiuj nomoj, unue ni ekzamenu jenon: *ἐπιστήμη* (scienco) ĉar ĝi sonas ambigue, kaj ŝajnas precipe signifi ke ĝi *ἴσθησιν* (blokas) nian animon *ἐπὶ* (sur) la aĵoj kaj ne ke tiu moviĝas ĉirkaŭ ili; kaj ŝajnas pli oportune paroli pri ĝia origino kiel ni faras nun kaj ne, enŝovante *εἰ*, el kio *επειστήμη*; kaj estus eĉ pli korekte efektiviĝi enŝovon, anstataŭ de *εἶ*, de *ἰῶτα*. Rilate, poste, la vorton *Βέβαιον* (sekura), ĉar ĝi estas imita ago de *βάσις* (bazo) kaj de *στάσις* (stari), sed ne de *φορὰ* (movo). Plue *ἱστορία* (enketo) kelkmaniere signifas *ἴσθησι τὸν ρόδν* (bloki la fluon). Kaj *πιστὸν* (kredebla) sendube signifas *ἰστὰν* (kiu blokas). Ankoraŭ *μνήμη* (memoro) kelkmaniere sugestas al ĉiu ke estas *μονή* (plurestado) en la animo, sed do ne movo. Kaj se vi plu volas, jen *αμαρτία* (eraro) kaj *συνφορά* (malfeliĉo): se oni sin lasos gvidi per la nomo, ili montros la samon de *σύνεσις* (kompreno), de *επιστήμη* (scienco) kaj de ĉiuj restantaj monoĵoj rilataj al seriozaj aferoj. Kaj plue *αμαθία* (ignoro) kaj *ακολασία* (senmodero) ŝajnas alproksimiĝi al jeno: la unua, *αμαθία*, ŝajnas esti promeno de *ἄνα θεῶ ἰὸν* (kiu iras kune kun la dio), dum la alia, *ακολυσία*, ŝajnas en ĉio kaj ĉiuaspekte *ακολουθία* (iri enen) en la aĵojn. Kaj tiel, la nomoj kiujn ni opinias atribuitaj al la aĵoj plej malbelaj ŝajnus similaj al tiuj asignitaj al plej belaj. Kaj mi opinias ke, se iu iom intense

engaĝiĝus, tiu povus malkovri multajn aliajn, el kiuj li induktus ke la nomdoninto ĉi-foje intencis montri nek la aĵojn irantajn nek la moviĝantajn, sed la daŭre persistentajn.

KRAT. Tamen, Sokrato, vi vidas ke tiu metodo igis signifanta la plejparton de la aĵoj.

SOKR. Kaj kio el tio, Kratilo? Ĉu ni kalkulos la nomojn kiel ni faras por la voĉdoniloj, kaj en tio konsistos la adekvateco de la nomoj? Se la plejparto de la nomoj ŝajnos signifi iujn aĵojn anstataŭ aliajn, ĉu tiuj estos la veraj?

Ĉapitro XLIII

KRAT. Certe ne tiel.

SOKR. Absolute neniel, amiko. Sed ni preterlasu, tiupunkte, tiun ĉi temon kaj revenu al tiu. Ĵuŝuse, se vi memoras, en antaŭaj paroladoj vi diris ke necesas, ke kiu almetis la nomojn, tiujn li asignis sciante al kio li ilin asignis. Ĉu vi persistentas en tiu opinio?

KRAT. Ankoraŭ tia mi estas.

SOKR. Ĉu eble vi asertas ke ankaŭ kiu metis la unuajn nomojn, li tion faris sciante?

KRAT. Jes, sciante.

SOKR. De kiuj nomoj, tial, li jam lernis aŭ malkovris la objektojn, se la unuaj nomoj ne estis jam asignitaj? Ĉu ne estas ni kiuj allasas ke ne eblas lerni aŭ malkovri la objektojn per nenialia vojo ol per proprasperte lernante la nomojn kaj malkovrante kiel ili estas?

KRAT. Al mi ŝajnas ke vi estas diranta ion gravan.

SOKR. Kiamaniere, tial, ni povas prave diri ke ili, sciante, asignis la nomojn, aŭ ke ili sciante tion ordonis, antaŭ ol esti asignita iu ajn nomo

kaj do antaŭ ol ili informiĝus, se ĝuste ne eblas lerni la aĵojn estantajn se ne pere de la nomoj?

KRAT. Mi konvinkitas ke la konsidero pli valida rilate tiajn temojn, Sokrato, postulas ke potenco pli granda ol tiu homa estis kiu asigis la unuajn nomojn al la aĵoj, tiel ke inferenciĝas ke tiuj estas adekvataj.

SOKR. Kaj tial ĉu vi opinias ke kiu ilin metis, iujn li metis kontraŭante sin mem, malgraŭ sia demona aŭ dieca kvalito? Aŭ ĉu al vi ŝajnas ke ni ĵusjuse diris nenion validan?

KRAT. Sed restu atenta, ĉar el tiuj iuj aŭ aliaj ne estis veraj nomoj.

SOKR. Kiuj, karega? Ĉu tiuj kiuj enkondukas kvieton aŭ kiuj puŝas al movo? Fakte, laŭ kio jam dirita, oni ne rajtos elekti apogite sur la kvanto.

KRAT. Certe, tio malkonsentebblas, ho Sokrato.

SOKR. Tial, ĉar la nomoj kontrastas inter si, kaj iuj proklamas esti similaj al la vero, aliaj tamen esti tiaj mem, kiamaniere ni distingos aŭ al kiu ilo nin helppetos? Ne certe helpe de aliaj nomoj malsamaj ol tiuj: fakte, ne eblas, kaj ili ne ekzistas, ke ni devas serĉi aliajn helpilojn ekstere de la noma serio, kiuj igu videblaj, senhelpe de la nomoj kiaj el ili estas la veraj, senvualante laŭ klara maniero la esencon de la aĵoj estantaj.

KRAT. Ankaŭ mi ŝajnas tiel.

SOKR. Versimilas, do, Kratilo, kiel evidentas, instruiĝi, senhelpe de la nomoj, pri la estaĵoj, se la afero statas kiel ni diris.

KRAT. Tiel ŝajnas.

SOKR. Per kiu alia ilo vi elpensas ilin ellerni? Ĉu eble per iu alia kriterio kiu ne estus tiu versimila kaj ege taŭga, nome kribri la unujn per la aliaj, se kelkmaniere ili estas samspecaj, kaj pere de ili mem? Fakte, kio

distingiĝas el tiuj kaj estas alispeca povas signifi ion alian kaj malsamspecan, sed certe ne tiuj⁶⁴.

KRAT. Al mi ŝajnas ke vi diras la veron.

SOKR. Momenton, je Zeŭso! Ĉu ni ne akordiĝis ofte ke la nomoj adekvate asignitaj estas similaj al tio, kies ili estas nomoj, kaj ke ili estas bildoj de la estaĵoj?

KRAT. Jes.

SOKR. Se, do, unuflanke oni povas laŭ plej eble lerni la objektojn per la nomoj, sed aliflanke eblas tion fari per la objektoj mem, kiu el la du vojoj estas la instruiĝo pli bona kaj pli klara? Ĉu lerni el la bildo la adekvatecon de la bildo mem kaj la veron kies ĝi estas bildo, aŭ ellerni el la vero la veron mem kaj ĝian bildon, se ĝi estus realigita laŭ adekvateco?

KRAT. Necese el la vero mem, al mi ŝajnas.

SOKR. Scii la manieron, do, per kiu lerni aŭ trovi la aĵojn estantajn estas, eble, tasko pli granda ol mi kaj vi: ni, tamen, devas reciproke gratuli ankaŭ nur pri tio ke ni sukcesis akordiĝi pri jeno: ne el la nomoj, sed ili mem pro si mem estas lernendaj kaj esplorendaj, multe pli ol el la nomoj.

KRAT. Tiel ŝajnas, ho Sokrato.

Ĉapitro XLIV

SOKR. Tial ni kribru ankoraŭ jenon, por ke nin ne trompu tiu multego da nomoj tendencaj al la sama direkto: ĉu reale la asignintoj de la

⁶⁴ Ĉi-tie estas asertata la radikala malsameco de la lingvaĵo el la realo: el tio la neadekvateco de la nomoj sur la sciiga nivelo. La nomoj nur aludas aŭ alvokas la realon, kiu restas la unika fonto de kono pri ĝi. Kiu atingos, do, la scion? Ne la posedanto aŭ simpla kompetentulo pri la lingvaĵo, sed kiu kapablas ĝin uzi, nome la dialektikulo.

nomoj tion faris ĝuste taksante ĉiujn aĵojn en movo kaj en fluo - al mi ŝajnas ke ili ĝuste tiel konceptis - aŭ ĉu, male, hazarde la afero tiel ne estas, kaj male ili mem, kvazaŭ falintaj en ventokirlon, ĉi-rilate renverŝiĝis kaj, nin trenante, ankaŭ nin faligus en ĝin? Prikonsideru, admirinda Kratilo, tion kio ĝuste al mi ofte prezentiĝas en sonĝoj. Ĉu ni asertos ke estas io la belo mem kaj la bono kaj sammaniere unuopa el la aĵoj estantaj, aŭ ne?

KRAT. Tiel al mi ŝajnas, ho Sokrato.

SOKR. Tial, do, ni metu sub ekzameno tiun ‘samon’, ne ĉu belas vizaĝo aŭ iu ajn el la estaĵoj, kiuj ŝajnas ankaŭ ĉiuj ŝanĝe flui. Nu, ĉu ĝi ‘mem’, nome la belo, ne stabile estas tia kia ĝi estas⁶⁵?

KRAT. Nepre!

SOKR. Ĉu eblas, sekve, se ĝi (la ideo pri belo ktp) ĉiam malproksimiĝas, diri pri ĝi en korekta maniero, antaŭ ĉio ke ĝi estas, kaj tujpost ke ĝi estas tia? Aŭ ĉu nepre en la momento en kiu ni ekparolas tiu fariĝas alia kaj malaperas kaj tia ne daŭrigas esti?

KRAT. Nepre!

SOKR. Kiel, do, povas esti io kio neniam stabile statas en la sama maniero? Se fakte ĝi restas senmova unufojon, klaras ke almenaŭ en tiu momento ĝi ne transformiĝas; sed se ĝi restas ĉiam en la sama stato kaj daŭrigas esti sammaniere, kiel ĝi povas ŝanĝiĝi aŭ moviĝi, neniel malproksimiĝante el sia ideo?

⁶⁵ Ĉi tie ekburĝonas la teorio de la ideoj stabile normantaj el Hiperurano. Ekburĝonas ĉar tiu teorio estos plielaborita en postaj verkoj de Platono. Se la belo kaj bono estas kvante kaj kvalite variaj en la aĵoj estantaj, ili devas estis ne variaj en si mem.

Estis facile - se oni permesus eksterkampajon - por kristanaj filozofoj identigi tiun konstantan belo-bonon kun Dio, la kreinto mem: kaj naskiĝis la kristana branĉo de la platoniĝanta filozofio.

KRATILO? Nenimaniere.

SOKR. Sed tial ĝi povas esti perceptata de neniu. Fakte en la sama momento de la ekkoniĝo ĝi fariĝus alia kaj malsamspeca, tiel ke ĝi ne plu povus esti konata kia ĝi estas aŭ kiel ĝi status: sendube neniu alprenu de kono konas kion konas se la objekto ne staras stabile.

KRAT. Estas kiel vi diras.

SOKR. Kaj eĉ oportunas diri ke ne okazas kono, Kratilo, se ĉiuj estaĵoj ŝanĝiĝas kaj nenio stabile daŭras. Se, fakte, laŭ la esenco mem de kono, la kono mem ne ŝanĝiĝas, kaj nur tiukaze ĝi povus persisti kaj esti kono. Sed se la sama ideo de kono ŝanĝiĝas, ĝi povas en la sama momento aliĝi al alia ideo de kono kaj ne plu esti kono: kaj je lumo de tiu konsidero povas estiĝi nek kiu devus koni nek kio devus esti konita. Sed se konstantas kio konas kaj kio estas konata, kaj la belo kaj bono, kaj unuopa aĵo el tiuj estantaj, nome ĉi tiuj estaĵoj pri kiuj ni parolas nun, neniel ŝajnas al mi similaj al tio kio sin movas kaj fluas. Nu, ĉu la afero status laŭ tiu vidpunkto aŭ laŭ tiu proponita de Heraklitanoj kaj multaj aliaj, mi timas ke temas pri afero ne facila por la ekzameno; nek estas afero por homo tre saĝa kiu, allasinte al la nomoj la zorgon pri li mem kaj pri lia animo, fidante je ili kaj je tiuj kiuj ilin asignis, obstini kvazaŭ mem konus ion, kaj kulpigi sin mem kaj la realajn estaĵojn pro la fakto ke tutnenio estas sana dum male ĉiuj estaĵoj fluas kiel terkotaj vazoj, kaj kredi ke ĝuste kiel homoj malsanaj pro kataro tiel status ankaŭ la estaĵoj, ĉiuj do frapitaj de kataro kaj fluo. Nu, Kratilo, eble la afero tiel estas, eble ankaŭ ne. Nepras, do, kuraĝe kaj serioze esplori, kaj ne facile akcepti - ĉar vi estas ankoraŭ juna kaj posedas la oportunan aĝon -; sed post prudenta konsidero, se vi eltrovas, bonvolu je tio partoprenigi ankaŭ min.

KRAT. Tion mi faros. Tamen, firme sciu, ho Sokrato, ke eĉ nun mi ne estas en sinteno nepripensa, sed al mi ju pli mi esploras kaj engaĝiĝas des pli ŝajnas ke la problemo estas solvenda laŭmetode de Heraklito⁶⁶.

SOKR. Tial, vi tion al mi eksplikos alifojojn, amiko, revenonte. Nun foriru al la kamparo, same kiel vi estis jam preta fari: kaj vin akompanos ankaŭ Hermogeno.

KRAT. Estos tiel, ho Sokrato, sed ankaŭ vi provu remediti tiaĵojn.

⁶⁶ Finfine eblas resumi kion Platono volas atingi per la tuta diskutado: sin liberigi el la strikto de la sofista subjektivismo kaj de la antaŭsokrata naturalismo. Estas nomebla nur kio estas stabila dum la normo de la dialogo devas esti la objektiveco de la aĵoj estantaj... kaj tia stabileco trovas kroman konsiston en la nemuteco de la ideoj.